

EL *Popola*
ĈINIO

N-ro 5

SEPTEMBRO-OKTOBRO 1966







CITITAJ VORTOJ DE PREZIDANTO MAŬ

“La popolo de la tuta mondo unu-
iĝu kaj venku la usonajn agresantojn
kaj ĉiujn iliajn lakeojn! La popolo de
la tuta mondo havu kuraĝon, aŭdacu
batali, timu neniajn malfacilojn kaj
marŝu antaŭen, unuj sekvante aliajn;
tiam, la tuta mondo certe apartenos
al la popolo. Ĉiuj demonoj estos sen-
escepte ekstermitaj.”

— *Deklaro por Subteni la Popolon de Kongolando
(L.) kontraŭ Usona Agreso (28 nov. 1964)*




Prezidanto Maŭ revuas sur la ferdeko de motorŝipo la armeon de naĝantoj, kiuj luktas kontraŭ la ondoj en Jangzi-rivero.




Pli ol 8,000 sportistoj en Pekino naĝas trans Kunming-lago antaŭenpuŝante la grandan portreton de la plej estimata kaj amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ.



La naĝantoj, kiuj partoprenas la Konkurson de Transnaĝado de Jangzi-rivero, atingas la finan punkton.



En la Konkurso de Transnaĝado de Jangzi-rivero en Vuhan, la pli ol 5,000 naĝantoj kuraĝe antaŭenaĝas kriante sloganojn kaj antaŭenpuŝante tabulojn kun citaĵoj el verkoj de Prezidanto Maŭ



Anoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kiuj partoprenas la transnaĝadon de Kunming-lago en Pekino sub la kuraĝigo de la naĝado de Prezidanto Maŭ en Jangzi-rivero.

Prezidanto Maŭ

Sate Naĝis

en Jangzi-rivero

JE la 16-a de julio, 1966, Prezidanto Maŭ, nia granda gvidanto denove naĝis sate en Jangzi-rivero, fendante la ondojn en la vento.

En tiu tago la ĉielo estis serena kaj sennuba en Vuhan. Miloj kaj dekmiloj da popolanoj sur ambaŭ bordoj de la rivero bolis en ĝojo.

En junio antaŭ dek jaroj Prezidanto Maŭ trifoje naĝis trans Jangzi-rivero en Vuhan kaj skribis la poemon brilan kaj plenan de grandiozeco *Naĝado*. Post dek jaroj, li denove naĝis en la granda rivero unu horon kaj kvin minutojn je distanco de proksimume 15 kilometroj, ĝuste kiel dirite en la poemo:

*Spite al la ventpelo kaj ondbato, estas
Ja pli agrable ol promeni en la korto.*

La ĝojiga novaĵo pri refoja naĝado de Prezidanto Maŭ en Jangzi-rivero rapide disvastiĝis tra Vuhan. Ĉiuj viroj kaj virinoj, junuloj kaj maljunuloj en la urbo, ekscititaj de ĝojo, informis unu la alian dirante: “Nia estimata kaj amata gvidanto Prezidanto Maŭ tiel bone fartas. Tio estas la plej granda feliĉo de la popolo de la tuta Ĉinio kaj de la revoluciaj popoloj de la tuta mondo.”

En la antaŭtagmezo de la 16-a de julio kvin mil lertaj naĝantoj de Vuhan, laŭ la

instruo de Prezidanto Maŭ pri hardiĝo per naĝado en grandaj riveroj kaj maroj, entuziasme partoprenis la 11-an Konkurson de Transnaĝado de Jangzi-rivero sur la akvojo malfermita de Prezidanto Maŭ. En tiu momento nia granda gvidanto revuis sur motorŝipo la naĝantojn, kiuj partoprenis la konkurson. Tio donis senkompare grandan stimulon al la tuta popolo de Vuhan.

En la 16-a de julio ŝajne ridis la akvo de Jangzi-rivero, kaj ĝoje kriantaj popolamasoj viciĝis sur ambaŭ bordoj kie flirtis sennombraj koloraj flagoj kaj sloganoj sur grandaj tol-pecoj. Tio prezentis scenon de festotago plena de ĝojo.

Je 20 minutoj post la naŭa antaŭtagmeze la megafonoj ambaŭborde aŭdigis emocie la muzikon *Ruĝas la Oriento*, kiu prikantas nian estimatan kaj amatan gvidanton, Prezidanton Maŭ. Oni pensis, ke estas Prezidanto Maŭ, kiu malfermis por ni vastan, ebenan vojon sur Jangzi-rivero. Kiel bone estos, se li povos veni hodiaŭ por rigardi nian naĝadon trans la rivero.

Prezidanto Maŭ estas la ruĝa suno en nia koro, kaj li estas ĉiam kun ni. Ĝuste en la momento, kiam la konkurso komenciĝis, de la oriento kie leviĝis la suno, alveturis motorŝipo fendante la ondojn. Iu el la naĝantoj vidis Prezidanton Maŭ sur la motorŝipo kaj, ne povante reteni sin



Prezidanto Maŭ plezure naĝas en Jangzi-rivero.

Prezidanto Maŭ

Sate Naĝis

en Jangzi-rivero

JE la 16-a de julio, 1966, Prezidanto Maŭ, nia granda gvidanto denove naĝis sate en Jangzi-rivero, fendante la ondojn en la vento.

En tiu tago la ĉielo estis serena kaj sennuba en Vuhan. Miloj kaj dekmiloj da popolanoj sur ambaŭ bordoj de la rivero bolis en ĝojo.

En junio antaŭ dek jaroj Prezidanto Maŭ trifoje naĝis trans Jangzi-rivero en Vuhan kaj skribis la poemon brilan kaj plenan de grandiozeco *Naĝado*. Post dek jaroj, li denove naĝis en la granda rivero unu horon kaj kvin minutojn je distanco de proksimume 15 kilometroj, ĝuste kiel dirite en la poemo:

*Spite al la ventpelo kaj ondbato, estas
Ja pli agrable ol promeni en la korto.*

La ĝojiga novaĵo pri refoja naĝado de Prezidanto Maŭ en Jangzi-rivero rapide disvastiĝis tra Vuhan. Ĉiuj viroj kaj virinoj, junuloj kaj maljunuloj en la urbo, ekscititaj de ĝojo, informis unu la alian dirante: “Nia estimata kaj amata gvidanto Prezidanto Maŭ tiel bone fartas. Tio estas la plej granda feliĉo de la popolo de la tuta Ĉinio kaj de la revoluciaj popoloj de la tuta mondo.”

En la antaŭtagmezo de la 16-a de julio kvin mil lertaj naĝantoj de Vuhan, laŭ la

instruo de Prezidanto Maŭ pri hardiĝo per naĝado en grandaj riveroj kaj maroj, entuziasme partoprenis la 11-an Konkurson de Transnaĝado de Jangzi-rivero sur la akvo-vojo malfermita de Prezidanto Maŭ. En tiu momento nia granda gvidanto revuis sur motorŝipo la naĝantojn, kiuj partoprenis la konkurson. Tio donis senkompare grandan stimulon al la tuta popolo de Vuhan.

En la 16-a de julio ŝajne ridis la akvo de Jangzi-rivero, kaj ĝoje kriantaj popolamasoj viciĝis sur ambaŭ bordoj kie flirtis sennombraj koloraj flagoj kaj sloganoj sur grandaj tol-pecoj. Tio prezentis scenon de festotago plena de ĝojo.

Je 20 minutoj post la naŭa antaŭtagmeze la megafonoj ambaŭborde aŭdigis emocie la muzikon *Ruĝas la Oriento*, kiu prikantas nian estimatan kaj amatan gvidanton, Prezidanton Maŭ. Oni pensis, ke estas Prezidanto Maŭ, kiu malfermis por ni vastan, ebenan vojon sur Jangzi-rivero. Kiel bone estos, se li povos veni hodiaŭ por rigardi nian naĝadon trans la rivero.

Prezidanto Maŭ estas la ruĝa suno en nia koro, kaj li estas ĉiam kun ni. Ĝuste en la momento, kiam la konkurso komenciĝis, de la oriento kie leviĝis la suno, alveturis motorŝipo fendante la ondojn. Iu el la naĝantoj vidis Prezidanton Maŭ sur la motorŝipo kaj, ne povante reteni sin

de ĝojeksplodo, laŭte ekkriis: “Prezidanto Maŭ venas! Vivu Prezidanto Maŭ!” La granda armeo de naĝantoj kun centoj da ruĝaj flagoj alte tenataj tuj eknaĝis en la direkto al Prezidanto Maŭ. Sur la akvosurfaco ruĝe nuancita de la flagoj kaj sur ambaŭ bordoj la okuloj de miloj kaj dekmiloj da homoj direktis sin al Prezidanto Maŭ. Miloj kaj dekmiloj da homoj esprimis la saman deziron: Longe vivu la granda Prezidanto Maŭ! Miloj kaj dekmiloj da homoj kriis el sia koro samvoĉe: Vivu Prezidanto Maŭ! Samtempe la ŝipoj ankrantaj en la haveno kune kaj longdaŭre fajfis por esprimi respekton al la granda gvidanto. Huraĵoj kaj fajfado kunmiksiĝis kaj ekskuis la ĉielon super la urbo.

Kun ruĝe brilanta vizaĝo kaj energiplena aspekto, Prezidanto Maŭ staris sur la ferdeko kaj revuis la grandan armeon de naĝantoj, kiuj luktis kontraŭ la ondaroj. En tiu momento la naĝantoj formis Grandan Muron sur la larĝa rivero kaj kuraĝe antaŭennaĝis, fendante la ondojn. Inter ili iuj alte tenis ruĝajn flagojn, kaj aliaj antaŭenpuŝis grandajn tabulojn kun citaĵoj el verkoj de Prezidanto Maŭ. Sur la tabuloj estis skribitaj: “Unuiĝo, streĉiteco, seriozeco kaj vikleco”; “Serioze traktu la imperiistojn kiuj tiel arogante tiranas nin”; “Estu decidema, ne timu oferojn kaj konkeru ĉiujn malfacilojn por akiri venkon”. Prezidanto Maŭ tre ĝojis, vidante ke la naĝantoj posedas tian revolucian spiriton, esti firma en decido kaj havi fortan batalvolon. Jen kaj jen irante de unu flanko al la alia sur la motorŝipo, li ŝvingadis sian manon meze de entuziasmaj huraoj kaj alte kriis salute al la naĝantoj: “Salutojn, kamaradoj! Vivu vi kamaradoj!”

La geknaba naĝgrupo konsistanta el pli ol 200 gelernantoj de elementaj lernejoj ĝuis apartan prizorgon de Prezidanto Maŭ. Plejparto de ili estis 8- ĝis 14-jaraj junaj pioniroj, kiuj naĝis kune ĉirkaŭ tabulo kun la vortoj de Prezidanto Maŭ: “Lernu bone kaj progresu ĉiutage”, kaj kantis la kanton: *Ni Estas Daŭrigantoj de la Komunisma Afero*, dum ili strebis antaŭen,

fendante la ondojn en vento, plenaj de revolucia spirito de ruĝaj infanoj en la epoko de Maŭ Zedong. Kiam la geknaboj alproksimiĝis, Prezidanto Maŭ petis, ke la motorŝipo sin direktu al ili. Vidante Prezidanton Maŭ, la junaj pioniroj entuziasme kaj laŭte kriis: “Vivu Prezidanto Maŭ!” Afable ridetante, Prezidanto Maŭ ŝvingis sian manon al ili kaj diris ameme: “Salutojn, geknaboj!”

La kuraĝigo de Prezidanto Maŭ donis senfinan forton al la geknaboj. Spite al la ruliĝantaj ondoj ili energie naĝis al sia celo.

Inter la naĝantoj, Nie Ĉangŝen, milicano de Hankoŭa Termoelektra Centralo, tiel ekscitiĝis kiam li vidis Prezidanton Maŭ, ke li forgesis, ke li estas en la akvo. Li levis ambaŭ manojn kaj laŭte kriis, “Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu Prezidanto Maŭ!” Li salte levis sin kaj tiam subakviĝis, englutante kelkajn plenbuŝojn da akvo, sed li sentis, ke la akvo gustas aparte dolĉe. Same ekscitite kiel tiu milicano, laŭte kriante “Vivu Prezidanto Maŭ”, la 5,000 naĝantoj naĝis preter Prezidanto Maŭ en grupoj kaj venke atingis la celon.

Kiam ili iris sur la bordon atinginte la finan celon, ili returniĝis kaj, kune kun miloj kaj dekmiloj da popolanoj, varme hurais al Prezidanto Maŭ, kiu estis sur la motorŝipo meze de la rivero. Kiam la ŝipo moviĝis al la bordo, Prezidanto Maŭ staris ĉe ĝia antaŭa parto, daŭre ŝvingis sian manon kaj laŭte kriis: “Vivu la popolo!” La popolamaso sur la bordo ekbolis de entuziasmo, kaj la tondraj ĝojkrioj dronigis la muĝon de la vento kaj ondaroj de Jangzi-rivero.

En tiu gaja momento la motorŝipo de Prezidanto Maŭ veturis proksimen al la buŝo de la digego en Vuĉang. Per firmaj paŝoj Prezidanto Maŭ malsupreniris laŭ la ŝtupareto ĉe la ŝipflanko kaj trempis sin en la akvo por momento. Poste li etendis siajn brakojn kaj komencis naĝi. Estis ĝuste la 11-a horo.

La Jangzi-rivero estis en periodo de ŝvelo. La akvo fluo estis rapida, kaj la

ruliĝantaj ondoj batis forte la bordojn. Sur la vasta surfaco de la rivero Prezidanto Maŭ jen antaŭeniĝis per flanknaĝado puŝante malantaŭen la ondojn kaj jen flosis per dorsnaĝado rigardante la lazuran ĉielon. Proksime de li en la akvo estis k-do Vang Ĵenĉong, la dua sekretario de la Centr-Sud-Ĉinia Buroo de la Centra Komitato de la Kominista Partio de Ĉinio kaj unua sekretario de la Partia Komitato de Hubej-provinco, kaj grupo da fortaj gejunuloj, kiuj lin akompanis en naĝado.

Dum Prezidanto Maŭ naĝis tra la ondoj, li vigle babilis kun la kamaradoj ĉirkaŭ si. Iu junulino diris al li: “Jen estas la dua fojo por mi, ke mi naĝas en Jangzi-rivero.” Ridetante Prezidanto Maŭ respondis: “Jangzi-rivero estas kaj larĝa kaj profunda. Ĝi estas bona loko por naĝado.” Kiam Prezidanto Maŭ trovis, ke alia junulino, kiu akompanis lin, povas naĝi nur per unu sola maniero, li afable instruis al ŝi dorsnaĝadon. Li diris: “Jangzi-rivero estas profunda, kaj ĝia fluo estas rapida. Tio povas helpi nin en ekzercado de la korpo kaj hardado de la volo.”

En 1957, kiam Prezidanto Maŭ naĝis trans Jangzi-rivero je la kvara fojo, li instruis al ni: Oni diras, ke Jangzi-rivero estas tre granda. Fakte, grandeco ne estas timinda. Ĉu la usona imperiismo ne estas tre granda? Iam ni kontraŭstaris ĝin, kaj tio rezultigis nenio serioza. Tial, iuj grandaj objektoj en la mondo, fakte, ne estas timindaj.

Naĝante, Prezidanto Maŭ babilis kun k-do Vang Ĵenĉong, kiu estis ĉe lia flanko. “Kiel disvastiĝas naĝado inter la infanoj kaj gejunuloj en Vuhan?” li demandis. “Pli kaj pli multaj el ili okupiĝas pri naĝado,” respondis Vang Ĵenĉong. “Ili distingiĝas per tio, ke ili estas maltime maj, kuraĝaj kaj rapide ellernas. Ĝenerale, ili bezonas nur kvin aŭ ses tagojn por scii iel naĝi.” Poste Prezidanto Maŭ ree demandis: “Ĉu unu el ĉiu trio povas naĝi?” K-do Vang Ĵenĉong respondis: “Jes.” Kun kontento Prezidanto Maŭ diris: “Tio estas tre bona.” K-do Vang Ĵenĉong raportis plie al Prezi-

danto Maŭ, ke anoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj milicanoj en Vuhan naĝis trans Jangzi-rivero plene armitaj en la pasinta jaro, kaj ke la studentoj de la Vuhana Instituto de Akvoutiligo kaj Elektra Povo naĝis trans la lago Donghu en Vuhan dum vintro. Li aldonis, ke pli kaj pli da homoj jam scipovis naĝi, kaj la nombro de tiuj, kiuj kapablas naĝi trans Jangzi-rivero, kreskas kun ĉiu jaro.

En 1956, kiam Prezidanto Maŭ naĝis trans Jangzi-rivero je la unua fojo, tio kuraĝigis la vastan popolamason. Prezidanto Maŭ diris: “Naĝado estas sporto, en kiu la naĝantoj luktas kontraŭ la naturo. Vi devas iri al la grandaj riveroj kaj maroj por hardi vin.” Laŭ tiu lia instrukcio miloj kaj dekmiloj da infanoj kaj gejunuloj kaj vastaj popolamasoj pli vaste partoprenas naĝadon trans Jangzi-rivero de la lastaj jaroj. En la unua fojo de naĝado trans Jangzi-rivero, ĝin partoprenis nur iom pli ol dudek junulinoj. Nun, proksimume 1,000 junulinoj partoprenas ĝin ĉiujare, inkluzive armitajn milicianinojn. Rilate al infanoj nur unu knabo partoprenis ĝin en la unua fojo. Sed nun la geknaboj jam estas la avangardo en la naĝado trans Jangzi-rivero. Ankaŭ infanoj, kiuj naskiĝis post kiam Prezidanto Maŭ unuan fojon naĝis trans Jangzi-rivero, nun montras sin eminentaj en trans-rivera naĝado.

Kiam proksimiĝis tagmezo, 5-agrada vento blovis super la larĝa rivero, levante grandajn ondojn. La motorŝipo, kiu atendis meze de la rivero, moviĝis al Prezidanto Maŭ por preni lin supren. K-do Vang Ĵenĉong kelkfoje petis lin supreniri kaj ripozi. Prezidanto Maŭ demandis, kiom longe ili jam naĝis. Kiam la kamaradoj en ĉirkaŭo diris, ke ili naĝis kvardek kvin minutojn, li respondis en tre vigla humoro: “Tio estas malpli ol unu horo!” Poste li daŭre naĝis orienten. Kiam ili naĝis 65 minutojn, Vang Ĵenĉong denove petis Prezidanton Maŭ ekriprozi sur la ŝipo. Prezidanto Maŭ ŝerce diris: “Vi estas la unua sekretario de la Provinca Partia Komitato ĉi tie, kaj mi devas obei vin.”

Komencante proksime de la buŝo de la digego en Vuĉang, Prezidanto Maŭ naĝis laŭ la fluo de la rivero ĉirkaŭ 15 kilometrojn ĝis proksime al la Vuhana Fera kaj Ŝtala Kompanio. Kiam li suriris la motorŝipon, li estis plena de vigleco kaj montris nenian signon de laciĝo.

La novaĵo pri la naĝado de Prezidanto Maŭ en Jangzi-rivero entuziasmigis ĉies koron kaj alportis grandegan inspiron kaj forton al ĉiu.

Vej Jue-an, politika direktanto de la 205-a grupo de la Vuhana Havena Administracio kaj unu el tiuj en la navigaciaj sekcioj de Jangzi-rivero, kiuj estas distingitaj kiel elstaraj modeloj en studo de la verkoj de Maŭ Zedong, reveninte al sia grupo, rakontis al siaj kamaradoj la memorindan okazon, ke Prezidanto Maŭ revuis la naĝantojn kaj naĝis en Jangzi-rivero. Kun profunda emocio, li diris: “Kiel doklaboristo kiu pasigis dekojn da jaroj ĉe la akvo, mi spertis multajn malfeliĉojn en la malnova socio. Post la Liberiĝo la popolo fariĝis la mastro de sia lando, kaj hodiaŭ mi povis naĝi kune kun Prezidanto Maŭ en Jangzi-rivero, tion mi ne forgesos dum mia tuta vivo. Ekde nun mi ankoraŭ pli bone sekvos la instruojn de Prezidanto Maŭ. Dum mi laboros sur Jangzi-rivero, mi ĉiam pensos pri nia patrio kaj zorgos la tutan mondon, kreive studos kaj aplikos verkojn de Prezidanto Maŭ, plenumos ĝisfunde la grandan proletan kulturalan revolucion, faros bone mian laboron kaj kontribuos al la konstruado de nia granda patrio kaj al la subteno al kontraŭimperiismaj, revoluciaj bataloj de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, por respondi al la zorgemo montrita al mi de la Partio kaj Prezidanto Maŭ.”

La 16-a de julio estas tago neforgesebla por la pli ol 300 laboristoj kaj oficistoj kaj iliaj familianoj de la riparejo de la ŝipa sekcio de la Jangzi-a Navigacia Administra-cio. Tiu estas la dato, en kiu ili vidis, kiel sana kaj vigla estas la estimata kaj amata gvidanto Prezidanto Maŭ, kaj ili sentis senli-man feliĉon. En la posttagmezo de tiu tago la

laboristoj skribis en la laborejo multegon da garantiaj skriboj, esprimante sian decidon teni pli alte la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, konduki la grandan proletan kulturalan revolucion ĝis la fino kaj pli multe, pli rapide, pli bone kaj pli ekonomie ripari ŝipojn por subteni nacian konstruadon kaj la vjetnaman popolon en ĝia batalo por venki la usonan imperiismon.

Kiam laboristo-naĝanto Liu Vuking de la Hangoŭa Termoelektra Centralo vidis Prezidanton Maŭ en la mezo de la rivero, li ĵuris en si: “Prezidanto Maŭ, mi ankoraŭ pli bone studos viajn verkojn kaj, same kiel k-do Liu Jingĝun, mi diligente studos la plej altan instrukcion, fidele plenumos ĝin, entuziasme propagandos ĝin kaj kuraĝe defendos ĝin.” Sur la vojo revene al la centralo Liu kantis *Ruĝas la Oriento* kune kun la aliaj plena de profunda sento. Iu juna pioniro, profunde ĝojigita kaj multe kortuŝita post la naĝado, elprenis sian poŝtaglibron kaj zorgeme enskribis la plej neforgeseblan okazintaĵon en sia vivo: “Mi vidis Prezidanton Maŭ je 10:35 antaŭtagmeze de la 16-a de julio, 1966.”

En tiu tago, amikoj el diversaj landoj, kiuj vizitas Vuhan ĉeestinte la Urĝan Kunvenon de Azi-Afrikaj Verkistoj, rigardis de sur ŝalupoj la konkurson de naĝado trans Jangzi-rivero de la popolo de Vuhan. Ili renkontis la grandan gvidanton de la ĉina popolo Prezidanton Maŭ, kiun ili longe deziris vidi. La fremdlandaj amikoj varmege aklamis Prezidanton Maŭ, kaj la ŝalupoj ekbolis de iliaj aplaŭdoj. Delegitoj el Nigerlando, kiam ili ĉeestis la verkistan kunvenon en Pekino, kolektive verkis poemon por esprimi sian varman amon al Prezidanto Maŭ. Ĝi tekstas jene:

*Maŭ Zedong, vi estas nia instruanto,
Maŭ Zedong, vi estas vojmontra lumturo,
Kiu hele kaj helege lumigadas
La plej plej malluman foran horizonton. . . .*

Kiel ili povis regi sian ekscitiĝon, kiam ili vidis Prezidanton Maŭ tiun tagon? Kelkaj

Bonvolu legi

la Verkojn de Prezidanto Maŭ

Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo

Mendu ĉe la perantoj de EPC
aŭ ĉe la Libro-servo de ĈEL
(P. O. Kesto 313, Pekino)

amikoj ripete kriis: “Prezidanto Maŭ! Prezidanto Maŭ!” Iuj kriis en la ĉina lingvo: “Vivu Prezidanto Maŭ!” Aliaj daŭre aplaŭdegis sur la ŝalupoj. Amikoj el Indonezio tiel ekscitiĝis vidante Prezidanton Maŭ, ke ili daŭre hurais kaj poste laŭte kantis revoluciajn kantojn.

Prezidanto Maŭ varme svingis sian manon kaj aplaŭdis responde al la amikoj de diversaj landoj, kiuj estis tre ĝojaj, kiam ili vidis, ke li estas tiel sana. Kelkaj diris: “Prezidanto Maŭ fartas treege bone!” Amiko el Afriko diris: “Prezidanto Maŭ transnaĝis Jangzi-riveron ja en tiel granda aĝo. La bona farto kaj longa vivo de Prezidanto Maŭ estas feliĉo de la subpremataj popoloj kaj ankaŭ de la popoloj de la tuta mondo.”

La fremdlandaj amikoj multe laŭdis la alvokon de Prezidanto Maŭ pri naĝado trans Jangzi-rivero kaj la fakton, ke li persone plenumis ĝin. Ili konsideris tion kiel aferon kun granda signifo. Ili diris, ke tio estas granda senprecedenca iniciato, ke Prezidanto Maŭ la unua naĝis trans Jangzi-rivero kaj la ĉina popolo sekvas tion per naciskala movado de naĝado. Tio montras la kuraĝon de la ĉina popolo, kiu

timas neniujn malfacilojn kaj danĝerojn. Jaoudat al-Rikabi, delegito el Sirio, rimarkis: “Ĉiuj naĝantoj, kiuj partoprenas la naĝadon trans Jangzi-rivero hodiaŭ, aspektas sanaj, entuziasmaj kaj kuraĝaj. La bonega iniciato de Prezidanto Maŭ ebligas al la gejunuloj ekzerci sian korpon kaj starigi bonan ideologion, tiel ke ili povas impeti antaŭen, tute egale, kiom ajn grandaj malfaciloj kaj kiom ajn larĝa rivero kuŝas antaŭ ili.” Tiuj amikoj diris, ke el la konkereblo de la natura baro de Jangzi-rivero kaj la maltimo kontraŭ ĉia ajn malfacilo, ili ankaŭ vidas la brilecon de la penso de Maŭ Zedong.

Ke Prezidanto Maŭ refoje fendis la ondojn de Jangzi-rivero kaj laŭdezire naĝis proksimume 15 kilometrojn, tio estas evento, kiu entuziasmigis ĉies koron. La huraoj de “Vivu Prezidanto Maŭ” sur ambaŭ bordoj tiutage daŭris pli ol kvar horojn. Tiu emocia okazo montris la senliman amon kaj respekton de la ĉina popolo al sia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Sub la gvido de la brila penso de Maŭ Zedong la 700-miliona popolo direktas siajn okulojn al la estonteco kaj antaŭeniras rajdante sur vento kaj ondoj.

Vivu la Granda Proleta

Ĉefartikolo de *Ruĝa*

SUB la rekta gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, granda amasa proleta kultura revolucio senprecedenca en historio estas disvolviĝanta rapide kaj forte kaj kun nerezistebla forto de lavango.

Alte levante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj vastaj amasoj de revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj estas forbalaantaj la reprezentantojn de la burĝaro kiuj enŝteliĝis en la Partion, ĉiujn diablojn kaj demonojn kaj ĉiujn putrajn

burĝan kaj feŭdan ideologiojn. Senprecedenca bonega situacio aperis sur la politika, ideologia kaj kultura frontoj.

Tio estas ekstreme akra kaj kompleksa klasbatalo por starigi la proletan ideologion kaj elimini la burĝan ideologion en la ideologia kampo, en la superstrukturo. Tio estas vivmorta batalo inter la burĝaro kaj la proletaro, unu por restarigi kapitalismon kaj alia por ĝin preventi. Tiu batalo influos, ĉu la proleta diktaturo kaj la ekonomia bazo de socialismo en nia lando povos esti firmigitaj kaj disvolvataj aŭ ne, kaj ĉu niaj partio kaj lando ŝanĝos sian kolo-



Kultura Revolucio

Flago (N-ro 8, 1966)

ron aŭ ne, kaj influos la sorton kaj la estonton de niaj partio kaj lando kaj ankaŭ de la monda revolucio. Tiun batalon oni nepre ne rigardu kiel malgravan.

Kial estas necese konduki la proletan kulturalan revolucion? Kial estas tiel grava la proleta kultura revolucio?


Kamarado Maŭ Zedong science resumis la historian sperton de la internacia proleta diktaturo, kaj elmetis la teorion de kontraŭdiroj, klasoj kaj klasbatalo en socialisma socio. Li konstante memorigas nin neniel forgesi klasbatalon, neniel forgesi elstarigi politikon,

neniel forgesi firmigi la proletan diktaturon, kaj ke ni devas preni diversajn metodojn por preventi reviziisman uzurpon de gvidanteco kaj preventi kapitalisman restariĝon. Li montris ke por renversi ŝtatpotencon, estas necese unue kapti la superstrukturon kaj ideologion por prepari publikan opinion. Tiel faras revolucia klaso, kiel ankaŭ kontraŭrevolucia klaso. Ĝuste elirante el tiu fundamenta vidpunkto, kamarado Maŭ Zedong alvokis nin lanĉi klasbatalon en la ideologia kampo por starigi la proletan ideologion kaj elimini la burĝan ideologion.

Tio estas granda vero kaj granda disvolviĝo de marksism-leninismo.

Historio montras ke la burĝaro unue ekkaptis la ideologion kaj preparis publikan opinion, antaŭ ol ĝi kaptis ŝtatpotencon el la manoj de la feŭda bienula klaso. Ekde la periodo de la "Renesanco", la eŭropa burĝaro senĉese kritikis feŭdan ideologion kaj propagandis burĝan ideologion. En la 17-a kaj 18-a jarcentoj, la burĝaroj de diversaj eŭropaj landoj kaptis, unu post alia, ŝtatpotencon kaj establisian diktaturon en la propra lando post preparo de publika opinio dum kelkaj jarcentoj.

Marks kaj Engels komencis propagandon de la komunisma teorio antaŭ pli ol cent jaroj. Ili tiel faris por prepari publikan opinion por la kapto de ŝtatpotenco fare de la proletaro. La rusa proleta revolucio kaptis ŝtatpotencon post preparo de publika opinio dum dekoj da jaroj. Nia propra sperto estas pli freŝa en nia memoro. Kiam la ĉina proletaro ekaperis



Milionhoma kunveno en Pekino por celebri la grandan proletan kulturalan revolucion. Ĝin regas revolucia entuziasmo. La ĉeestantaj amasoj plej varme akklamas la publikigon de la Decido kaj Komuniko de la 11-a Plena Sesio de la 8-a Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj furas konduki la grandan proletan kulturalan revolucion ĝis la fino.



Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la vastaj amasoj de revoluciaj gejunuloj en la ĉefurbo venas seninterrompe al la akceptejo de CK de KPC por prezenti al ĝi kaj Prezidanto Maŭ siajn ĝoj- kaj decid-esprimajn skribojn. Ili entuziasme krias: "Vivu Prezidanto Maŭ!"

sur la politika scenejo, ĝi estis malforta kaj nearmita. De kie startis la revolucio? De la propagando de marksism-leninismo kaj la malkovro de imperiismo kaj ĝiaj lakeoj en Ĉinio. La batalo de la ĉina proletaro por kapti la ŝtatpotencon komenciĝis de la kultura revolucio de "la Kvara de Majo".

En analizo ĝis la fino, la historio de la kupto de ŝtatpotenco fare de la ĉina proletaro estas la historio, kiel la penso de Maŭ Zedong posedis la amasojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. La popolamasoj bone diris: "Sen la penso de Maŭ Zedong, ne estus nova Ĉinio." Kombinante marksism-leninismon kun la praktiko de la ĉina revolucio, kamarado Maŭ Zedong, la granda standard-portanto de la revolucio, tute ŝanĝis la vizaĝon de la ĉina revolucio. Historia sperto montras al ni, ke la penso de Maŭ Zedong ebligis al ni gajni la pliiĝantan subtenon de la popolamasoj, havi armitajn fortojn kaj pafilojn, starigi revoluciajn bazojn unu post alia, kapti ŝtatpotencon parton post parto kaj fine kapti la tutlandan ŝtatpotencon.

Kaptinte ŝtatpotencon, la proletaro fariĝis la reganta klaso. Kaj la bienula klaso kaj la burĝaro fariĝis la regataj. La bienula klaso kaj la reakcia burĝaro neniel voluntas esti regataj aŭ estingiĝi. Ili ĉiam sonĝas pri restariĝo kaj pri renverso de la proleta dikta-

turo, kun intenco refoje rajdi sur la dorso de la laboranta popolo. Ili ankoraŭ havas tre grandan forton, ili havas monon, vastajn sociajn rilatojn kaj internaciajn rilatojn kaj kontraŭ-revolucian sperton. Precipe, la ideologio de ekspluatantaj klasoj ankoraŭ havas tre grandan merkaton. Iuj nefirmaj elementoj en la revolucia vicaro povas esti koruptitaj de tiu ideologio kaj sekve eĉ povas fariĝi kontraŭ-revoluciuloj. Kaj krome, la spontanea influo de la etburĝaro ĉiuhore, ĉiuminute naskas kapitalismon. Kaptinte ŝtatpotencon la proletaro ankoraŭ frontas al la danĝero perdi ĝin. Post la establiĝo de la socialisma sistemo ankoraŭ ekzistas la danĝero de kapitalisma restariĝo. Sen serioza atento pri tio kaj alprenado de necesaj rimedoj, niaj partio kaj lando ŝanĝos sian koloron kaj milionoj kaj milionoj da niaj popolanoj perdos sian vivon.

Burĝa kaj feŭdisma ideologioj estas unu el la plej gravaj pozicioj de la renversitaj bienula klaso kaj burĝaro post la socialisma transformado de la posedanteco de produktaj rimedoj. Ili agadoj de restariĝo unue direktiĝas al kupto de ideologio kaj uzo de iliaj dekadencaj ideoj en ĉiu ebla maniero por trompi la popolamasojn. La kupto de ideologio kaj la formado de publika opinio estas la preparo de la burĝaro por renversi la proletan diktaturon.

Kiam la ŝanco maturiĝos, ili okazigos ŝtatrenverson en tiu aŭ alia maniero por kapti ŝtatpotencon.

Post la establo de socialismaj rilatoj de produkto, Sovetunio ne serioze efektivigis proletan kulturen revolucion. Burĝa ideologio inundis tagon post tago, koruptante la mensojn de homoj kaj preskaŭ nepercepteble subfosante la socialismajn rilatojn de produkto. Post la forpaso de Stalin, la ĥruŝčov-reviziisma kliko des pli malkaŝe fabrikis kontraŭrevolucion publikan opinion. Post nelonge, tiu kliko okazigis "palacan" ŝtatrenverson por renversi la diktaturon de la proletaro kaj uzurpis partian, armean kaj registaran potencon.

En la hungara kontraŭrevolucia incidento en 1956, la kontraŭrevoluciuloj ankaŭ preparis unue publikan opinion, kaj poste, irinte al la stratoj, ili kreis malordojn kaj okazigis tumultojn. Tiu kontraŭrevolucia incidento estis ellaborita de imperiismo kaj lanĉita de grupo da kontraŭkomunismaj intelektuloj de la Petofi-Klubo. Imre Nagy, kiu en tiu tempo ankoraŭ portis montrotabulon de komunisto, estis "vestita en reĝa robo" kaj fariĝis la ĉefo de la kontraŭrevoluciuloj.

La historia sperto de la diktaturo de la internacia proletaro montras al ni, ke tiu diktaturo ne povas esti firmigata kaj la socialisma sistemo ankaŭ ne povas esti firmigata, se la proleta kultura revolucio ne estos kondukata kaj la elradiko de burĝa ideologio ne estos persiste farata. La libera inundo de burĝa ideologio nepre kondukos al renverso de la diktaturo de la proletaro kaj la apero de tiaj reprezentantoj de la burĝaro kia Ĥruŝčov, kiuj kaptos ŝtatpotencon per "palaca" ŝtatrenverso aŭ milita ŝtatrenverso, aŭ kombino de ambaŭ. Por firmigi la proletan diktaturon, por disvolvi iun landon sub la proleta diktaturo laŭ la socialisma kaj komunisma direkto, la proleta kultura revolucio estas nepre necesa, la proleta ideologio devas esti starigita kaj la burĝa ideologio eliminata, la ideologiaj radikoj de reviziismo devas esti komplete eltiritaj, kaj la radikoj de marksism-leninismo

kaj la penso de Maŭ Zedong devas esti firme enplantitaj.

La socialisma revolucio kaj socialisma konstruo postulas energian laboron en diversaj flankoj. Tra tiuj laboroj devas kuri ruĝa linio, kiu estas nenio alia ol la klasbatalo inter la proletaro kaj la burĝaro, la batalo inter la socialisma kaj kapitalisma vojoj, kaj la klasbatalo inter la proletaro kaj la burĝaro en la kampo de ideologio.

Kamarado Maŭ Zedong nin instruas:

La klasbatalo inter la proletaro kaj la burĝaro, la klasbatalo inter diversaj politikaj fortoj kaj la klasbatalo inter la proletaro kaj la burĝaro en ideologia kampo estos ankoraŭ longdaŭraj, zigzagaj kaj iam eĉ tre akraj. La proletaro volas transformi la mondon laŭ sia mondkoncepto, ankaŭ la burĝaro volas tion fari laŭ la sia. En tiu ĉi rilato, estas ankoraŭ ne vere solvita la problemo, kiu venkos kiun, inter socialismo kaj kapitalismo. (Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo)

La celo de la proleta kultura revolucio estas solvi la problemon "kiu venkos kiun" en la ideologia kampo inter la proletaro kaj la burĝaro. Tio estas longdaŭra, malfacila historia tasko kiu kuras tra ĉiuj laboroj.

Iuj kamaradoj rigardas la polemikon en la gazetaro inter la proletaro kaj la reakcia burĝaro kiel "bagatelaĵon, argumentadon sur papero" de literaturuloj. Iuj kamaradoj, mergitaj en

Responde al la alvoko de CK de KPCĉ pri grandkvanta eldono de la verkoj de Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de presejoj plenumas siajn laborojn kun plej granda entuziasmo, laŭ plej altaj normoj, en plej bona kvalito kaj plej alta rapideco, por sendi ilin al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.



sia laboro, ne zorgas pri la batalo sur la ideologia kaj kultura frontoj, ne atentis la klasbatalon en la ideologia kampo. Tio estas absolute erara kaj ekstreme danĝera. Se burĝa ideologio estas permesata libere inundi, rezulte la proleta diktaturo fariĝos burĝa diktaturo, kaj la socialisma sistemo fariĝos kapitalisma sistemo, aŭ duonkolonia kaj duonfeŭda sistemo. Ni devas kriegi al tiuj kamaradoj: Kamaradoj! La malamikoj akriĝas sian glavon, volas fortranĉi niajn kapojn kaj renversi nian ŝtatpotencon, kial vi rigardas sed ne vidas, aŭskultas sed ne aŭdas?

Kaptado kaj firmigado de ŝtatpotenco ambaŭ dependas tiel de plumo kiel de pafilo. Por defendi kaj disvolvi la revolucionan aferon, ni devas ne nur firme teni la pafilon sed ankaŭ ekpreni la proletan plumon por forbalai la plumon de la burĝaro. Nur forbalante la burĝan ideologion, ni povas firmigi la proletan ŝtatpotencon kaj pli firme teni la proletan pafilon.

Rigardante la klasbatalon sur la ideologia kaj kultura frontoj, oni estas surprizata kaj skuata ĝis la animo.

La batalo sur la ideologia kaj kultura frontoj inter la proletaro kaj la burĝaro, inter marksismo kaj kontraŭ-marksismo, neniam ĉesis eĉ unu momenton post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Post la starigo de socialismaj rilatoj de produkto, tia klasbatalo en la ideologia kampo fariĝis pli profunda, pli kompleksa kaj pli akra.

En 1957, la burĝaj dekstruloj lanĉis frenezan atakon kontraŭ la Partio kaj socialismo. Antaŭ ol la alianco de la reakciaj politikistoj estrataj de Ĝang Bo-gjun kaj Luo Longgi venis malkaŝe en tiu ofensivo, la intelektuloj de la dekstra alo de la burĝaro disĵetis grandnombrojn da venenaj herbaĉoj, unu post alia eliĝis nombroj da kontraŭrevoluciaj ideoj, politikaj programoj, filmoj kaj noveloj. Evidente, ĉiuj ĉi tiuj estas preparo de publika opinio por kapti ŝtatpotencon fare de la burĝaj dekstruloj.

Sub la saĝa gvido de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, la ĉina popolo repuŝis la frenezan ofensivon de la burĝaj dekstruloj kaj akiris gravan venkon sur la politika kaj ideologia frontoj.

En 1958, sub la brilo de la granda ruĝa standardo de la ĝenerala linio de socialisma

konstruado, la ĉina popolo kun senlimaj entuziasmo kaj energio komencis antaŭensaltegon en diversaj batalfrontoj kaj vaste starigis la popolajn komunumojn. Samtempe, la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj arde kaj kreive studis kaj aplikis la verkojn de Prezidanto Maŭ. Ankaŭ sur la ideologia kaj kultura frontoj komenciĝis revolucio.

Dum la periodo de 1959 ĝis 1962, nian landon trafis portempa ekonomia malfacilo pro la subfosado de la reviziistoj de Sovetunio kaj pro la serioza natura katastrofo en tri sinsekvaj jaroj. La revolucionan ĉinan popolon ne timigis la malfacilo. Sub la saĝa gvido de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, la ĉina popolo diligente kaj penegis laboris por prosperiĝo kaj potenciĝo. Post kelkaj jaroj, la malfacilo estas konkerita kaj bonega situacio aperis. Tamen dum tiuj kelkaj jaroj de ekonomia malfacilo, diabloj kaj demonoj aperis unuj post aliaj, la atako kontraŭ la Partio kaj socialismo fare de reakcia burĝaro atingis ekstreme furiozan gradon.

En la kampo de filozofia studo, Jang Hianĝen senbride propagandis la absurdaĵon, kiu neas la identecon de ideologio kaj estado, por malkuraĝigi subjektivan iniciativon de la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj kontraŭi la antaŭensaltegon. Tuj poste, Jang Hianĝen elvenis kun la tezo "kuniĝo de du en unu" por liveri filozofian "bazon" por la ekstreme reakcia politika linio, tiel de "paco" kun imperiismo, reakciuloj kaj moderna reviziismo, kaj malmulto da subteno al la revoluciaj bataloj de diverslandaj popoloj, kiel ankaŭ de la plivastigo de parceloj por privata uzo kaj de liberaj merkatoj, la pliigo de etaj entreprenoj mem respondecaj pri la propraj profitoj aŭ perdoj, kaj la fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado. La tiel nomataj "aŭtoritatuloj" reprezentantaj la burĝaron, kiuj enŝteliĝis en la Partion, oponis la kreivajn studadon kaj aplikadon de la verkoj de Prezidanto Maŭ fare de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, freneze svingante la tri bastonojn de "vulgareco", "trosimpligo" kaj "pragmatismo". Uzante siajn oficojn kaj rajtojn ili malpermesas la gazetaron publiki la filozofiajn traktatojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Samtempe, sub la nomo de studo de la historio de filozofio, iuj burĝaj

“specialistoj” senbride predikis “liberecon, egalecon kaj fratecon”, senbride laŭdaĉis Konfucion kaj per ĉi tiu kadavro predikis kompleton da burĝaj vidpunktoj.

En la kampo de ekonomiko, Sun Jefang kaj aliaj elmetis kompleton da reviziismaj absurdaĵoj. Ili oponis meti la penson de Maŭ Zedong kaj politikon en komandon, sed pledis por meti profiton kaj bankbileton en komandon. Ili vane provis ŝanĝi la socialismajn rilatojn de produkto kaj turni la socialismajn entreprenojn en la kapitalismajn.

En la kampo de historia studo, aro da burĝaj “aŭtoritatuloj” senbride atakis la revolucion de historia studo komenciĝintan en 1958. Ili oponis meti marksism-leninismojn kaj la penson de Maŭ Zedong en komandon en historia esploro kaj predikis, ke historiaj materialoj estas ĉio. Ili oponis la klasbatalan teorion de marksism-leninismo per la tiel nomata “historiismo”. Ili ege malamis la revoluciajn laborantojn de historio, kiuj kritikis imperiestrojn, reĝojn, generalojn kaj ministrojn kaj elstarigis kamparanojn kaj la militojn de kamparanoj. Dum ili prikantis imperiestrojn, reĝojn, generalojn kaj ministrojn ĝis senkompara grado, ili plejeble kalumniis la kamparanojn kaj la militojn de kamparanoj. Ili estas burĝaj “rojalistoj” en la kampo de historia studo. Iuj el ili estas kontraŭkompartiaj veteranoj. Tiaj estas Vu Han kaj Gian Bozan.

En la kampo de literaturo kaj arto, burĝaj reprezentantoj tutforte predikis kompleton da reviziisma literatura kaj arta linio por kontraŭbatali la literaturan kaj artan linion de Prezidanto Maŭ, kaj energie predikis sian tiel nomatan tradicion de la tridekaj jaroj. Tipaj estas iliaj teorioj kiaj “skribo de la vero”, “larĝa vojo de realismo”, “profundiĝo de realismo”, opono al “subjekto kiel decida faktoro”, “mezaj personoj”, opono al “pulvodoro”, “kuniĝo de diversaj tendencoj kiel la spirito de la epoko”, “forlaso de la klasikaĵo kaj ribelo kontraŭ la ortodokso” ktp. ktp. Sub la “gvido” de tiuj teorioj, aperis aro da malbonaj, kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj teatraĵoj, filmoj, romanoj kaj noveloj, filmhistorioj, literaturaj historioj.

En la kampo de eduko, burĝaj reprezentantoj energie oponis la edukan orientilon

elmetitan de Prezidanto Maŭ, kiu celas ebligi ĉiujn edukatojn disvolviĝi morale, intelekte kaj korpe kaj fariĝi kulturitaj laboruloj kun socialisma konscio. Ili energie oponis la edukan sistemon duonlaboran kaj duonlernan, predikis kompleton da reviziismaj edukaj “teorioj” kaj sistemoj de Sovetunio. Ili mortbarakte penis gajni de ni la junan generacion, vane intencante kulturigi ĝin en daŭrigantojn de la burĝaro.

En la kampo de ĵurnalismo, la burĝaj reprezentantoj energie klopodis oponi la gvidan rolon de novaĵoj, sed pledis por la burĝa koncepto de “komuniko de scioj”. Ili vane klopodis sufoki la gvidon de marksism-leninismo, de la penso de Maŭ Zedong en ĵurnalisma laboro, vane intencante permesi burĝan kontrabandon libere inundi kaj forkapti nian ĵurnalisman pozicion.

En la kontraŭfluo, la kontraŭpartia kliko “Trifamilia Vilaĝo” estas plej reakcia kaj plej furioza. Iliaj pozicioj estis multaj, kiaj ĵurnaloj, gazetoj, tribunoj kaj eldonejoj. Iliaj longaj brakoj etendiĝis en ĉiujn angulojn de la kultura kampo kaj ili uzurpis parton da gvid-rajto. Ilia reakcia politika flaro estis plej akra kaj iliaj verkoj plej ĝustatempe respondis al reakcia politika vetero. Havante direktadon, organizon, planon kaj celon, ili faris preparon de publika opinio por restarigi kapitalismon kaj renversi la proletan diktaturon.

En la kontraŭfluo, la burĝaj reprezentantoj enŝteliĝintaj en la Partion ludis la ĉefan rolon. Ili svingis “ruĝan flagon” por oponi la ruĝan flagon kaj oponis marksism-leninismojn kaj la penson de Maŭ Zedong sub la mantelo de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong. Ili ornamis sin kiel “aŭtoritatulojn” en marksismo kaj en klarigo de la politikoj de la Partio kaj tiel senbride disvastigis venenon kaj trompis la amason. Uzante siajn oficojn kaj rajtojn ili unuflanke liberigis grandan nombron da diabloj kaj demonoj, aliflanke subpreminte la rebaton de la proletaj maldekstruloj. Tiuj estas manpleno da intrigistoj, kiuj kaŝis sin post signotabulo de komunismo por kolporti kontraŭpartian kaj kontraŭsocialisman venenon. Tiuj estas aro da plej danĝeraj personoj.

Ni senĉese kondukis rebaton kontraŭ la atakoj lanĉitaj de la burĝaro ekde 1959. Pre-

cipe depost la lasta novembro kiam kamarado Jaŭ Venjuan publikis sian artikolon “Kritiko pri Nove Verkita Historia Dramo *Deoficigo de Haj Ŝuj*” kaj eksonis la klariono de la granda proleta kultura revolucio, amasa kontraŭatako al la burĝa atako estis ekdisvolvita.

En tiu ĉi kontraŭatako la politika konscio de vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, vastaj amasoj de revoluciaj kadroj kaj vastaj amasoj de revoluciaj intelektuloj leviĝis al senprecedenca nivelo kaj ilia batala forto ege pliiĝis. La bataloj fare de la amasoj frakasis kaj elradikigis la kontraŭpartian klikon de “Trifamilia Vilaĝo”. Ĝiaj radikoj kuŝas nenie alie ol en la antaŭa Pekina Urba Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma nigra linio trakuris la gvidantecon de la antaŭa Pekina Urba Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Iuj el ĝiaj ĉefaj respondecaj membroj ne estas marksist-leninistoj, sed reviziistoj. Ili okupis kaj kontrolis multajn poziciojn kaj instrumentojn kaj efektivigis diktaturon super la proletaro. Ili estis kliko de karieristoj kaj konspirantoj. Ilia komploto estis malkovrita

La ruĝaj gvardianoj de la Ruĝgvardia Batala Lernejo (antaŭe la Dependanta Mezlernejo de Kinghua Universitato) serioze studas la Decidon pri la granda proleta kultura revolucio faritan de CK de KPC kaj decidas nepre agi laŭ ĝi por puŝi la batalŝtormon kontraŭ la malnovaj ideoj, kulturo, moroj kaj kutimoj al nova alto kaj konduki la grandan proletan kulturalan revolucion ĝis la fino.



kaj ili malvenkis. La Centra Komitato de nia Komunista Partio de Ĉinio reorganizis la Pekinan Urban Komitaton kaj starigis la novan. Tiu ĉi decido estis tre saĝa kaj absolute korekta. Tio estis nova venko de la penso de Maŭ Zedong.

Post kiam ni lanĉis grandskalan kontraŭatakon lastjare, la reprezentantoj de la burĝaro, enŝteliĝintaj en la Partion kaj svingantaj “ruĝan flagon” por oponi la ruĝan flagon, falis en absolutan konfuzon. Ili haste alvokis kvin “talismanojn” por subteni kaj ŝirmi la burĝajn dekstrulojn kaj subpremi kaj ataki la proletajn maldekstrulojn.

Unu el tiuj “talismanoj” nomiĝis “plena malfermo”.

Tiuj reprezentantoj de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion kaj svingis “ruĝan flagon” por oponi la ruĝan flagon, plenenergie distordis la orientilon de la Partio pri “plena malfermo”, forigante ĝian klasan enhavon kaj distordante ĝin en burĝan liberalismon. Ili permesis nur la burĝajn dekstrulojn “laŭte paroli” kaj ne permesis la proletajn maldekstrulojn partopreni la konteston. Ili permesis nur la burĝajn dekstrulojn fari atakon kaj ne permesis la proletajn maldekstrulojn kontraŭataki. Ili lasis la dekstrulojn “malfermi” tiel senbride kiel la lastaj povis, dum ili aŭ prokrastis la publikigon de kontraŭatakaj manuskriptoj skribitaj de la maldekstruloj aŭ devigis la aŭtorojn ilin reskribi en la lumo de iliaj dekstraj ideoj. Ili diris, ke la dramo *Deoficigo de Haj Ŝuj* ne devas esti kritikata el politika vidpunkto, alie tio malhelpos la “plenan malfermon” kaj oni ne kuraĝos paroli. Sinjoraj moŝtoj, ni volus demandi ĉu ankoraŭ malmulte vi “malfermis”? Ĉu vi ne atakis la Partion politike, svingante vian glavon kaj tirante vian pafarkon? Kial vi ne permesis la proletaron fari “plenan malfermon”, ne permesis ĝin kontraŭataki la burĝajn dekstrulojn politike? Fakte, via “plena malfermo” ja estas por lumigi verdan lampon al ĉiuj burĝoj por permesi trairon kaj lumigi ruĝan lampon al la proletaro por ĝin deteni.


Alia “talismano” nomiĝis “konstruo antaŭ detruo”.

Sin ŝajnigante “dialektikistoj”, tiuj reprezentantoj de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion kaj svingis “ruĝan flagon” por oponi la ruĝan flagon, bruege kriaĉis pri “konstruo

antaŭ detruo”, kiam la proletaro rebatis la atakon de la burĝaro. Sub la preteksto de “konstruo antaŭ detruo”, ili ne permesis la proletaron detrui burĝan ideologion kaj ataki la reakcian politikan citadelon de la burĝaro. “Konstruo antaŭ detruo” estas kontraŭ dialektiko kaj kontraŭ la penso de Maŭ Zedong. Kamarado Maŭ Zedong konstante instruas al ni, ke ne estas konstruo sen detruo. Ni ĝuste devas veni unue al detruo. Detruo signifas revolucion, signifas kritikon. Detruo necesigas rezonadon, kaj tio ampleksas konstruon. Marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong ambaŭ estas disvolvitaj en la batalo por detrui burĝan ideologion, dekstran oportunismon kaj “maldekstran” oportunismon. Historia dialektiko estas nenio alia ol detruo antaŭ konstruo kaj konstruo en la procezo de detruo. Ĉu ne estas konstruo marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong — la plej granda vero en la homa historio? Ni volus demandi burĝajn sinjorojn, kion vi volas konstrui? Evidente, vi permesas konstrui nur burĝan reakcian ideologion kaj ne proletan revolucion ideologion. Kiam, uzante marksism-leninismon kaj la penson de Maŭ Zedong, la proletaro nerezisteble kontraŭatakis la burĝaron kaj komencis batali por forte detrui burĝan ideologion, via bruega kriaĉo “konstruo antaŭ detruo” estis ĝuste por protekti la dekstrulojn kaj malpermesi la maldekstrulojn kontraŭataki. Tio estis ja kontraŭ la proleta kultura revolucio.

La tria “talismano” nomiĝis opono kaj prevento kontraŭ “maldekstraj klerul-tiranoj”.

Ĉiam kiam la proletaj maldekstruloj kontraŭatakis la burĝaron, tiuj reprezentantoj de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion kaj ŝvingis “ruĝan flagon” por oponi la ruĝan flagon, sub la diversspecaj pretekstoj ke oni devas esti “detalemaj” kaj “profundaj” ktp., kondamnis la maldekstrulojn kiel “krudulojn” kaj “bastonegojn”. Antaŭ la granda kontraŭatako kontraŭ la burĝa ofensivo, ili uzis ankaŭ la “talismanon” de opono kaj prevento de “maldekstraj klerul-tiranoj” kun vana provo subigi la proletajn maldekstrulojn kaj ilin subpremi. Tio estas neniam farebla. Ni diras, ke la etikedo de “klerul-tiranoj” perfekte taŭgas al vi, burĝaj reprezentantoj kaj burĝaj “akademiaj aŭtoritatuloj” tiel nomataj. Ĝuste vi sinjoraj moŝtoj, kiuj enŝteliĝis en la Partion kaj ŝirmis



Veterana laboristo Ĝang Ŝihan (meze), kiu partoprenis la grandan strikon de la 7-a de februaro, 1923 varme konversacias kun la ruĝaj gvardianoj de la urbo Vuhan. Li esprimis firman subtenon al la revolucia agado de ruĝaj gvardianoj kaj sian deziron lerni de ili la revolucion ribeleman spiriton.

kaj subtenis la burĝajn klerul-tiranojn, estas la grandaj partio-tiranoj kaj grandaj klerul-tiranoj, kiuj ne legas la ĵurnalojn kaj librojn, sin apartigas de la amaso, havas nenian scion kaj uzas sian potencon por subpremi aliajn. La proletaj maldekstruloj ĉiam persistas en la vero de marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong, kaj ĉiam fidas al sciencaj rezonado kaj argumentado en kritikado de burĝa ideologio. La proletaj maldekstruloj havas nenion komunan kun “klerul-tiranoj”. Ni nepre kondukos kondamnan kampanjon kun rulantaj tamburoj kaj flirtantaj standardoj kontraŭ la burĝaj “klerultiranoj” kaj vi, manpleno da grandaj partiotiranoj kaj klerul-tiranoj. Ni diras al vi sinjoraj moŝtoj, kiuj kalumniis la maldekstrulojn kiel “bastonegojn”, ke la maldekstruloj estas la ŝtala bastonego, la ora bastonego de la proletaro. Kaj ni ja uzos tian bastonegon por frakasi la malnovan mondon en pecetojn, faligi vin manplenen da grandaj partio-tiranoj kaj klerul-tiranoj kaj detrui vian submondan reĝlandon. Tio estas nomata la diktaturo de la proletaro.



La popolkomunumanoj de la ĉirkaŭurbo de Pekino alportas ĝojesperiman skribon al CK de la Partio kun gongado kaj tamburado por esprimi sian varman subtenon al la Decido kaj Komuniko de la 11-a Plena Sesio de la 8-a CK de KPĈ.

Alia “talismano” nomiĝis “pure akademia diskuto”.

Tiuj reprezentantoj de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion kaj svingis “ruĝan flagon” por oponi la ruĝan flagon, priskribis la klasan batalon en la kampo de ideologio kiel la tiel nomatan “pure akademian diskuton”, por kaŝi la atakon de la burĝaj dekstruloj kontraŭ la Partio kaj socialismo unuflanke, kaj por subpremi la kontraŭatakon de la proletaj maldekstruloj aliflanke. Ni volus demandi tiujn sinjorajn moŝtojn: Ĉu efektive troviĝas io ajn akademia en la verko “Haj Ŝuj Insultas la Imperiestron” kaj en la dramo *Deoficigo de Haj Ŝuj* verkita de Vu Han, kaj en la kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj nigraj paroloj de Deng Tuo, Liaŭ Moŝa kaj similaj? La tiel nomata “pure akademia diskuto” estas trompo de la burĝaro ofte ludata. Ne ekzistas io ajn “pure akademia” en klasa socio; ĉio ajn akademia estas bazita sur la mondkondepto de certa klaso, estas subigita al politiko kaj servas al la politiko kaj ekonomio de certa klaso iel aŭ aliel. En ĉifoja grand-skala kontraŭofensivo, la reprezentantoj de la burĝaro supren tenis la “talismanon” de la tiel nomata “pure akademia diskuto” kaj oponis elstarigon de politiko, por kovri la ŝlosilan politikan problemon koncernantan al la kontraŭpartia nigra bandit-gastejo “trifamilia vilaĝo” aŭ “kvarfamilia vilaĝo” kaj similaj, por elstarigi la burĝan politikon kaj oponi la elstarigon de proleta politiko, kaj por tiri

ĉifojan grandan batalon dekstren kaj turni ĝin sur trakon de reviziismo.

Ankoraŭ alia grava “talismano” nomiĝis: “antaŭ la vero ĉiuj estas egalaj”, “ĉiu havas sian parton de eraraj asertoj” kaj “ĉio en miksbatalo”.

En ĉifoja grand-skala kontraŭofensivo fare de la proletaro kontraŭ la burĝaro, tiuj reprezentantoj de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion kaj portis antaŭ si “ruĝan flagon” por oponi la ruĝan flagon, manipulis tiun “talismanon”, unuflanke, por igi siajn proprajn homojn alkroĉi al siaj postenoj kaj ne retroiri unu colon kaj aliflanke por krei ĥaoson, ke ili povu fiŝi en malklara akvo kaj atendi ŝancon por kontraŭataki.

“Antaŭ la vero ĉiuj estas egalaj”, tio estas pure burĝa slogano, kiu estas tute hipokrita. Neniel povas ekzisti ia egaleco inter kontraŭstarantaj klasoj. Vero havas sian klasan naturon. En la nuna epoko, nur la proletaro sola povas mastri objektivan veron, ĉar ĝiaj klasaj interesoj estas komplete konformaj al la objektivaj leĝoj. La reakcia kaj putra burĝaro antaŭlonge jam estis disigita de la vero. Ilia tiel nomata “vero” povas esti nenio alia ol absurdaĵo kontraŭa al la epoka tajdo kaj la objektivaj leĝoj. Absolute ne povas ekzisti ia ajn egaleco inter la proletaro kaj la burĝaro, inter proleta kaj burĝa ideologioj kaj inter proleta vero kaj burĝa absurdaĵo. La sola problemo implicita estas, ĉu la okcidenta vento superas la orientan aŭ inverse. Ĉu ia ajn egaleco povas esti per-

Miliona revolucia amaso en Ŝanhajo plej varme vivuas al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj ĝojkrias pri la granda sukceso de la proleta kultura revolucio.



mesata pri tiaj bazaj problemoj kiel la batalado de la proletaro kontraŭ la burĝaro, la diktaturo de la proletaro super la burĝaro, la diktaturo de la proletaro en la sfero de la superstrukturo inkluzive la diversajn kampojn de kulturo, kaj la kontinua purigado fare de la proletaro kontraŭ la reprezentantoj de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Komunistan Partion kaj svingas “ruĝan flagon” por oponi la ruĝan flagon ktp.? La malnovaj social-demokratoj dum la pasintaj kelkdek jaroj kaj la moderna reviziismo dum la lastaj dekelkaj jaroj neniam permesis la proletaron ĝui egalecon kun la burĝaro. La reprezentantoj de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion, elmetis la sloganon “antaŭ la vero ĉiuj estas egalaj” por subteni kontraŭpartiajn kaj kontraŭsocialismajn elementojn, kaj subpremi la kontraŭatakon de la maldekstruloj. Ni volus demandi tiujn sinjorajn moŝtojn, ĉu vi ne ĉiam babilaĉas pri egaleco? Kial do vi rifuzis publikigon de artikoloj skribitaj de maldekstruloj kaj permesis nur al la dekstruloj publiki siajn multnombrajn venenajn herbaĉojn? Kia egaleco tio estas? Ni devas diri al vi malkaŝe: Ni absolute ne permesos vin ĝui ian ajn egalecon kun la proletaro. Nia batalo kontraŭ vi estas viv-morta. Kontraŭ vi kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj nigraj bandoj ni povas praktiki nur diktaturon.

La argumento ke “ĉiu havas sian parton en eraraj asertoj”, kaj “ĉio en miksbatalo”, estas granda intrigo. Ni diras, ke antaŭ

ĉio oni devas streki klaran limlinion inter klasoj, inter revolucio kaj kontraŭrevolucio. En la procezo koni objektivajn aferojn la revoluciaj maldekstruloj povas fari eraron tian aŭ alian, sed tio estas radikale malsama ol kaj ne devas esti miksa kun la kontraŭpartiaj, kontraŭsocialismaj kaj kontraŭrevoluciaj paroloj kaj agadoj de la burĝaj dekstruloj. En la nuna granda kultura revolucio la ĉefa kontraŭdiro estas la antagonisma kontraŭdiro inter la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, de revoluciaj kadroj kaj de revoluciaj intelektuloj unuflanke, kaj vi, manpleno da reprezentantoj de la burĝaro kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj, aliflanke. Tio estas kontraŭdiro inter revolucio kaj kontraŭrevolucio, neakordigebla kontraŭdiro inter malamikoj kaj ni mem. Rilate al ĉiuj viaj kontraŭrevoluciaj paroloj kaj agadoj, ni nepre devas submeti ilin sub senkompatan kritikon, kaj sonigi la bataltamburon por ataki. Ĝeneralaj burĝaj akademiasaj ideoj estas, kompreneble, kritikotaj, sed tio estas malsama ol la traktado al kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj elementoj kiaj vi. En traktado al ordinariaj burĝaj instruituloj, ni daŭre provizos al ili konvenajn kondiĉojn de laboro kaj permesos ilin senĉese reformi sian mondkoncepton en la procezo de laboro, kondiĉe ke ili ne oponas la Komunistan Partion kaj la popolon. Kiam ni rebatis la atakon de la burĝaro, la reprezentantoj de la burĝaro enŝtelintaj en nian partion bruege kriaĉis ke “ĉiu havas sian parton

en eraraj asertoj” kaj “ĉio en miksbatalo” kun nenia alia celo ol firme kapti la maldekstrulojn, malklarigi la akvon, krei grandan ĥaoson kaj venĝi sin. Tio ja estis vana peno. Ni nepre agas laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ kaj faras distingon inter la maldekstra, la meza kaj la dekstra; ni nin apogas sur la maldekstruloj, batas la dekstrulojn kaj batalgajnas, unuigas kaj edukas la plejmulton por fari la grandan proletan kulturalan revolucion ĝis la fino.

Ĉiuj tiuj “talismanoj” de la burĝaj reprezentantoj, kiuj enŝteliĝis en nian partion kaj svingis “ruĝan flagon” por oponi la ruĝan flagon, estis ĉiuj direktitaj al unu celo, t. e., praktiki diktaturon super la proletaro. Ili jam uzurpis partan gvidantecon kaj praktikis diktaturon super ni en diversaj kampoj de kulturo. Ni nepre devas rekapti tiujn poziciojn kaj faligi ĉiujn ĉi tiujn reprezentantojn de la burĝaro.

Plej frapa trajto de la burĝaj reprezentantoj kiuj enŝteliĝis en nian partion estas oponi la ruĝan flagon svingante “ruĝan flagon”.

Kiel ni povas ilin rekoni? La nura metodo estas “legi verkojn de Prezidanto Maŭ, sekvi liajn instruojn kaj agi laŭ liaj instrukcioj”.

La penso de Maŭ Zedong estas la kulmino de marksism-leninismo en la nuna epoko, ĝi estas la plej alta kaj plej viva marksism-leninismo en la nuna epoko. La teorio kaj praktiko de kamarado Maŭ Zedong similas al la suno kaj luno irantaj sur la ĉielo kaj la riveroj kaj riveroj fluantaj sur la tero. La verkoj de kamarado Maŭ Zedong estas la plej alta instrukcio por ĉiuj niaj laboroj. La akvodivida montkresto inter marksism-leninismo kaj reviziismo, inter revolucio kaj kontraŭrevolucio, kuŝas en tio, ĉu oni subtenas la penson de Maŭ Zedong kaj agas laŭ ĝi aŭ rezistas kontraŭ la penso de Maŭ Zedong kaj rifuzas agi laŭ ĝi.

Ni aprobas kaj subtenas ĉion kio estas konforma al la penso de Maŭ Zedong. Ni sentime kontraŭbatalos kaj renversos ĉiun kiu oponas la penson de Maŭ Zedong, tute egale kiel altan pozicion li okupas kaj kiel grandan “famon” kaj “aŭtoritaton” li ĝuas.

Tiuj reprezentantoj de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion, aspektas kiel “koloso”. Sed fakte, same kiel ĉiuj reakciuloj, ili estas nur papertigroj.

La penso de Maŭ Zedong estas direktilo, kaj la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estas la ĉefa forto en la proleta kultura revolucio. Kun tiu direktilo kaj tiu ĉefa forto, ni certe povas renversi ĉian ajn monstron aŭ diablon, kaj gajni unu venkon post alia en la proleta kultura revolucio.

Kun malica ĝojo, la bienuloj, riĉkamparanoj, kontraŭrevoluciuloj, malbonaj elementoj kaj dekstruloj enlandaj kaj imperiistoj kaj reviziistoj eksterlandaj opinias, ke ili povas gajni ian profiton el tio, kiam ni senmaskigas kaj kritikis la kontraŭpartian klikon “Trifamilia Vilaĝo”. Ni devas diri al la reakciuloj enlandaj kaj eksterlandaj: Vi ja estas eĉ pli stultaj ol azeno! Senmaskigi kaj kritiki la kontraŭpartian klikon de la “Trifamilia Vilaĝo” kaj forbalai ĉiujn diablojn kaj demonojn ja ĝuste celas elimini viajn agentojn en la interno de nia partio kaj nia ŝtato, forigi la “fikstempa-bombon” sur kiun vi metas vian esperon. Kun la pli profunda disvolviĝo de la granda proleta kultura revolucio, ni enplantos la penson de Maŭ Zedong ankoraŭ pli firme inter la popolo de la tuta lando kaj komplete elfosos la radikojn de reviziismo kaj de la restarigo de kapitalismo. Historio senkompate mokos vin stultajn azenojn.

Plie, la reakciuloj enlandaj kaj eksterlandaj kalumnias nin per tio, ke ni batas ĉiujn intelektulojn. Jen pura sensencaĵo. La batala lancpinto de la granda proleta kultura revolucio de nia lando estas direktata kontraŭ manpleno da malbonuloj, kiuj pendigis montrotabulon de komunismo, sed kolportis siajn kontraŭkompartiajn varojn, kaj estas direktata kontraŭ manpleno da burĝaj intelektuloj kontraŭpartiaj, kontraŭsocialismaj kaj kontraŭrevoluciaj. Rilate al vastaj amasoj de intelektuloj venintaj el la malnova socio, ni aplikas la politikon de unuiĝo, edukado kaj reformo. En la granda kultura revolucio, la vicaro de proletaj intelektuloj estas ĉiam kreskanta tagon post tago.

Ĉiuj revoluciuloj, unuiĝu ankoraŭ pli firme sur la bazo de la penso de Maŭ Zedong!

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj la grandan ruĝan standardon de la granda proleta kultura revolucio, ni antaŭenmarŝu en triumfo!

Vivu la granda proleta kultura revolucio!

Forbalai Ĉiuspecajn Demonojn kaj Diablojn

Ĉefartikolo de *Popola Ĵurnalo* (1-a junio 1966)

ALTA tajdo de granda proleta kultura revolucio leviĝas en la socialisma Ĉinio, kie troviĝas kvarono de la tuta loĝantaro de la mondo.

En kelkaj mallongaj monatoj, sub la batalalvoko de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, centoj da milionoj da laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj vastaj amasoj de revoluciaj kadroj kaj intelektuloj kun la penso de Maŭ Zedong kiel armilo, forbalais grandan kvanton da diversspecaj demonoj kaj diabloj kiuj okupis ideologiajn kaj kulturajn batalpoziciojn. La batalo iris eksterordinare rapide kaj intense kvazaŭ uragano kaj pluvego, frakasis la spiritajn katenojn, kiujn la ekspluatataj klasoj trudis sur ilin de multaj multaj jaroj, kaj surteren tretis la tiel nomatajn "specialistojn", "instruitulojn", "aŭtoritatulojn" kaj "respektindajn majstrojn" de la burĝa klaso, tiel ke la prestiĝo de la lastaj estas plene debatita en polvon.

Prezidanto Maŭ instruis al ni ke klasbatalo ne ĉesas en Ĉinio post kiam la socialisma transformado de posedsistemo estas ĝenerale plenumita. "La klasbatalo inter la proletaro kaj burĝaro, la klasbatalo inter diversaj politikaj fortoj kaj la klasbatalo en la ideologia

kampo inter la proletaro kaj burĝaro estos ankoraŭ longdaŭraj, zigzagaj kaj iam eĉ tre akraj. La proletaro volas transformi la mondon laŭ sia mondkoncepto, dum la burĝaro ankaŭ volas tion fari laŭ la sia. En tiu rilato la problemoj, kiuj venkos kiun inter socialismo kaj kapitalismo, estas ankoraŭ ne vere solvitaj." La klasbatalo inter la proletaro kaj burĝaro en la ideologia kampo estas ĉiam tre intensaj de 16 jaroj post la Liberiĝo de Ĉinio. La nuna granda socialisma kultura revolucio estas nenio alia ol daŭra disvolviĝo de tiu batalo. Tiu batalo estas neevitebla. La ideologio de la proletaro kaj tiuj de ĉiuj ekspluatataj klasoj

Laboristoj de la Ginan-a Aŭto-Fabrika skribas opini-afişojn kun indigno por ataki la nigran bandon de Deng Tuo pro ĝiaj kontraŭpartiaj, kontraŭsocialismaj krimoj kaj plene frakasi la "Trifamilian Vilaĝon".



estas radikale kontraŭstaraj kaj ne povas pace kunekzisti. La proleta revolucio estas revolucio por aboli ĉiujn ekspluatajn klasojn kaj ĉiujn ekspluatajn sistemojn; ĝi estas la plej ĝisfunda revolucio kiu celas elimini paŝo post paŝo la diferencojn inter la laboristoj kaj kamparanoj, inter la urbo kaj kamparo, kaj inter la mensaj kaj fizikaj laboroj. Tio ne povas ne renkonti plej obstinan reziston de la ekspluataj klasoj.

La baza problemo de revolucio estas problemo de regpotenco. Inter ĉiuj terenoj de superstrukturo — ideologio, religio, arto, leĝo, regpotenco — la centra problemo estas regpotenco. Havi regpotencon signifas havi ĉion. Malhavi regpotencon signifas perdi ĉion. Sekve, kiom ajn multe da aferoj la proletaro havas antaŭ si por solvi post la kapto de regpotenco, ĝi devas neniam forgesi la regpotencon, neniam forgesi sian direkton kaj neniam perdi sian kernon. Forgesi regpotencon signifas forgesi politikon, forgesi la bazajn vidpunktojn de marksismo kaj transformiĝi en ekonomiismon, anarkiismon kaj utopiismon, kaj fariĝi konfuzituloj. La klasbatalo inter la proletaro kaj burĝaro en ideologia kampo, en analizo ĝis la fino, estas nenio alia ol batalo por gvidanteco. La ekspluataj klasoj estas malarmitaj kaj senigitaj je regpotenco de la popolo, sed la reakciaj ideoj restas ankoraŭ en iliaj kapoj. Ni renversis ilian regadon kaj konfiskis ilian proprajon, sed tio ne signifas ke ni konfiskis iliajn reakciajn ideojn en iliaj kapoj. Dum jarmiloj la ekspluataj klasoj superregis la laborantan popolon, ili monopoligis la kulturon kreitan de la laboranta popolo kaj returne utiligis ĝin por trompi, superruzi kaj narkoti la laborantan popolon por solidigi sian reakcian regpotencon. Dum jarmiloj ilia ideologio estis la reganta ideologio,

kiu neeviteble havas vastan influon super la socio. Post la renverso de sia reakcia regado, ili ne forlasis sian aspiron kaj ĉiam klopodas utiligi tiun sian influon el la pasinteco por prepari publikan opinion por restarigo de kapitalismo en politiko kaj ekonomio. La seninterrompa batalo en ideologia kaj kultura frontoj de 16 jaroj post la Liberiĝo ĝis la malkovro de la kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma nigra linio de grandaj kaj malgrandaj “Trifamiliaj Vilaĝoj” en tiu ĉi fojo estas batalo inter la fortoj por restarigo kaj tiuj kontraŭ restarigo.

Por kapti regpotencon, la burĝaro dum la periodo de la burĝa revolucio ankaŭ unue faris ideologiajn preparojn per entrepreno de la burĝa kultura revolucio. Eĉ la burĝa revolucio, kiu anstataŭigis unu ekspluatan klason per alia, devis trapasi ripetitajn returnojn kaj trasperti multajn batalojn — revolucion, kontraŭ-revolucian restarigon kaj tiam renverson de la restarigo. Ekde la ideologiaj preparoj ĝis la fina kapto de la regpotenco, la burĝaj revolucioj en multaj eŭropaj landoj ĉiuj daŭris plurajn jarcentojn. Rilate al la proleta revolucio, kiu estas revolucio por likvidi ĝisfunde ĉiujn ekspluatajn sistemojn, oni des pli ne povas imagi ke la ekspluataj klasoj obeeme lasos la proletan klason senigi ilin je ĉiuj iliaj privilegioj kaj ne pensos pri restarigo de sia regado. Iliaj membroj ankoraŭ vivas kaj ilia aspiro ne mortis, ili certe, kiel Lenin diris, klopodos kun dekobla furiozeco restarigi sian perditan paradizon. La fakto ke la ĥruŝĉov-reviziisma kliko uzurpis en Sovetunio la gvidantecon de la partio, armeo kaj ŝtato, estas eksterordinare serioza leciono por la tutmonda proletaro. La sonĝo kiun sonĝas nun la reprezentantaj personoj de la burĝaro, la burĝaj “instruituloj” kaj “aŭtoritatuloj”



Membroj de la Haŭĝuang-a Popola Komunumo, apud Tajjuan, Ŝanĥi-provinco, kunsidas sur kamporando por kondamni la kontraŭpartiajn kaj kontraŭsocialismajn krimojn de la nigra bando de Deng Tuo.

Batalantoj de la Tria Roto de iu bataliono de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en Nankino, kreive studas kaj aplikas la verkojn de Prezidanto Maŭ dum la granda proleta kultura revolucio, kaj decideme atakas per plumoj kaj buŝoj kontraŭ ĉiuj diabloj kaj demonoj, sur la plej antaŭa fronto por defendi la grandan penson de Maŭ Zedong.



en Ĉinio, estas precize restarigo de kapitalismo. Ilia politika regado estas jam renversita, sed ili ankoraŭ vivmorte klopodas teni sian t. n. "aŭtoritatecon" en akademiaj sferoj, krei publikan opinion por restarigo kaj transgajni de ni la amason, la junan generacion kaj la estontan generacion.

La kontraŭfeŭdisma kultura revolucio entreprenita de la burĝaro finiĝis tuj kiam la lasta kaptis al si la regpotencon. La kultura revolucio de la proletaro, tamen, estas kultura revolucio kontraŭ la ideologio de ĉiuj ekspluataj klasoj. Tiu kultura revolucio en naturo estas absolute diferenca de la burĝa kultura revolucio. Nur post la kapto de regpotenco fare de la proletaro kaj kreo de la politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj antaŭkondiĉoj, tiu kultura revolucio povas malfermi al si plej larĝan vojon.

La proleta kultura revolucio celas ĝisfunde frakasi ĉiujn malnovajn ideologiojn kaj kulturon, malnovajn morojn kaj kutimojn, kiujn la ekspluataj klasoj kreis por veneni la popolon dum jarmiloj, kaj krei kaj formi inter la vastaj popolamasoj tute novajn ideologiojn kaj kulturon, novajn morojn kaj kutimojn de la proletaro. Tiu granda afero de transformo de moroj kaj kutimoj estas senprecedenca en la homa historio. Ĉiuj heredaĵoj, moroj kaj kutimoj de la feŭda kaj burĝa klasoj devas esti ĝisfunde kritikataj laŭ la proleta mond-

koncepto. Tempo estas bezonata por plene elimini el la vivo de la popolo la malbonajn kutimojn de la malnova socio. Sed, la sperto akirita de post la Liberiĝo montras, ke la transformado de moroj kaj kutimoj povas esti akcelata, se la amasoj estas plene mobilizitaj, la amaslinio estas aplikata, kaj la transformado fariĝas efektive vasta amasmovado.

La kultura revolucio de la burĝaro servas nur al nova ekspluata klaso el malmultaj homoj, tial ĝin povis partopreni nur malmultaj homoj. La kultura revolucio de la proletaro servas al la vasta laboranta popolo kaj konformas al la intereso de la laboranta popolo, kiu konsistigas la plejparton de la tuta loĝantaro. Sekve, ĝi povas altiri kaj unuigi la vastan laborantan popolon por partopreni ĝin. La klerigantoj el la burĝa klaso ĉiam malestime rigardis la amason de alte, traktis la amason kiel malsaĝan popolaĉon kaj rigardis sin kiel memkompreneblajn mastrojn de la popolo. Tute male, la proletaj ideologiaj revolucioj plenkore kaj tutanime servas al la popolo kun la celo vekigi ĝian memkonscion kaj luktas por la intereso de la plej vasta popolamaso.

Kun sia malnobla egoismo la burĝaro ne povas subpremi sian malamon kontraŭ la popolamaso. Marks diris: "La partikulara naturo de la materialo, kiun ĝi (politika ekonomio) pritraktas, alvokas kiel malamikon al la batalkampo la plej fortan, malnoblan kaj

malican pasion de la homa brusto, la Furion de privataj interesoj.” Tiel same estas ankaŭ ĉe la renversita burĝaro.


Nun, la skalo kaj impeteco de la granda proleta kultura revolucio en nia lando estas senkompara en la homa historio. La grandeco de ĝia potenco, la forteco de ĝia impeteco kaj la senlima saĝeco de la laboranta popolo ŝprucanta en la movado ĉiuj multe superas la imagon de la sinjoraj moŝtoj de la burĝaro. Faktoj elokvente pruvas ke, tuj kiam la penso de Maŭ Zedong ektenas la amason, ĝi fariĝas spirita atombombo kun senlima potenco. Tiu granda kultura revolucio, kiu nun grandpaŝe antaŭenpuŝas la socialisman aferon de la ĉina popolo, certe ankaŭ donos netakseblan profundan kaj longatingan influon al la estanteco kaj estonteco de la mondo.

La arde disvolviĝanta granda kultura revolucio en nia lando kaŭzis panikon kaj konfuzon al la imperiistoj, modernaj reviziistoj kaj reakciuloj de ĉiuj landoj. En unu momento, ili diboĉas en sia plej kaprica fantazio, dirante ke nia granda kultura revolucio montras ke estas espero por “paca evoluo” ĉe la juna generacio de Ĉinio; en alia momento, ili fariĝas pesimismaj, dirante ke ĉiuj informoj montras ke la regado de la Komunista Partio restas ankoraŭ tre solida; kaj en plia momento, ili montriĝas senlime perpleksaj, dirante ke neniam estas troveblaj veraj “sciencoj de Ĉinio”, kiuj povus tuj fari ĝustajn juĝojn pri aferoj okazantaj en Ĉinio. Karaj sinjoroj, viaj kapricaj pensoj ĉiam iras inverse al la marŝo de historio. La disvolvo kaj venko de tiu granda proleta kultura revolucio senprecedenca en la homa historio sonigas la mortsonoron de la kapitalismaj fortoj postrestantaj sur la tero de Ĉinio kaj ankaŭ sonigas la mortsonoron de imperiismo, moderna reviziismo kaj ĉiuj reakciuloj. Ne longaj estos viaj tagoj.

Lasu nin konduki ĝis la fino la proletan kulturalan revolucion, sub la ilumino de la brilo de la granda penso de Maŭ Zedong. La venko de tiu kultura revolucio nepre fortikigos plue la proletan diktaturon de nia lando, garantios ĝisfundan plenumon de nia socialisma revolucio sur ĉiuj frontoj kaj certigos nian venkan transiron de socialismo al grandioza komunismo!



La ruĝaj gvardianoj estas revoluciaj aŭdacaj pioniroj sturmantaj ĉiujn morojn kaj kutimojn de la burĝaro. Ĉi tie en Pekino, ili serioze pristudas revoluciigajn rimedojn kune kun laboristoj de Hidan-a Unua Barbirejo, por ke la barbirejo pli bone servu al la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.



Inspirataj de la ribelema spirito de ruĝaj gvardianoj, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la magazeno “Jong An Kompanio”, Sanhajo, forigas tiun mucidan nomtabulon, kiun la kapitalistoj en la malnova socio donis al ĝi antaŭ 48 jaroj, por ŝanĝi ĝin en novan socialisman nomon kun revolucia signifo.

Pekinaj ruĝaj gvardianoj algluis opini-afisojn sur la nomtabulo de la strato proponantan ŝanĝi la stratonomon de Vangfugin en “Grandan Vojon de Revolucio”.



Kanto de Aziaj kaj Afrikaj Verkistoj pri la Penso de Maŭ Zedong el Ŝaŭŝan

EN la 21-a de julio, la aziaj kaj afrikaj geamikoj el 19 landoj kaj regionoj, kiuj ĵus ĉeestis la Urĝan Kunvenon de Azi-Afrikaj Verkistoj, vizitis Ŝaŭŝan. Kun la plej sincera sento kaj per plej vivaj vortoj ili elverŝis sian senliman amon kaj respekton al Prezidanto Maŭ kaj esprimis sian pasian deziron serĉi la revolucion veron kaj lerni sperton de revolucia batalo. Ili laŭdas Prezidanton Maŭ kiel “la plej grandan revolucion gvidanton de la nuna epoko”, “lumturon por la revolucio de la popoloj de la mondo”, kaj diras, ke “estas vera feliĉo vivi en la epoko de Maŭ Zedong”, kaj ke “la subpremataj popoloj de la mondo rigardas kamaradon Maŭ Zedong kaj la ĉinan popolon kiel la solan esperon por sia liberiĝo”. Ili varme subtenas kaj kredas la penson de Maŭ Zedong, laŭdante ke “la brilo de la penso de Maŭ Zedong lumigas ĉiujn lokojn de la tuta mondo”. Iuj amikoj diras, ke por sin liberigi “ĉiuj subpremataj popoloj de la mondo devas pli alte teni la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong”.

Estis frua mateno, kaj la tuta ĉielarkaĵo estis serena. Renkonte al la ruĝa suno leviganta en la oriento la geamikoj, kiuj venis de la fronto de batalo kontraŭ imperiismo kaj koloniismo en Azio kaj Afriko, veturis per aŭtobusoj de Ĉangŝa al Ŝaŭŝan — la hejmloko de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ. Antaŭ kelkaj tagoj, Prezidanto Maŭ intime akceptis ilin. Kiel ili povis ne ĝoji hodiaŭ, kiam ili povis plie persone viziti Ŝaŭŝan — la naskiĝlokon de kamarado Maŭ Zedong kaj sanktan lokon

sopiratan de la revoluciaj popoloj de la mondo. Dum meza somero en la suda parto de nia lando la vetero estas varmega. Tamen, la varmega vetero ne povis kompari kun la varma amo, kiun la geamikoj sentis en si por Prezidanto Maŭ. Iuj el ili estis tute malsekigitaj de ŝvito, sed ili ĉiam restis bonhumoraj kaj viglaj. Salame Oubied, siria amiko, tre emociiĝis en la antaŭvespero de la forveturo al Ŝaŭŝan. Li pripensis la demandon kiel esprimi sian respekton kaj amon al Prezidanto Maŭ. La duan tagon, post sia alveno al Ŝaŭŝan, li deklamis dum la tagmeza bankedo la poemon kiun li verkis la antaŭan vesperon por prikanti Prezidanton Maŭ. Ĉe la bankedo deklamis sian poemon ankaŭ Mohamed Dahan, delegito de Somalia Marbordo (“Franca”). La poemo inkluzivas jenajn versojn:

*Ŝaŭŝan, la hejmlok’ de Prezidanto Maŭ,
Disvastiĝis jam la pens’ de Maŭ Zedong
Tra milmiloj da vilaĝoj, tra la mond’,
Vivu l’ pens’ de Prezidanto Maŭ Zedong.*

Atinginte la malnovan loĝejon de Prezidanto Maŭ Zedong ĉirkaŭitan de verdaj pinoj kaj bambuoj, malgraŭ la varmega suno la aziaj kaj afrikaj geamikoj sen ripozo tuj faris konkure fotografadon. Ili domaĝis ĉiun herbon kaj ĉiun planton, ĉiun brikon kaj ĉiun tegolon de tiu ĉi loĝejo. Amiko el Somalia Marbordo (“Franca”), kiu la unua atingis la loĝejon, kun emocio prenis plenmanon da tero antaŭ perono kaj ĝin envolvis per naztuko, dirante: “Ni venas al la malnova loĝejo de Prezidanto Maŭ, pri tio ni sentas senkomparan honoron. En

mia hejmo mi havas buston de Prezidanto Maŭ. Mi volas kunporti tiun teron al mia hejmo kaj ĝin meti sub la buston, por montri mian amegon kaj estimon al Prezidanto Maŭ Zedong. Multaj homoj en nia hejmlando ne povas veni al Ŝaŭŝan. Tiu tero iel kontentigos ilin.”

Tre detale la aziaj kaj afrikaj geamikoj rigardis ĉiun ĉambro kaj ĉiun objekton en la malnova loĝejo de Prezidanto Maŭ. Kiam ili informiĝis pri tiuj kaj ĉi tiuj mebloj, kiuj estis uzitaj de Prezidanto Maŭ persone, multaj geamikoj ekpalpis ilin per manoj aŭ levis ilin por rigardi kun sento de estimo kaj intimeco. En la dormoĉambro de Prezidanto Maŭ, iu tanzania amiko kun profunda sento proksimiĝis al la lito. Li malpeze sidiĝis kaj petis iun ĵurnaliston bone fari por li fotografon. En la ĉambro de pistujo, mozambika amiko Absalom Bahule informiĝis de la klarigisto, ke Prezidanto Maŭ dum sia juneco ofte senbranigis rizon per la ŝtona pistilo. Tre emociite li ekpaŝis al la rizbatejo kaj piedpremis la ŝtonan pistilon. Kun senlima estimo al Prezidanto Maŭ li diris al la ĵurnalisto: “Vizitante la lokon kie laboris Prezidanto Maŭ, mi sentis ke Prezidanto Maŭ neniam sin apartigis de kamparanoj, li ja estas vera marksisto. Li estas la gvidanto ne nur de la ĉina popolo sed ankaŭ de la monda popolo. La popolo de la tuta mondo metis sian esperon sur la penson de Maŭ Zedong.”

Sur la draŝejo, multaj geamikoj estis allogitaj de la kortuŝaj rakontoj pri la juneco de Prezidanto Maŭ Zedong. La klarigisto diris al la vizitantoj: “De sia sepa jaro Prezidanto Maŭ ekpaŝtis bovon. Li lernis diligente kaj amis rakonti. Tiam, paŝtistoj paŝtis bovojn, ĉiu la sian. Tial, al ili ne estis tempo por lerni dum paŝtado. Poste venis al Prezidanto Maŭ la penso: Ĉiuj kune paŝtu, unu amiketo zorgu kelkajn bovojn, la ceteraj povas lerni aŭ falĉi herbojn, kaj ĉiuj dividi inter si la falĉitajn herbojn. Tiamaniere, ĉiuj havis sian bovon paŝtita kaj ricevis herbojn, kaj ili havis ankaŭ tempon por lerni, rakonti kaj ludi. . . Iufoje, ektorentis pluvego. Vidante ke al la naj-

baro mankas laborforto, Prezidanto Maŭ tuj helpis la najbaron forpreni grenon de sur draŝejo, tiel ke la greno de la propra familio estis malsekigita de la pluvego. . .” Aŭskultante la rakontadon, la geamikoj ĉiuj admiris la noblan pensstilon, kiun posedis Prezidanto Maŭ en sia juneco. Geamikoj el Sudokcidenta Afriko, Zimbabve, Sudano, Malajo kaj Svazilando tuj petis fotografadon por memorigo sur la draŝejo. Aŭskultinte la rakonton pri organizado de bovpaŝtistetoj fare de Prezidanto Maŭ dum sia juneco, la malaja amiko P. V. Sarma multe kortuŝiĝis, dirante: “Organizo, organizo, ĉiuj aferoj devas esti farataj en organizo.”

La vizito al la malnova loĝejo de Prezidanto Maŭ emociigis la aziajn kaj afrikajn geamikojn kiuj venis al Ŝaŭŝan kun la koro de la revolucia popolo de sia lando kaj havas senliman amon kaj estimon al Prezidanto Maŭ. Legu la jenan poemon verkitan, kaŭrante antaŭ la pordo de la malnova loĝejo, de Andria Manavodatsa, amiko el Malgaŝo:

Ŝaŭŝan!

Vi brilanta lok' de lumo,

Kie ja naskiĝis nia granda instruanto

*Destinita por forpeli la mallumon el la
subpremata mondo.*

Hodiaŭ,

*Paŝas mi sur via digo plena de smeraldaj
herboj,*

Sur via ruĝa tero,

Kiu ruĝas kiel la aŭroro en la oriento.

.....

La ardanta suno de meza somero brule verŝis sian varmon al la tero. Por serĉi la revolucian veron, la aziaj kaj afrikaj geamikoj eniris la ekspozojn de la malnova loĝejo de kamarado Maŭ Zedong, post tagmanĝo, sub la sufoko varma suno. Ili sciis, ke tie ili povos ekkoni la plej bezonatan kaj plej valoran aferon — la grandan penson de Maŭ Zedong, kaj kompreni kiel ĝi naskiĝis, disvolviĝis kaj fariĝis marksism-leninismo en la epoko en kiu imperiismo iras al plena disfalo kaj socialismo iras al triumfo tra la tuta mondo.

Ĉiu revolucia ago de Prezidanto Maŭ profunde kortuŝis la aziajn kaj afrikajn geamikojn, kaj ĉiu lia elstara tezo gajnis ilian senliman admiron. Por la liberigo de la popolo de la tuta Ĉinio, en diversaj historiaj periodoj, troviĝis inter la heroaj martiriĝintoj samfamilianoj de kamarado Maŭ Zedong. De la periodo de granda revolucio ĝis la periodo de helpo al Koreio kontraŭ la usona agreso, kamarado Maŭ Zedong perdis du fratojn, unu kuzinon, unu filon, unu nepon kaj sian edzinon Jang Kajhuj, sume 6 el liaj samfamilianoj verŝis sian sangon por la revolucia afero de la popolo. Aŭskultante la rakontadon de klarigisto kaj rigardante la portretojn de la gemartiroj, la geamikoj tre kortuŝiĝis. Iu amiko el Ruando diris kun emocio: “Nur hodiaŭ mi informiĝas ke multaj personoj el la familio de Prezidanto Maŭ martiriĝis. Ili oferis sian vivon al la ĉina revolucio kaj la monda revolucio. Ĉiu revoluciulo devas lerni de ili.”

La penso de Maŭ Zedong devenis de la praktiko de revolucia batalo. Same kiel Marks, Engels, Lenin kaj Stalin, estas malofte trovebla en la historio tia revolucia gvidanto kia kamarado Maŭ Zedong, kiu trapasis tiel longdaŭrajn, kompleksajn, intensajn kaj multflankajn batalojn. El la ekspozitaj objektoj kaj bildoj multaj geamikoj ekkomprenis plue, kial kamarado Maŭ Zedong povas fariĝi la granda gvidanto de la ĉina popolo, la kaŭzo kuŝas en tio ke li staras pli alte, rigardas pli malproksimen, kaj scias plej profunde observi, plej rapide rimarki kaj plej ĝisfunde solvi problemojn. El la diagramo pri la linioj, laŭ kiuj kamarado Maŭ Zedong faris enketan vojaĝon en kamparo dum someraj ferioj, 1917, kiam li lernis en la Unua Pedagogia Lernejo de Hunan, la geamikoj eksciis ke por ekkoni la staton de la kamparo li iris pli ol naŭcent liojn trapasinte kvin guberniojn dum unu monato. Ĉiuj admiris kun kapjesado kaj emocie kortuŝiĝis. Sudana amiko Osman Hassan Ahmed longe haltis antaŭ la ore skribitaj vortoj de Prezidanto Maŭ: “Kiu estas niaj malamikoj? Kiu estas niaj ami-

koj? Jen estas la plej grava demando de revolucio.” Li rigardis daŭre kun levita kapo. Kiam li vidis la verkon de Prezidanto Maŭ *Raporto pri Esplorado de Kamparana Movado en Hunan*, li diris montrante la libron: “Tiu libro estas tre tre grava.” Tanzania amiko Mohamed Ali Hemedi diris ankaŭ, ke tiu ĉi libro estas uzebla ne nur por la ĉina popolo, sed ankaŭ por la alilandaj popoloj.

Prezidanto Maŭ diris: “La centra tasko kaj la plej alta formo de revolucio estas kapti regpotencon per armitaj fortoj kaj solvi la problemon per milito.” Tio estas nekontestebla vero. Tiu vero jam estas pruvita de la revolucia praktikado de Ĉinio kaj ankaŭ de la revolucia praktikado de la landoj sendependiĝintaj senĉese unu post alia en la mondo; tiu vero jam fariĝis lumturo por la liberigaj bataloj de la subpremataj nacioj kaj popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko. En la ekspozejo de la malnova loĝejo de Prezidanto Maŭ, aziaj kaj afrikaj amikoj el la fronto de batalo kontraŭ imperiismo kaj koloniismo detale rigardis ekspozitaĵojn koncernantajn la armitan batalon faritan de la ĉina popolo sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ. Iu amiko el la Zimbabvea Delegacio militis iam kune kun la zimbabvea popolo kaj estis vundita en la batalo kontraŭ nova kaj malnova koloniismo kaj enlandaj reakciuloj, sed kugloj de la malamikoj neniam povas estingi la rezistan fajron de revoluciuloj. Dum la vizito tiu amiko tre serioze rigardis la ekspozitaĵojn. Post la rigardo li suprenfaldis sian pantalon tubon kaj diris montrante la cikatron sur sia kruro: “Por fari batalon, oni devas nepre sin prepari. Ni ne nur ellaboris revolucian programon de armita batalo, sed ankaŭ jam mobilizis la zimbabvean popolon al armita batalo. En multaj bataloj kontraŭ la malamiko ni akiris brilajn venkojn. Tiuj venkoj multe kuraĝigis la batalvolon kaj firmigis la fidon de nia popolo en la lukto kontraŭ la malamiko. Kvankam nia lando nun ankoraŭ ne sendependiĝis, tamen imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj, se ni

nur daŭre persistas en la armita batalo, nia patrujo certe akiros liberecon.”

Kiam delegito el Kongolando (Kinŝasa — antaŭe nomata Leopoldvilo) Kibwe Konstantin-Marie pririgardis la parton pri la periodo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, li vidis *Deklaron por Subteni la Popolon de Kongolando (Leopoldvilo) kontraŭ Usona Agreso*, publikigitan de Prezidanto Maŭ je la 28-a de novembro de 1964, kaj pro tio li tre emociiĝis. Li diris: “La deklaro de Prezidanto Maŭ pri subteno al la popolo de Kongolando (L.) kontraŭ la usona agreso estas la plej granda subteno al la popolo de Kongolando (K.). Kiam ni ricevis la Deklaron mi estis ĝuste en la batalfronto kaj tuj legis ĝin al la batalantoj, kaj ĉiuj estis treege kuraĝigitaj. Tio montras, ke la kontraŭimperiisma batalo de la popolo de Kongolando (K.) ne estas izola kaj ricevas la subtenon de la tutmondaj popoloj, speciale de la ĉina popolo sub la gvido de Prezidanto Maŭ.” Post la vizito, amiko el Basutolando diris: “La sinteno de k-do Maŭ Zedong al la kontraŭimperiisma batalo estas vaste ĝin subteni. En tiu batalo li ne limigas sian revolucion penson nur en Ĉinio, sed ĝin turnas al la tuta mondo. Tio klarigas, pro kio la Ĉina Popola Respubliko, ĝiaj registaro kaj popolo staras sur la plejfronto de la batalo de la tuta mondo kontraŭ imperiismo estrata de Usono.”

La venko de la revolucio de la ĉina popolo estas granda venko de la penso de Maŭ Zedong. El la brilaj atingoj kaj malfacilaj travivaĵoj de la revolucia batalo de la ĉina popolo, multaj delegitoj profunde ekkomprenis la grandiozecon de Prezidanto Maŭ kaj de la penso de Maŭ Zedong, kaj tiel des pli amas lin kaj lian penson. Kiam amiko el Sudano Osman Hassan Ahmed kaj delegito el Jemeno Saleh Dahhan vidis en la ekspozicio ekspozitaĵojn pri la deklaro de stariĝo de la Ĉina Popola Respubliko kaj pri la sukcesa irado de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruo fare de la tutlanda popolo alte tenanta la ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, ili nereteneble alte kantis *Bona Estas Socialismo* en la ĉina

lingvo. Kvankam ili kantis ne tiel flue, tamen tio estis kanto pri Prezidanto Maŭ rekte el la koro!

Unu el nepalaj amikoj entuziasme skribis en la ekspozecan notlibron: “Prezidanto Maŭ vivas por la suferantaj popoloj de la tuta mondo”, “la hodiaŭa Ĉinio estas lernejo de la revoluciaj popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, kaj de la tuta mondo.” Amiko el Kongolando (K.) skribis: “La popolo de Kongolando (K.) ĉiam respektas la penson de Maŭ Zedong, ĉar ĝi estas torĉo lumanta al la tuta homaro kaj estas kompasro direkton montranta al la subpremataj popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko.”


Ven Ming Kjuan, amiko el Norda Kalimantano, skribis entuziasman laŭdan poemon:

*Li ŝatas laboron,
Amegas popolon,
Kaj serĉas regulojn de la objektivaj aferoj.
Li estas tre lerta en organizado
Kaj pleje kuraĝa en rezisto.
Jen tiel
Fariĝis ĉi tiu ordinara homo
Plej granda gvidanto de l' ĉina popolo,
Fariĝis ĉi tiu ordinara homo
Vivantaj Marks, Lenin en nuna epoko,
Fariĝis ĉi tiu ordinara homo
Lumturo de l' monda popolo.*

Post la vizitado al Ŝaŭŝan, siria amiko Salame Oubied ankaŭ verkis poemon kun emocio:

*... fajrsem' en sparkformo
Fariĝos iam furioza fajrego,
Kiu forbruligos mallumon
Kaj vekos la homojn el dormo.*

Kvankam geamikoj el la du kontinentoj Azio kaj Afriko parolas malsaman lingvon kaj havas malsaman haŭtkoloron, tamen, ili havas saman senton kaj trovis komunan lingvon en tio, ke ili egale respektas senlime Prezidanton Maŭ kaj amas senlime la penson de Maŭ Zedong. Kiam ili adiaŭis Ŝaŭŝan vespere, Mohamed Dahan, amiko el Somalia Marbordo (“Franca”) trifoje kriis kun emocio levante la brakon: “Vivu Prezidanto Maŭ, vivu, vivu!”



Delegitoj el Cejlono kune lernas el verkoj de Prezidanto Maŭ.

Je la kvina horo, posttagmeze, komenciĝis en Ŝaŭŝan aktivado kun memoriga signifo kaj simbolanta amikecon kaj unuiĝon inter la ĉina popolo kaj la popoloj de Azio kaj Afriko. Antaŭ la ekspozejo de la malnova loĝejo de kamarado Maŭ Zedong, la aziaj kaj afrikaj amikoj kaj parto de membroj el la Ĉina Delegacio ĉeestinta la Urĝan Kunvenon de Azi-Afrikaj Verkistoj kune kun parto de kadroj kaj anoj de Ŝaŭŝan-a Popolkomunumo plantis palmojn kaj kamforarbojn. En ĉiun fosajon ili almetis teron kaj akvumis. Kvankam ili havas malsaman haŭtkoloron kaj parolas en malsama lingvo, tamen ili havas la komunan deziron, ke la amikeco kaj unuiĝo de la ĉina popolo kaj la popoloj de Azio kaj Afriko ĉiam verdu kiel la plantitaj arboj verdas en ĉiu sezono. Post kiam amiko el Zimbabve plantis kune kun ĉina amiko palmon, li skribis sian nomon sur etiketon kaj ĝin algluis sur la arbon, dirante: "Tiu estas arbo ĉiam verda. Mi esperas, ke la amikeco de la popoloj de Zimbabve kaj Ĉinio estos poreterne verda. Mi kredas, ke miaj samlandanoj, kiuj venos estonte, vidos tiun arbon." Post la planto de palmo antaŭ la ekspozejo, amiko el Basutolando Ntsi Mohale ĝoje nombrante diris: "La ĉiam verda arbo simbolas nian eternan amikecon, la tria estas de mi plantita, mi por ĉiam ne forgesos tiun arbon de amikeco." Amiko el Sirio Jaoudat al-Rikabi diris:

"Prezidanto Maŭ estas la granda gvidanto kaj savanto de la ĉina popolo, kaj estas ankaŭ la savanto de la tutmondaj popoloj. Hodiaŭ ni plantis arbon en la naskiĝloko de Prezidanto Maŭ, tio celas fortigi la amikecon inter la popoloj de niaj du landoj kaj la amikecon inter la ĉina popolo kaj la arabaj kaj siriaj popoloj. Tiu arbo estas simbolo de amikeco. Ni akvumis ĝin per akvo de amikeco por ke ĝi kresku kun profunda radiko kaj prospera foliaro kaj estu ĉiam verda." Amiko el Nigerlando Soule Amadou plantis unu palmon kun du kamparanoj de Ŝaŭŝan. Li ĝoje diris: "Mi esperas, ke la arbo de ni plantita profunden enradikiĝu, alte kresku en la sankta naskiĝloko de Prezidanto Maŭ kaj fariĝu simbolo de la neskuebla amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Nigerlando."

Membroj el la Delegacio de la Ĉinaj Verkistoj, kiuj akompanis la aziajn kaj afrikajn verkistojn en la vizito al Ŝaŭŝan, ankaŭ postlasis skribaĵon por esprimi la komunan senton de ili kaj la amikoj el Azio kaj Afriko.

La skribaĵo tekstas jene:

*Kiel la riveroj fluas al la maro,
Jen al Ŝaŭŝan venas el Azio kaj Afriko
kontraŭimperialisma batalamikaro.
Aŭdu! En kantado de aziaj kaj afrikaj la
popoloj pri la pens' de Maŭ Zedong
Ekskuiĝas nun la tuta mond'.*

Vivu la Unuiĝo de Aziaj kaj Afri- kaj Verkistoj kontraŭ Imperiismo

LA Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj solene okazis de la 27-a de junio ĝis la 9-a de julio 1966, en Pekino, la ĉefurbo de nia lando. La grandiozan kunvenon ĉeestis pli ol cent sesdek delegitoj de verkistoj el kvindek tri landoj kaj regionoj en Azio kaj Afriko kaj observantoj de kvin internaciaj organizaĵoj.

Prezidanto Maŭ Zedong, la granda gvidanto de la ĉina popolo akceptis la delegitojn kaj observantojn, esprimis sian varman bonvenigon al la fremdlandaj amikoj kaj fotografiĝis kun ili. Tiu akcepto fariĝis granda signifplena evento de la Urĝa Kunveno. Aliaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj ankaŭ en apartaj okazoj akceptis aŭ aranĝis grandiozajn bankedojn por varme bonvenigi la delegitojn kaj observantojn, kiuj ĉeestis la kunvenon, kaj celebri la fermiĝon en venko de la Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj.

Alte tenante la batalan standardon kontraŭ imperiismo kaj nova kaj malnova koloniismoj estrataj de Usono, la Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj frakasis la intrigon de la sovetiaj modernaj reviziistoj splitigi la movadon de la aziaj kaj afrikaj verkistoj kaj donis fortan subtenon al la kontraŭimperiismaj revoluciaj bataloj de la popoloj de Azio kaj Afriko kaj de la mondo, kaj fortan subtenon al la nacisava batalo de la heroa popolo de Vjetnamio kontraŭ la usona agreso. En plene malvolvita demokratia spirito de interkonsiliĝo, la kunveno sufiĉe detale diskutis la problemon kiel disvolvi la naciajn novajn kulturajn, literaturajn kaj artajn de Azio kaj Afriko, kaj akiris grandajn atingojn.

La Kunveno akceptis Komunikon kaj tridek sep rezoluciojn. Ili estas Rezolucio pri la Vjetnama Problemo, Rezolucio pri Angolo, Rezolucio pri Azanio, Rezolucio pri Basutolando, Rezolucio pri Beĉuanalando, Rezolucio pri Kamboĝo, Rezolucio pri Kameruno, Rezolucio pri Subteno al la Ĉina Popolo en Liberigo de Tajvano, Rezolucio pri Komoroj, Rezolucio pri Kongolando (L.), Rezolucio pri la Ŝtatrenverso de Ganao, Rezolucio pri Hindio, Rezolucio pri Indonezio, Rezolucio pri Irano, Rezolucio pri Subteno al la Luktado de Japana Popolo, Rezolucio pri Kaŝmiro, Rezolucio pri Laoso, Rezolucio pri Madagaskaro, Rezolucio pri Malajo, Rezolucio pri Nigero, Rezolucio pri Norda Kalimantano, Rezolucio pri Palestino, Rezolucio pri Filipinoj, Rezolucio pri "Portugalaj" Gvineo kaj Kabo Verde, Rezolucio pri la Ruanda Problemo, Rezolucio pri Somalio, Rezolucio pri Sudokcidenta Afriko, Rezolucio pri Svaŭilando, Rezolucio pri Tajlando, Rezolucio pri Jemeno, Rezolucio pri Zimbabve, Rezolucio Prezentita de Delegacioj el Naŭ Arabaj Landoj kaj Regionoj, Rezolucio pri Eritreo, Rezolucio pri Hispana Koloniismo, Rezolucio pri Servo de Literaturo al la Kontraŭimperiismaj Revoluciaj Luktoj, Rezolucio pri Plifortigo de la Movado de Azi-Afrikaj Verkistoj kaj Rezolucio pri la Tria Konferenco de Azi-Afrikaj Verkistoj.

Krome, la Kunveno decidis, ke la Tria Konferenco de Azi-Afrikaj Verkistoj okazos en 1967 en Ĉinio. La ĉinaj verkistoj kaj ĉina popolo esprimis, ke ili esperas bonvenigi pli multe da verkistoj el Azio kaj Afriko kiuj venos al nia lando por partopreni la konferencon venontjare.

Deklaro de la Kunveno de Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj

LA kunveno de Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj, kunvokita je la 23-a de junio 1966 en Pekino, kiun ĉeestis Kameruno, Cejlono, Ĉinio, Ganao, Indonezio, Japanio kaj Sudano, varme bonvenigas la verkistojn, kiuj venis al Pekino el 35 landoj kaj regionoj de Azio kaj Afriko por ĉeesti la Urĝan Kunvenon de Azi-Afrikaj Verkistoj por subteni la batalon de la vjetnama popolo kaj la naciliberigajn batalojn de la aziaj kaj afrikaj popoloj.

La Kunveno notas kun ĝojo, ke delegacioj el pliaj landoj estas sur la vojo por ĉeesti la Urĝan Kunvenon.

Ĝi notas, ke ĉiuj aziaj kaj afrikaj verkistoj, alvenintaj por partopreni la Urĝan Kunvenon, esprimis sian kompletan kontenton pri la preparaj laboroj faritaj de la Konstanta Buroo kaj sian decidon komplete sukcesigi la venontan Urĝan Kunvenon.

Esprimante la justajn sentojn kaj grandegan indignon de la aziaj kaj afrikaj verkistoj, la Konstanta Buroo forte kondamnas la kontraŭleĝajn kaj absurdajn decidojn faritajn de la skisma kunveno, okazigita en Kajro de la 19-a ĝis 20-a de junio 1966 pri starigo de falsa "Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj" en Kajro kaj la de ili nomata eksigo de nia respektata Ĝenerala Sekretario de lia posteno.


La alia kontraŭleĝa kaj absurda decido de la skisma kunveno en Kajro pri okazigo de t. n. kunveno de aziaj kaj afrikaj verkistoj en Baku, Azerbajĝanio de Sovetunio, klare malkovras la fakton, ke la sovetiaj skismistoj estas la ĉefa krimulo de ĉiuj perfidaj kaj skismaj agadoj por subfosi kaj saboti la movadon de aziaj kaj afrikaj verkistoj kaj la naciliberigajn batalojn.

Tiuj kontraŭleĝaj kaj absurdaj decidoj estas insulto ne nur al la Konstanta Buroo kaj ĝia Ĝenerala Sekretario, sed ankaŭ al ĉiuj revoluciaj aziaj kaj afrikaj verkistoj.

La Kunveno unuanime anoncas, ke pro sia pripensita kaj intenca subfosado kontraŭ la movado de aziaj kaj afrikaj verkistoj, la verkistoj de Sovetunio, kiuj entreprenas skismajn agadojn, jam tute apartigis sin de la vicoj de la aziaj kaj afrikaj verkistoj kaj por ĉiam perdis ĉiujn siajn rajtojn kaj lokon en la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj.

Estas ekstreme bedaŭrinde, ke Kajro estas uzita kiel loko por tiaj skismaj agadoj.

La aziaj kaj afrikaj verkistoj refoje esprimas sian decidon: alte teni la standardon de solidareco kaj revolucio kaj marŝi antaŭen, ŝultron ĉe ŝultro, kun la aziaj kaj afrikaj popoloj por batali kontraŭ la komuna malamiko, usona imperiismo, kaj ĝiaj komplicoj kaj apologiistoj.



La kunveno de la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj, okazigita la 23-an de junio en Pekino kun ĉeesto de la delegitoj de Kameruno, Cejlono, Ĉinio, Ganao, Indonezio, Japanio kaj Sudano, unuvoĉe aprobas la deklaron por forte kondamni la sovetuniajn reviziistojn pro ilia intenca subfoso kontraŭ la movado de azi-afrikaj verkistoj per skisma krimago.

Komuniko de la Urga Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj

VARME respondante al la invito de la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj, 161 delegitoj de verkistoj el 53 landoj kaj regionoj de Azio kaj Afriko kaj observantoj de 5 internaciaj organizoj venis al Pekino, la ĉefurbo de la Ĉina Popola Respubliko, por ĉeesti la Urgan Kunvenon de Azi-Afrikaj Verkistoj, okazigitan de la 27-a de junio ĝis la 9-a de julio 1966, kaj diskuti la jenan tagordon :

(1) Subteno al la vjetnama popolo en ĝia batalo kontraŭ la agresado de la usona imperiismo, por liberigi la Sudon, defendi la Nordon kaj reunuigi sian patrolandon.

(2) Taskoj de la verkistoj en la batalo de la azi-afrikaj popoloj kontraŭ imperiismo estrata de Usono, por gajni kaj defendi la nacian sendependecon.

(3) Opono kontraŭ la kultura agresado de imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj; kaj disvolvo de la nacia kulturo de la popoloj de azi-afrikaj landoj.

La sukcesa okazigo de tiu ĉi kunveno, la plej reprezentata kaj senprecedence granda en sia speco el tiuj kunvokitaj en niaj du kontinentoj, forte frakasis la intrigon de imperiismo kaj ĝiaj komplikoj intence subfosi la kunvenon.

La kunveno aŭskultis la ĝeneralan raporton de la Ĝenerala Sekretario de la Konstanta Buroo, la du specialajn raportojn pri la problemoj de Vjetnamio respektive faritajn de la Delegacioj de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio kaj Nacilibera Fronto de Suda Vjetnamio kaj kelkajn aliajn subraportojn.

La kunveno varme dankas al diverslandaj ŝtatĉefoj kaj politikaj, laboristaj kaj popolaj organizoj pro iliaj mesaĝoj de saluto kaj kuraĝigo senditaj al la kunveno.

Por senprokraste reagi kontraŭ la freneza bombado al Hanojo, la ĉefurbo de la Demo-

kratia Respubliko de Vjetnamio, kaj al Hajfongo, kaj esprimi la senliman indignon de la azi-afrikaj popoloj, la kunveno eldonis urĝan apelacion, forte kondamnanta la piratan agon de la usona imperiismo kaj firme subtenanta la justan batalon de la vjetnamaj fratoj. La kunveno konsideras ke, ĉar la usona imperiismo jam pluapaŝe plivastigis sian agresan militon, la popoloj de diversaj landoj havas ĉiujn rajtojn por subteni kaj helpi la vjetnaman popolon per ĉiaj disponeblaj rimedoj.

La kunveno unuanime akceptis rezolucion pri la problemoj de Vjetnamio, en kiu ĝi esprimas plenan aprobon kaj senrezervan subtenon al la kvarpunkta pozicio de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio kaj la kvinpunkta deklaro de la Nacilibera Fronto de Suda Vjetnamio, rigardante ilin kiel la solan ĝustan starpunkton por solvi la vjetnaman problemon. La kunveno samtempe alvokas la azi-afrikajn popolojn malkaŝi kaj kondamni la trompon de "paca intertraktado" de ĉiuj formoj lanĉitan de la usona imperiismo kaj ĝiaj komplikoj. La kunveno konsideras, ke estas absolute justa la starpunkto de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio kaj la Nacilibera Fronto de Suda Vjetnamio rifuzi la tiel nomatan "pacan intertraktadon" de la usona imperiismo.

La kunveno alvokas la popolojn de Azio, Afriko, Latinameriko kaj la tuta mondo fari plejblon por doni maksimume fortan subtenon al la vjetnama popolo en ĝia naciŝava batalo kontraŭ la usona imperiismo. Tia subteno devas esti daŭrigata kaj senĉese plifortigata, ĝis la usonaj agresantoj estos ĝisfunde faligitaj kaj plene elpelitaj el Vjetnamio.

La kunveno ankaŭ akceptis serion da rezolucioj esprimantaj firman subtenon al la batalo de la popoloj de diversaj landoj de Azio kaj

Afriko kontraŭ imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj: la brita, franca, portugala, hispana kaj belga, estrataj de Usono, kaj kontraŭ rasismo kaj cionismo, por gajni kaj defendi sian nacian sendependecon. La kunveno tutforte subtenas la armitajn luktojn kaj ĉiujn aliajn formojn de patriota batalo kontraŭ imperiismo estrata de Usono en Laoso, Tajlando, Malajo (inkluzive Singaporon), Norda Kalimantano, Indonezio, Kaŝmiro kaj aliaj lokoj de Azio, tiujn en Palestino, la okupata Suda Jemeno, Oman kaj aliaj arabaj landoj kiuj estas dividitaj kaj redividitaj de imperiismo kaj tiujn en Kongolando (Leopoldvilo), Angolo, Mozambiko, Nigero, "Portugala" Gvineo, Ganao, Malgaŝo, Zimbabve, Azanio, Basutolando kaj aliaj dividitaj landoj en la suda parto de Afriko.

La kunveno unuanime konsideras, ke la nunaj ĉefaj taskoj de azi-afrikaj popoloj estas komplete forbalai ĉiujn fortojn kaj influojn de imperiismo kaj koloniismo en politika, ekonomia kaj kultura kampoj kaj konduki la naciliberigan batalon ĝis la fino.

La kunveno emfazas, ke la usona imperiismo estas la plej feroce malamiko de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj de la tuta mondo. Tial, la urĝa tasko de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj de la tuta mondo estas formi veran kaj potencon internacian unuecfronton por ekstermi tiujn diablajn fortojn, t. e., la usonan imperiismon kaj ĝiajn komplicojn. La azi-afrikaj verkistoj decidis fari siajn maksimumajn kontribuojn al tiu ĉi unuecfronto kontraŭ la usona imperiismo.

La kunveno konsideras, ke la azi-afrikaj verkistoj devas defendi, krei, disvolvi kaj riĉigi sian nacian kulturon. Tial, ili devas senprokraste krei popolamasajn, naciajn novajn kulturon,

literaturon kaj arton, kiuj servas al la kontraŭ-imperiisma revolucio, kaj fari nelacigeblan batalon kontraŭ ĉiaj imperiismaj, novkoloniismaj, malnovkoloniismaj kaj aliaj reakciaj dekadencaj kulturo, literaturo kaj arto. La azi-afrikaj verkistoj rigardas la realigon de tiu sia decido kiel sian sanktan taskon kaj dediĉos siajn verkojn al la batalo de azi-afrikaj popoloj.

Por gardi kaj defendi la movadon de la azi-afrikaj verkistoj kaj oponi kontraŭ la konspiroj kaj intrigoj de imperiismo kaj ĝiaj komplicoj, la kunveno subtenas la solenan deklaron faritan de la Konstanta Buroo de la Azi-Afrikaj Verkistoj je la 23-a de junio 1966 por kondamni la skisman kunvenon. La kunveno konsideras, ke ĉiuj kontraŭleĝaj decidoj faritaj de la skisma kunveno, inkluzive la decidon pri la okazigo de la tiel nomata konferenco de la azi-afrikaj verkistoj en Baku, estas agado subfosanta la unuiĝon de la azi-afrikaj verkistoj kaj la aferon de unuiĝo de la tutaj azi-afrikaj popoloj kontraŭ imperiismo.

La kunveno energie subtenas la Konstantan Buroon de la Azi-Afrikaj Verkistoj kiu kunvenis en Pekino, kaj deklaras, ke ĝis la kunvoko de la Tria Konferenco la Konstanta Buroo estas la sola organo prirespondanta la administradon kaj agadon de la azi-afrikaj verkistoj.

La kunveno antaŭe kondamnas ĉiujn skismajn intrigojn kaj provojn eble aperontajn antaŭ la venonta konferenco.

Por pluapaŝe plifirmigi la movadon de la azi-afrikaj verkistoj kaj la Konstantan Buroon de la Azi-Afrikaj Verkistoj kaj fari maksimuman kontribuon al la batalo de azi-afrikaj popoloj, la kunveno decidas ke la Tria Konferenco de la Azi-Afrikaj Verkistoj estu okazigota en la Ĉina Popola Respubliko.



Ĉina Popolo por Ĉiam Fidelas al la Granda Penso de Maŭ Zedong kaj Neniam Perfidos la Esperon de la Monda Popolo

— Parolado de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj en
la Bankedo por Festi la Fermon de la
Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj


Karaj gegastoj,
Karaj geamikoj,
Gekamaradoj:

La Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj venke fermiĝis hodiaŭ.

Alte tenante la flagon de batalo kontraŭ imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj estrataj de Usono, tiu ĉi kunveno via forte subtenis la popolojn de Azio kaj Afriko kaj de la mondo en iliaj revoluciaj bataloj kontraŭ imperiismo, forte subtenis la heroan vjetnaman popolon en ĝia naciŝava batalo kontraŭ la usona imperiismo. Via kunveno disvolvis la spiriton de demokratia interkonsiliĝo, plene

diskutis la problemon pri disvolvo de la nova kulturo kaj novaj literaturo kaj arto de la azi-afrikaj nacioj, kaj gajnis grandan sukceson. Ĝi estas kunveno de revolucio, kunveno de unuiĝo kaj kunveno de venko.

Nun, en la nomo de la ĉina popolo kaj la Ĉina Registaro, mi kaj la tri kamaradoj Kang Ŝeng, Ĉen Boda kaj Taŭ Ĝu kune esprimas al vi varman gratulon; kaj samtempe ni ankaŭ esprimas al vi azi-afrikaj verkistoj revolucian batalan saluton en la nomo de la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj, revoluciaj kadroj kaj intelektuloj de la tuta lando, kiuj entreprenas la grandan kulturan re-



K-do Ĝoŭ Enlaj, vicprezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro paroladas en la bankedo.

volucion sub la konduko de la penso de Maŭ Zedong kaj la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio!

Dum la irado de via kunveno, la usona imperiismo levis la agresan militon kontraŭ Vjetnamio al nova, pli serioza etapo. Nun Usono senĉese diradas, ke ĝi batalos ĝis la fino en la suda parto de Vjetnamio. Ĝia celo estas evidente por subpremi la vjetnaman popolon al petado pri paco; alie ĝi ruinigos Vjetnamion. Sed la heroo vjetnama popolo certe ne submetiĝos antaŭ la milita ĉantaĝo de Usono, kaj certe ne ŝanceliĝos antaŭ la milita ĉantaĝo de Usono ankaŭ ĉiuj ŝtatoj kaj popoloj, kiuj vere subtenas la vjetnaman popolon en ĝia milito kontraŭ la usona imperiismo. Ja neniam efektiviĝos la celo de Usono.

Dum la ŝlosila momento de disvastigo de la agresa milito kontraŭ Vjetnamio fare de la usona imperiismo, ĉiuj ŝtatoj kaj popoloj, kiuj vere subtenas la vjetnaman popolon en ĝia milito kontraŭ Usono, povas havi nur unu respondon al la provoko de la usona imperiismo, t. e., senrezerve subteni per ĉiuj fortoj politike, milite, ekonomie kaj morale la

vjetnaman popolon forpeli la usonajn rabistojn el Vjetnamio. Tiel faras la ĉina popolo kaj la Ĉina Registaro jam komence de la unua tago, de kiu Usono agresas Vjetnamion. Timante riski nenian danĝeron kaj domaĝante nenian prezon, ni kun decidemo subtenos la fratan vjetnaman popolon, ĝis ĝi akiros la finan venkon.

Tiu ĉi batalo estas batalo de vivo kaj morto. Aŭ ni venkos la usonan imperiismon, aŭ ni submetiĝos al la usona imperiismo. Ne troviĝas meza vojo. Ĉiuj revoluciaj popoloj de la tuta mondo nepre devas forĵeti ĉian iluzion, konfidi al la forto de la popolo, sinapogi sur la forton de la popolo, unuiĝi en unu animo, firme batali kaj ĝisfunde venki la usonajn agresantojn.

Ĝuste en tiu ĉi ŝlosila momento, la Hinda Registaro elmetas la proponon pri denova kunvoko de Ĝeneva Konferenco. Tiu ĉi propono ja celas sole malklarigi la vidon de la monda popolo kaj kolapsigi la batalvolon de la vjetnama popolo. Oni povas scii ĉe ekrigardo, ke tio estas en servo al Usono.

Ĉinio estas lando ĉeestinta la Ĝenevan Konferencon okazintan en 1954. Estas necese montri, ke la Ĝenevaj Interkonsentoj jam delonge estis komplete disŝiritaj de Usono. Por paroli pri la Ĝenevaj Interkonsentoj, Usono devas senkondiĉe tuj fortiri plene, ĝisfunde kaj komplete siajn armitajn fortojn el Vjetnamio. Antaŭ ol la usonaj soldatoj estas fortiritaj, estas absolute neparolebla denova kunvoko de Ĝeneva Konferenco.

Ree ĝuste en tiu ĉi ŝlosila momento, la reviziisma gvidanta kliko de Sovetunio deklaras senskrupule kaj freneze: La bombado al Hanojo kaj Hajfongo fare de Usono ne malhelpas la kunlaboron inter Usono kaj Sovetunio por atingi interkonsenton pri malarmado. Dume Usono sin okupas pri ekspansiigo de armado kaj devastigo de milito en Vjetnamio. Tio estas plej publika senkaŝa forvendo de la vjetnama popolo.

Oni povas vidi, kian senhontan rolon ludas la hindaj reakciuloj kaj la reviziisma gvidanta kliko de Sovetunio en la devastigo de agresa milito kontraŭ Vjetnamio fare de la usona imperiismo. Por maksimume izoli kaj bati la usonan imperiismon, estas necese, ke la popoloj de Azio, Afriko kaj la tuta mondo senĉese devastigu kaj plifortigu de ĉiuj flankoj la unuecfronton kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Tiu ĉi unuecfronto devas esti bazita sur la granda unuiĝo de la revoluciaj popoloj tra la tuta mondo kaj inkluzivi ĉiujn ŝtatojn kaj popolojn, kiuj suferas la agreson, intervenon, superregon kaj tiranadon de la usona imperiismo, sed absolute ne la reviziisman gvidantan klikon de Sovetunio kaj la hindajn reakciulojn. Kontraŭe, ili povas esti nur la objekto de batalo por la internacia unuecfronto kontraŭ Usono.

Gekamaradoj, geamikoj! El sia propra sperto, la diverslandaj popoloj de Azio kaj Afriko scias, ke por akiri veran liberecon kaj emancipon, estas necese en la tempo de batalo por plena sendependeco en politiko kaj sinapogo sur la propraj fortoj

en ekonomio, disvolvi grandan revolucion en la kultura kaj ideologia kampoj. Frakasi la putrajn reakciajn malnovan kulturon kaj malnovan ideologion de imperiismo kaj koloniismo, kaj starigi kaj disvolvi kontraŭimperiismajn revoluciajn, popolamasajn kaj naciajn novan kulturon kaj novan ideologion estas la komuna tasko kiun ni popoloj de diversaj landoj de Azio kaj Afriko alfrontas. En tiu ĉi flanko, via kunveno faris elstaran kontribuon. Ni kredas, ke viaj laboroj certe multe helpos al la aziaj kaj afrikaj popoloj en ilia granda batalo por unuiĝo kontraŭ imperiismo.

Geamikoj, gekamaradoj! En tiu ĉi kunveno vi varme gratulis la 45-an datrevenon de la fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio. Multaj delegitoj varme laŭdis prezidanton Maŭ Zedong, la grandan gvidanton de nia popolo, kaj la grandan penson de Maŭ Zedong, alte taksis la grandan socialisman kulturen revolucion de nia lando. Tio estas senkompara fido kaj subteno al la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong, tio estas kuraĝigo kaj akcelo al la ĉina popolo por plibone studi kaj apliki marksism-leninismon kaj la penson de Maŭ Zedong. Pro tio ni esprimas koran dankon al vi ĉiuj amikoj. Vi povas kredi, ke la Komunista Partio de Ĉinio, la Ĉina Registaro kaj la ĉina popolo estos ĉiam fidelaj al la granda penso de Maŭ Zedong kaj neniam perfidos la profundan esperon de la monda popolo al ni.

Nun, ni proponas:

Trinku

por la brila venko de la vjetnama popolo en ĝia naciŝava batalo kontraŭ la usona imperiismo,

por la granda revolucia unuiĝo de la verkistoj kaj popoloj de Azio kaj Afriko kontraŭ imperiismo,


por la granda venko de la popoloj de Azio, Afriko kaj la tuta mondo en ilia batalo kontraŭ imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj estrataj de Usono,

por la sano de la ĉeestantaj geamikoj kaj gekamaradoj!

La Popoloj de Azio kaj Afriko Jam Eniris en Grandan Epokon de Kultura Releviĝo kaj la Granda Kultura Revolucio de Ĉinio Estas Granda Praktiko de la Penso de Maŭ Zedong

— Parolado de Vicĉefministro Ĉen Ji ĉe la Inaŭguro
de Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj

*K-do Ĉen Ji, vicĉefministro de la Stata
Konsilantaro, alparolas la kunvenon.*



Sinjoroj prezidanto kaj delegitoj,
Geamikoj kaj gekamaradoj:

Malfermiĝas hodiaŭ en Pekino la Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj. Estas granda honoro por Ĉinio povi servi al via kunveno kiel gastiganto. En la nomo de la Ĉina Registaro kaj ĉina popolo, mi esprimas varman bonvenigon al la ĉeestantaj aziaj kaj afrikaj verkistoj kaj elkoran gratulon al la kunveno.

Hodiaŭ, la kunvenon partoprenas 152 delegitoj de verkistoj kaj observantoj el 47 landoj kaj regionoj en Azio kaj Afriko kaj de 3 internaciaj organizoj. Vi venis de la plejfronto de la kontraŭimperiisma, kontraŭkoloniisma batalo en Azio kaj Afriko kaj de diversaj postenoj. Vi estas glora kaj grava trupo el la granda kultura armeo de la aziaj kaj afrikaj popoloj. De longe vi uzas viajn plumojn kiel armilojn por batali por la afero de revolucia unuiĝo de la aziaj kaj afrikaj popoloj kontraŭ imperiismo. Vi de ĉiam uzas la kontraŭimperiismajn kaj revoluciajn literaturon kaj arton kiel armilon por kritiko; nun en

Vjetnamio, Kongolando (Leopoldvilo) kaj aliaj regionoj la situacio disvolviĝis jam en kritikon per armiloj. Viaj nomoj kaj verkoj ne nur estas estimataj de la popolo de via propra lando, sed ankaŭ de la popoloj de Ĉinio, Azio kaj Afriko.

Spite la malhelpon kaj subfosadon de imperiismo kaj ĝiaj sekvantoj, vi venis ĉi tien por ĉeesti la kunvenon. Vi alportis novajn ĝojigajn sciigojn pri vekiĝo, unuiĝo, luktado kaj venkoj de la 2-miliarda popolo de Azio kaj Afriko. Tio estas esprimiĝo de la granda revolucia unuiĝo de la aziaj kaj afrikaj verkistoj kontraŭ imperiismo. La nuna kunveno ne nur signas tute novan etapon en la movado de la aziaj kaj afrikaj verkistoj, sed ankaŭ estas grandega subteno kaj kuraĝigo al la luktantaj popoloj de Azio kaj Afriko kaj de la tuta mondo.

Geamikoj kaj gekamaradoj! La nuna internacia situacio estas favora al la popoloj de Azio kaj Afriko kaj de la mondo, sed malfavora al imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj. La aziaj kaj afrikaj popoloj volas oponi imperiismon kaj volas sendependecon kaj liberecon. Senprecedence vekiĝis la aziaj kaj afrikaj popoloj, ĉiam pli kreskas iliaj fortoj, kaj pli profundiĝas ilia batalo. Tio estas la ĉefa fluo de la situacio en Azio kaj Afriko. Uzante rimedojn de rekta agresado, kruda intervenado, politika renversado k. s., imperiismo estrata de Usono kaj manpleno da reakciuloj faras frenezan kontraŭatakon al la revoluciaj fortoj kaj tiel levas kontraŭrevolucion kontraŭfluan. Sed, tio absolute ne povas malhelpi la triumfan antaŭenmarŝon de la revoluciaj popoloj de Azio kaj Afriko.

La usona imperiismo multoble intensigas sian superregadon, intervenadon, renversadon kaj agresadon en la regionoj de Azio kaj Afriko, kaj obstine efektivas sian agresan kaj militan politikon en la tuta mondo. Ĝi estas la plej aroganta agresanto senprecedenca en la historio, la plej ĉefa apogilo de ĉiuj reakciaj fortoj en la mondo kaj la plej feroĉa malamiko de la popoloj de la tuta mondo. La aziaj kaj afrikaj popoloj devas fari vivmortan pinto-kontraŭ-

pintan lukton kontraŭ la usona imperiismo, en ĉiu paŝo antaŭen sur la vojo de batalo por sendependecon kaj progreson.

Tutanime strebante al la kunlaboro inter Usono kaj Sovetio por superregi la mondon, la sovetiaj reviziistoj helpas la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn konservi sian reakcian regadon, subpremi naciliberigan movadon, diserigi kaj subfosi la vicaron de unuiĝo de Azio kaj Afriko kontraŭ imperiismo. Ili jam degeneris en komplikojn de la usona imperiismo. Batalante kontraŭ imperiismo estrata de Usono, la revoluciaj popoloj de Azio kaj Afriko ne povas ne samtempe oponi kontraŭ la moderna reviziismo kun la gvidanta kliko de Sovetunio kiel ĝia centro.

Oponi imperiismon, novan kaj malnovan koloniismojn estratajn de Usono, batalakiri kaj defendi la nacian sendependecon kaj konduki ĝisfine la nacian revolucion estas la plej urĝa kaj plej ĉefa historia tasko por la popoloj de Azio kaj Afriko en la nuna tempo.

La popoloj de aziaj kaj afrikaj landoj ankoraŭ ne sendependiĝintaj alprenas nun ĉiujn formojn de luktado, inkluzive tiun de armita lukto, por gajni sendependecon kaj liberiĝon.

La popoloj de aziaj kaj afrikaj landoj jam sendependiĝintaj nun daŭrigas la batalon kontraŭ la superregado, intervenado, renversado kaj agresado de imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj, por gardi la nacian sendependecon kaj ŝtatan suverenecon kaj disvolvi nacian ekonomion kaj nacian kulturon.

La ĉina popolo spiras la saman spiron kaj dividas la saman sorton kun la popoloj de diversaj landoj de Azio kaj Afriko. Ni ĉiam staras kune kun la kontraŭimperiismaj revoluciaj gefratoj de Azio kaj Afriko.

Ni firme subtenas la justan batalon de la popoloj de Vjetnamio, Koreio, Kamboĝo, Laoso, Tajlando, Malajo, Filipinoj, Norda Kalimantano, Indonezio kaj Japanio, kaj firme subtenas diverslandajn popolojn de Azio en ilia batalo por gajni kaj defendi

nacian sendependecon kontraŭ imperiisma agresado.

Ni firme subtenas la justan batalon de la popoloj de Suda Jemeno kaj Oman kaj de la araba popolo de Palestino, kaj firme subtenas la popolojn de la arabaj landoj en ilia batalo por gajni kaj defendi sian nacian sendependecon kontraŭ imperiismo kaj ties instrumento de agreso — Izraelo.

Ni firme subtenas la justan batalon de la popoloj de Kongolando (Leopoldvilo), Angolo, Mozambiko, “Portugala” Gvineo, Zimbabve, Suda Afriko, Beĉuanalando, Basutolando, Svazilando, Sudokcidenta Afriko, “Franca” Somalio, Komoroj kaj Kanarioj, kaj firme subtenas la popolojn de diversaj afrikaj landoj en ilia batalo por gajni kaj defendi sian nacian sendependecon kontraŭ nova kaj malnova koloniismoj.

Ni firme subtenas la klopodojn de la nove leviĝantaj sendependaj landoj de Azio kaj Afriko por disvolvi sian nacian ekonomion kaj konstrui sian landon; kaj sur la bazo de egaleco kaj reciproka utilo ni faros nian plej-eblon por helpi ilin sinapogi sur la propraj fortoj en disvolvo de ekonomio kaj forskui la imperiisman superregadon.

Ni estas firme pretaj preni sur nin la plej grandan nacian oferon por subteni la kontraŭimperiisman revolucian aferon de la popoloj de Azio kaj Afriko kaj de la mondo. Tute egale kian ajn premon imperiismo, estrata de Usono, donos por devigi nin ŝanĝi nian politikon, ni persistos ĉe nia pozicio de opono kontraŭ imperiismo kaj subteno al la kontraŭimperiisma revolucio de diverslandaj popoloj, absolute senŝanceliĝe kaj absolute senŝanĝe.

La vjetnama problemo estas la fokuso de la nuna internacia kontraŭusona batalo. Per senprecedence barbaraj sangaj rimedoj la usonaj agresantoj praktikas en la Sudo de Vjetnamio la malhumanan politikon “bruligi ĉion, mortigi ĉiun kaj detruigi ĉion” kaj faras frenezan diboĉan bombadon al la Nordo de Vjetnamio. Tamen, ĉio ĉi tio ne povas savi la usonan imperiismon el ĝia fatala sorto. Por savi sin el flasko, ĝi unuflanke efektivigas la intrigon de paca

intertraktado per ĉantaĝo de plivastigo de milito kaj aliflanke, kovras siajn krimagojn de plivastigo de milito per fumkurteno de paca intertraktado, vane provante atingi la celon eternigi sian okupadon de suda Vjetnamio kaj dividon de Vjetnamio.

La heroo vjetnama popolo altgrade disvolvas la potencon de popola milito kaj akiris brilajn venkojn en sia nancisava batalo kontraŭ la usona agresado. La vjetnama popolo jam delonge decidis defendi la Nordon, liberigi la Sudon, reunuigi sian patrolandon kaj komplete elpeli la usonajn piratojn. La vjetnama problemo povas esti solvita nur laŭ la volo de la vjetnama popolo. Usono devas ĉesigi sian agresadon kontraŭ la tuta Vjetnamio, retiri ĉiujn siajn armitajn fortojn el suda Vjetnamio kaj lasi la vjetnaman popolon mem solvi sian propran problemon. Alie, ĉia vana babilado pri paca solvo de la vjetnama problemo estas nur trompo.

Distruptante, tiel dire, ke Usono havas sincerecon por paca solvo de la vjetnama problemo, la gvidanta kliko de Sovetunio plenforte provas redukti la justajn postulojn de la vjetnama popolo kaj vane intencas elvendi la fundamentajn interesojn de la vjetnama popolo por haltigi duonvoje la justan batalon de la vjetnama popolo. Tio estas absolute nepermesebla. Senprincipa kompromiso povas nur doni al la usona imperiismo ŝancon de spirreakiro kaj kaŭzi pli grandajn katastrofojn al la vjetnama popolo. Kiel oni povas paroli en tiaj cirkonstancoj pri “unuigita agado” kun la gvidanta kliko de Sovetunio?

La vjetnama popolo staras ĉe la plej-fronto de batalo de la popoloj de la tuta mondo kontraŭ la usona imperiismo. Ĉiu guto da sango de la vjetnama popolo estas verŝata por gajni sian nacian sendependecon kaj por la komuna kontraŭimperiisma kaj kontraŭkoloniisma afero de la aziaj kaj afrikaj popoloj. Fari ĉiun eblon por subteni kaj helpi la nancisavan batalon de la vjetnama popolo kontraŭ la usona agresado kaj ĝisfunde venki la usonajn agresantojn estas komuna internaciisma devo de la popoloj de Azio kaj Afriko.

Ni ĉina popolo tutforte subtenos la vjetnaman popolon, ĝis ĝi akiros la finan venkon en sia nacisava batalo kontraŭ la usona agresado, tute egale, kian artifikon ludos la usona imperiismo, ĝis kiu ŝtupo ĝi eskalados en la milito, kiel grandan danĝeron ni riskos, kaj kiom grandan prezon ni pagos.

Por maksimume izoli kaj bati la usonan imperiismon, la popoloj de Azio kaj Afriko kaj de la tuta mondo devas pluapaŝe plivastigi kaj plifortigi la internacian unuecfronton kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Tiu ĉi unuecfronto devas persisti ĉe la vere revolucia principo, kiu spegulas la aspirojn de la tutmondaj popoloj. Tiu ĉi unuecfronto devas bazi sin sur la granda unuiĝo de la revoluciaj popoloj de la tuta mondo. Tiu ĉi unuecfronto devas inkluzivi ĉiujn landojn kaj popolojn, suferantajn la agresadon, intervenadon, superregadon kaj tiranadon de la usona imperiismo, sed absolute ne la lakeojn, komplikojn kaj kunkonspirantojn de la usona imperiismo.

En nia epoko, potencaj ne estas la fortoj de imperiismo, sed la fortoj de revoluciaj popoloj; ne la revolucia popolo timas imperiismon, sed imperiismo timas la revolucian popolon. La aziaj kaj afrikaj popoloj ne timas imperiismon, novan kaj malnovan koloniismojn, kaj dank' al armita batalo kaj la unuecfronto kontraŭ la usona imperiismo ili certe povos venki la usonan imperiismon kaj gajni la venkon en la afero de nacia liberiĝo. Ĝuste kiel kamarado Maŭ Zedong montris: "La popoloj de la tuta mondo estu bravaj, kuraĝu batali, ne timu malfacilojn, kaj marŝu antaŭen unuj post aliaj, tiam, la tuta mondo apartenos al la popoloj. Ĉiuj diabloj kaj monstroj senescepte estos ekstermitaj."

Geamikoj kaj gekamaradoj! Kun la senĉesa disvolviĝo kaj venkoj de la naci-liberiga movado, la popoloj de Azio kaj Afriko jam eniris en grandan epokon de kultura releviĝo. Krei kontraŭimperiismajn revoluciajn naciajn novajn kulturojn de

la popolamasoj de la aziaj kaj afrikaj landoj, konstrui Azion kaj Afrikon en novan Azion kaj novan Afrikon kun modernaj scienco kaj kulturo — tio estas la historia misio de la popoloj de Azio kaj Afriko en la kultura kampo.

Por plenumi tiun ĉi historian mision, la aziaj kaj afrikaj popoloj faras grandegajn penojn por komplete forbalai ĉiujn kulturajn, literaturajn kaj artajn influojn de imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj. Tiaj influoj ĉefe venas de la usona imperiismo.

Depost la Dua Mondmilito, la usona imperiismo elspezis centmilionojn da dolaroj kaj funkciigas ĉiujn propagandajn maŝinojn por propagandi la tiel nomatajn usonajn civilizacion kaj vivmanieron tra ĉiuj kanaloj utiligante ĉiujn formojn de literaturo kaj arto. La literaturo kaj arto de Usono de sia speco estas ekstreme reakciaj, putraj kaj dekadencaj, kaj ankaŭ estas esprimo de malespero. Ili estas opio kiu korodas la nacian konscion kaj sklavigas la mensojn de la popolo de diversaj landoj. La celo de Usono estas utiligi kulturen enfiltriĝon kiel suplementon al ĝiaj politika renversado, ekonomia prirabado kaj milita agresado. Ĉia ajn progesa literaturo kaj arto ne povas emergi en Usono kaj suferas subpremadon.

La literaturo kaj arto de moderna reviziismo degeneris en kopiaĵon de la literaturo kaj arto de la okcidenta burĝaro kaj estas en servo al imperiismo kaj la reakciuloj de diversaj landoj.

La novaj kulturo, literaturo kaj arto de la aziaj kaj afrikaj popoloj disvolviĝas en la kontraŭimperiisma revolucia batalo kaj disvolviĝas en la batalo kontraŭ reakciaj kulturo, literaturo kaj arto de imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj. Tiaj novaj kulturo, literaturo kaj arto estas plej progesaj, plej vivipovaj kaj plej konformaj al la interesoj de la aziaj kaj afrikaj popoloj kaj al la urĝaj bezonoj de la kontraŭimperiisma revolucia batalo.

La novaj kulturo, literaturo kaj arto de la popoloj de Azio kaj Afriko forte spegulas la grandan kontraŭimperiisman

revolucionan spiriton de la nuna epoko, prezentas klaran nacian karakteron kaj estas intime kombinitaj kun la popolamasoj. Tial, la novaj kulturo, literaturo kaj arto de nia speco estas konsistiga parto de la tuta kontraŭimperiisma kaj revolucia maŝino kaj potenca armilo por unuigi kaj eduki la popolon, bati kaj ekstermi la imperismajn fortojn, kaj akiri sendependecon kaj liberiĝon.

La popoloj de Azio kaj Afriko siatempe kreis privilegiajn antikvajn kulturojn kaj faris grandan kontribuon al la homa historio. Nun, la aziaj kaj afrikaj popoloj reaperas sur la scenejo de la monda historio kiel ĝiaj revoluciaj, progresemaj mastroj. Devas finiĝi tiu periodo de la moderna monda historio, en kiu ni aziaj kaj afrikaj popoloj kaj niaj aziaj kaj afrikaj kulturoj estas malestimataj. Kun la venka disvolviĝo de la kontraŭimperiisma revolucia batalo de la aziaj kaj afrikaj popoloj, estas leviĝanta nova kulturo de la grandaj aziaj kaj afrikaj popoloj. Tiu nova kulturo, laŭ sia ideologia enhavo, jam multe superis la tutan malnovan kulturon de imperiismo kaj koloniismo.

Dum fariĝas ĉiam pli putra kaj malespera la kulturo de la okcidenta imperiismo kaj ĉiam pli degeneras la kulturo de reviziismo, la laboremaj, bravaj kaj inteligentaj aziaj kaj afrikaj popoloj kun altgradaj nacia memestimo kaj nacia memfido, certe povos fari ankoraŭ pli grandan kontribuon al la civilizacio de la tuta homaro ol antaŭe.

Ĝemikoj kaj gekamaradoj! Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong kaj persistante ĉe la Ĝenerala Linio de Socialisma Konstruado streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie, la ĉina popolo marŝas antaŭen per gigantaj paŝoj sur la vojo de socialismo. Nova antaŭensalto estas farita en la industria produktado de nia lando ne nur en kvanto, sed pli grave, ankaŭ en specaro, kvalito kaj tekniko. La skalo, rapideco kaj kvalito de la kapitala konstruado ege superis tiujn de la antaŭaj

kelkaj jaroj. La agrikulturo akiris bonajn rikoltojn en kvar sinsekvaj jaroj. En la tuta nacia ekonomio aperis senprecedenca ĝenerala leviĝo.

En la lastaj kelkaj monatoj, la popolo de nia lando disvolvis senprecedencan movadon de la granda proleta kultura revolucio. Tio estas granda revolucia movado por firmigi la diktaturon de la proletaro kaj antaŭen puŝi la aferon de socialismo en nia lando. Tiu ĉi granda revolucio estas la neevitebla rezulto de la historia disvolviĝo de nia lando.

La tasko de tiu nia granda proleta kultura revolucio estas ĝisfunde disrompi ĉiujn malnovan ideologion, malnovan kulturon, malnovajn morojn kaj malnovajn kutimojn, kiujn kreis la ekspluataj klasoj de miloj da jaroj por veneni la mensojn de la popolo, kaj krei kaj formi inter la vastaj popolamasoj tute novan ideologion, novan kulturon, novajn morojn kaj novajn kutimojn de la proletaro. Tio estas en la ŝtormego de klasbatalo kreive studi kaj apliki la penson de Maŭ Zedong kaj popularigi la penson de Maŭ Zedong, por ke la penso de Maŭ Zedong intime kombiniĝu kun la vastaj amasoj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

En tiu granda proleta kultura revolucio, la lancpinto de nia batalo estas direktata, kun koncentrita forto, kontraŭ la manpleno da kontraŭrevoluciuloj, kiuj konsistigas nur kelke da procentoj de la tuta loĝantaro kaj mortobstine oponas kontraŭ la komunista partio kaj socialismo. Rilate al la absoluta plejparto de la homoj, ni aplikis, aplikas kaj ankoraŭ aplikos la politikon de “unuigo — kritiko — unuigo”. En rilato al la grandnombraj intelektuloj, kiuj venis de la malnova socio, ni daŭre aplikas la politikon de unuigo, edukado kaj remuldado. Tiu ĉi politiko estas firma kaj neŝancelebla. Iuj reakciuloj en- kaj eksterlandaj kalumnias, ke ni direktas la batalan lancpinton “kontraŭ ĉiuj intelektuloj”, tio estas sole klaĉo kun kaŝaj motivoj.

En tiu granda proleta kultura revolucio ni apogas nin sur la firmaj proletaj revo-

luciuloj kaj sur la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj. Dank' al energia studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de nia lando, en nombro de centoj da milionoj, sturme malfermis la pordegon de marksism-leninismo; por ĉiam forpasis senrevene la epoko, en kiu malmulte da intelektuloj monopolis teorion kaj scion, kaj jam venis nova historia epoko, en kiu la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj rekte posedas teorion kaj scion! Sub la kondukado de la penso de Maŭ Zedong grandamase emerĝis literaturaj kaj artaj laborantoj el inter la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Komplete sin liberiginte el sub la jugo de la malnovaj ideoj literaturaj kaj artaj de la ekspluataj klasoj, ili kreis grandnombre literaturajn kaj artajn verkojn plenajn de la revolucia spiro de la socialisma epoko. Faktoj vive montras, ke la penso de Maŭ Zedong fariĝas grandega materia forto, tuj kiam ĝin posedas la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Vidante ke ni kondukas grandskale la kulturalan revolucion, manpleno da imperiistoj kaj iliaj sekvantoj opinias, ke io estas ne en ordo en nia lando kaj nia ŝtatpotenco, kaj ke tio ŝajne ebligas al ili eltiri ian profiton, kaj ekintencas profiti la okazon. Tiuj sinjoraj moŝtoj estas pli stultaj ol porkoj. La fakto, ke la Komunista Partio de Ĉinio kuraĝas senrezerve mobilizi la amasojn kaj konduki grandskale la kulturalan revolucion, montras ĝuste tion ke nia lando estas potenca, nia ŝtatpotenco estas solida kaj nia tutlanda popolo estas en kompakta unuiĝo. Ĉu tio ne estas evidenta?

Ankoraŭ pli grava estas tio, ke tiu granda kultura revolucio celas ĝuste elradiki la socian bazon de imperiismo kaj moderna reviziismo, preventi la uzurpadon de la gvidanteco de la Partio kaj ŝtato fare de reviziistoj kaj la restarigon de kapitalismo. Tio estas granda disvolvado de marksism-leninismo fare de kamarado Maŭ Zedong. Tial, ni povas definitive diri al niaj amikoj,

ke tiu nia senprecedenca granda kultura revolucio estas efektive treege peza bato al imperiismo, moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj. Krom elreviĝo, ili povos akiri absolute nenion. Ni ŝatus demandi: Ĉu la usona imperiismo kaj moderna reviziismo de Sovetunio kuraĝas aŭ ne konduki en siaj landoj tian grandan kulturalan revolucion kian ni kondukas en Ĉinio? Mi povas kategorie diri ke ili ne kuraĝas!

La venko de tiu ĉi granda kultura revolucio certe pluaparte plifirmigos la diktaturon de la proletaro en nia lando, garantios ke la ĉina popolo kondukos la socialisman revolucion ĝis la fino, kaj ke la socialisma konstruado de nia lando iros glate, kaj preparos kondiĉojn por realigi komunismon en la estonteco. Tiamaniere, la ĉina popolo, kiu konsistigas kvaronon de la tutmonda loĝantaro, povos fari ankoraŭ pli multajn, pli grandajn internaciismajn subtenon kaj kontribuon al la progressa afero de la popoloj de Azio kaj Afriko kaj de la tuta mondo.

Geamikoj kaj gekamaradoj!

La granda kultura revolucio, kiun nia popolo nun kondukas, estas granda praktiko de la penso de Maŭ Zedong. La penso de Maŭ Zedong estas la direktilo kiu gvidas tiun ĉi grandan kulturalan revolucion.

La penso de Maŭ Zedong estas marksism-leninismo kreive disvolvita en la praktikado de la ĉina revolucio dum longa periodo; ĝi estas marksism-leninismo kreive disvolvita en la granda batalo de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo, moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj. La penso de Maŭ Zedong estas la sola orientilo de la ĉina popolo por konduki socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon kaj ankaŭ potenca armilo de la ĉina popolo por venki imperiismon kaj modernan reviziismon. La penso de Maŭ Zedong estas la kulmino de marksism-leninismo en la nuna epoko, la plej alta, plej viva marksism-leninismo.

Geamikoj kaj gekamaradoj! Vi certe komprenas, ke la suferplena ĉina popolo akiris la nunan venkon post 109-jara batalado. Por povi akiri la hodiaŭan venkon ni trapasis zigzagan, kompleksan kaj penigan vojon de batalo, malvenko, denove batalo, denove malvenko, denove batalo... ĝis venko. Por formovi la tri montegojn — imperiismon, feŭdismon kaj burokrat-kapitalismon kiuj subpremis la ĉinan popolon, multaj serĉis diversajn ideologiojn kaj metodojn kaj iris malsamajn vojojn. Ni vojaĝis tra la tuta mondo serĉante metodon por liberigi nin de mizero kaj sufero, tamen, ĉiuj ideologioj estis senefikaj kaj ĉiuj vojoj kondukis al nenio. La faktoj instruis al la ĉina popolo ke, krom kredi al la penso de Maŭ Zedong, ĝi povas plu kredi al neniu alia. Resumante la spertojn de la revolucia batalo de nia lando de dekoj da jaroj, precipe tiujn de long-perioda sangverŝado kaj malvenkoj, kaj koncentrate ilin en unu punkton, ni venas al tio: Nur la penso de Maŭ Zedong povas savi Ĉinion, kaj sen la penso de Maŭ Zedong ne estus nova Ĉinio. Ni kredis diversajn ideologiojn kaj provis variajn sistemojn, sed ili ĉiuj finiĝis per malvenko. Kiam ni kredis la penson de Maŭ Zedong — la kombino de marksism-leninismo kun la praktiko de la ĉina revolucio, ni venkis. El nia persona sperto ni ĉina popolo profunde komprenas, ke la penso de Maŭ Zedong estas nia vivradiko kaj ke la vortoj de Prezidanto Maŭ estas la plej alta instrukcio por ĉiuj niaj laboroj.

Nun, kun la profunda disvolviĝo de la batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj kontraŭ nova kaj malnova koloniismoj, en diversaj partoj de la mondo, precipe en la regionoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, pli kaj pli multe da homoj volas studi la penson de Maŭ Zedong. Al tio ke niaj amikoj deziras ĝin studi, ni esprimas varman bonvenigon, kaj rigardas tion kiel kuraĝigon kaj instigon al la ĉina popolo.

La ĉina popolo nepre sekvos la instruon de Prezidanto Maŭ kaj pli modeste lernos de la revoluciaj popoloj de la tuta mondo, precipe de la luktantaj, heroaj popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko. La ĉina popolo dankas al diverslandaj popoloj de Azio kaj Afriko pro iliaj subteno kaj helpo al ni. La revoluciaj popoloj de la tuta mondo, kiuj staras ĉe la plejfronto de la batalo, ĉiuj estas niaj instruantoj, kaj ni volas esti iliaj lernantoj. Sub la konduko de la penso de Maŭ Zedong, la ĉina popolo kune kun la popoloj de Azio kaj Afriko kaj de la tuta mondo dediĉos sian plej grandan forton por oponi kontraŭ imperiismo, moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj kaj subteni la justajn batalojn de ĉiuj subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj.

Geamikoj kaj gekamaradoj! Imperiismo kaj ĝiaj sekvantoj estas mal-kontentaj kontraŭ tiu ĉi Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj kaj malamegas la kontraŭimperiismajn kaj kontraŭkoloniismajn literaturon kaj arton de Azio kaj Afriko. Vi kunvenas ĉi tie, tio mem estas grava venko por la amikeco kaj solidareco de la aziaj kaj afrikaj verkistoj. Pere de viaj klopodoj, tiu kunveno certe faros novan kontribuon en akcelado de la revolucia unuiĝo de la verkistoj de Azio kaj Afriko. Samtempe, mi kredas, ke dank' al la penado de vi ĉiuj, la kontraŭimperiismaj, kontraŭkoloniismaj revoluciaj literaturo kaj arto de Azio kaj Afriko certe havos novan disvolviĝon, kaj ludos pli grandan batalan rolon en la nobla afero de unuiĝo de la aziaj kaj afrikaj popoloj kontraŭ imperiismo. En la nomo de la Ĉina Registaro kaj ĉina popolo mi deziras al via kunveno plenan sukceson!

Vivu la granda unuiĝo de la popoloj de Azio kaj Afriko!

Vivu la granda unuiĝo de la popoloj de la tuta mondo!

Certe venkos la popoloj de Azio kaj Afriko!

Certe malvenkos imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj!

Plena Sukceso de Urga Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj

Tiu ĉi senprecedence granda kunveno de aziaj kaj afrikaj verkistoj estas nova venko de la unuiĝo de aziaj kaj afrikaj popoloj kontraŭ imperiismo kaj nova mejloŝtono de la movado de aziaj kaj afrikaj verkistoj.


Dum la legado de la rezolucioj, la delegitoj varme aklamis al kamarado Maŭ Zedong, kriante: “Vivu Maŭ Zedong! Vivu eterne!”




Per manklakado la fremdlandaj amikoj salutas Prezidanton Maŭ, kiu reciprokas per la samo.




Prezidanto Maŭ Zedong akceptas la delegitojn kaj observantojn, kiuj ĉeestis



la Urĝan Kunvenon de Azi-Afrikaj Verkistoj, kaj estas fotografata kun ili.



Ĉefministro Ĝou Enlaj kaj aliaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj tostas en la bankedo kiun ili aranĝas por varme gratuli la sukcesan fermiĝon de la Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj.



La Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj


Forte Bati per Plumo la Usonan Imperiismon kaj Sovetian Reviziistan Klikon, la Komunajn Malamikojn de la Popoloj de Azio kaj Afriko

Raporto al la Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj Farita de D. Manuweera anstataŭ la Ĝenerala Sekretario de la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj

Karaj kolegoj,

Permesu al mi, antaŭ ĉio, esprimi varman kaj fratan bonvenigon al vi ĉiuj delegitoj kiuj, responde al nia invito, venis el diversaj landoj, proksimaj kaj malproksimaj, en la du kontinentoj de Azio kaj Afriko, por ĉeesti tiun ĉi Urĝan Kunvenon de Azi-Afrikaj Verkistoj. Kiel vi scias, ni kunvokis tiun ĉi Urĝan Kunvenon, ĉefe por plenumi la neforpuŝeblan devon de ni verkistoj, la progresemaj verkistoj de Azio kaj Afriko, tio estas, doni nian firman subtenon al la heroo popolo de Vjetnamio en ĝia vivmorta luktado kontraŭ la usonaj imperiistoj por liberigi la Sudon, defendi la Nordon kaj reunuigi sian patruŝlandon.

Permesu al mi ankaŭ esprimi unue por la Konstanta Buroo, miajn plej profundajn dancojn al la Unio de Ĉinaj Verkistoj pro ĉiuj faciligoj, kiujn ĝi disponigis al ni por okazigi



Ĝenerala Sekretario de la Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj D. Manuweera faras la inaŭguran paroladon.

la kunvenon ĉi tie, en Pekino, la fama ĉefurbo de la Ĉina Popola Respubliko, la granda lando de 700-miliona popolo, kiu, alte tenante la standardon de Maŭ Zedong, staras sur la plejfronto de la monda revolucio.

LA BRILAJ VENKOJ DE LA VJETNAMA POPOLO EN LA HEROA BATALO PRUVAS AL LA MONDO, KE LA USONA IMPERIISMO POVAS ESTI VENKITA

Karaj kolegoj,

La brava lukto de la vjetnama popolo kontraŭ la usonaj agresantoj fariĝis, hodiaŭ, la fokuso de atento por ĉiuj kontraŭimperiismaj popoloj kaj fortoj en la mondo, precipe en Azio kaj Afriko. Senskrupule tretante la Ĝenevajn Interkonsentojn, tute ignorante la

tutmondan kondamnado kaj komplete neglektante ĉiun respekton por suvereneco kaj sendependeco, la usonaj imperiistoj vekis la malamon kaj indignon ne nur de la vjetnama popolo, sed ankaŭ de ĉiuj popoloj de la mondo, kiuj amas emancipiĝon, liberecon kaj pacon.

Fronte al senespera dilemo, fronte al nacio kiu decidas batali ĝis la liberiĝo de sia lando, la usonaj imperiistoj faras blindan eskaladon en sia agresa milito en suda Vjetnamio. Ili jam sendis tien agresajn trupojn kun pli ol 275,000 personoj kaj varbis siajn lakeojn, la registarojn de Filipinoj, Tajlando, Aŭstralio kaj Novzelando, kaj la Pak Ĝeng Hi Klikon, por liveri pli multe da kanonfuraĝo aŭ akceli kaj plifortigi ties materian kunlaboron en sia agresado. La usonaj imperiistoj faras freneze sendistingajn bombadojn per aviadiloj kiaj tiuj de tipo B-52 kontraŭ lernejoj, malsanulejoj, loĝdomoj kaj lokoj de religia adorado, mortigante senkulpajn virojn, virinojn kaj infanojn. Ili kruele uzas en senprecedenca skalo venenan gason kaj toksajn kemiaĵojn de alta denseco por mortigi popolon, detrui grenplantojn, brutojn kaj kortbirdojn. Ili faris krimojn de la plej malbonaj formoj kun monstra brutaleco senkompara en la homa historio. La usona imperiismo planas dronigi sudan Vjetnamion en sangan maron per sia politiko "mortigi ĉiun, bruligi ĉion kaj detrui ĉion". Ĝi kreis, krome, tiel nomatajn "strategiajn vilaĝojn", kiuj estas neniom malpli ol koncentrejoj, kaj en kiuj dekoj da miloj da senkulpaj popolanoj estas malliberigitaj.

Tiu ĉi nova kaj vana eskalado en sia milito por subigi la vjetnaman popolon plue pruvas, unuflanke, ke la usona imperiismo estas la malamiko n-ro 1 de ĉiuj progresemaj kaj pacemaj popoloj de la mondo, kaj montras, aliflanke, ke la usona imperiismo jam trovas sin en senespera pozicio en suda Vjetnamio. Tio pruvas, unuflanke, ke la usona imperiismo volas returni, per ĉiuj fortoj, sian malfavoran situacion en suda Vjetnamio, kaj montras, aliflanke, ke la firmeco de la vjetnama popolo en rezistado kontraŭ la usonaj agresantoj fariĝas pli profunda kaj pli forta. Tio pruvas, unuflanke, ke la usona imperiismo neniel ŝanĝos sian militeman naturon antaŭ ol esti tute venkita, kaj montras, aliflanke, ke estas homoj, sed ne armiloj, kiuj formas la decidigan

faktoron en batalo por libereco. Ju pli la usonaj imperiistoj eskaladas en sia milito, des pli proksime ili sin tiras al sia fatalo en Vjetnamio. Ju pli ili eskaladas en sia milito, des pli grandaj estas la brilaj venkoj gajnataj de la heroa vjetnama popolo. Neniaj sovaĝaĵoj povas malfortigi la feran volon de la suda vjetnama popolo batali ĝis la fina venko estos atingita.

Batalante kun senkompara heroeco, la Liberiga Armeo kaj popolo de suda Vjetnamio venkas kaj detruas la usonajn agresantojn ĉie en suda Vjetnamio, en la urbo kaj en la ĝangalo; en la ĉirkaŭ-urbo kaj en la vilaĝo. Por la brava kaj heroa vjetnama popolo, ĉie en suda Vjetnamio estas la bataalkampo. La agresantoj estas atakitaj de la fronto kaj de la postfronto. Iliaj flugkampoj estas eksplodigataj kaj ankaŭ iliaj barakoj kaj loĝdomoj estas bombataj, kaj dekoj da miloj da banditaj armeanoj estas mortigitaj. La tiel nomataj strategiaj vilaĝoj estas detruitaj kaj ŝanĝitaj en batalantajn vilaĝojn. Kaj Sajgono, la nesto de la usonaj imperiistoj kaj ilia pupa kliko, estas sukcese lokita, hodiaŭ, en la "pafdistancon" de la gerilanoj. La usonaj agresantoj, la pupaj trupoj kaj la dungitaj trupoj estas ekstermataj po miloj ĉiutage en diversaj partoj de suda Vjetnamio.

Karaj kolegoj,

Kion la brilaj venkoj atingitaj de la heroa sud-vjetnama popolo montris al ni? Kian lecionon ili donis al la mondo? La senkomparaj venkoj gajnitaj de la popolo de suda Vjetnamio pruvis al la mondo, ke la usona imperiismo ne estas nevenkebla. Vjetnamio klare demonstris ke sagoj, sabroj kaj bambuaj pikiloj en la manoj de liberama, revolucia popolo, estas multe pli potencaj ol la bomboj, kugloj kaj misiloj de la imperiistoj. Vjetnamio plene montris al ni, ke neniam armiloj kaj neniam trupoj de imperiismo povas sieĝi kaj faligi la potencan bastionon de popolo batalanta por sia nacia liberiĝo. Vjetnamio pruvis, nedubeble, al la mondo, ke ĉiuj arogantaj provoj de la imperiistoj por sklavigi kaj ekspluati popolon renkontos finfine katastrofajn malvenkojn. Vjetnamio tute deŝiris la maskon de la usona imperiismo kaj malkovris ĝian veran, ferocan naturon al la mondo. Estas en Vjetnamio ke la usona imperiismo estas

pruvita nenio alia ol disiĝanta kaj mortanta forto, rapide proksimiĝanta al sia pereco. Kaj estas en Vjetnamio ke ni vidas ke armita lukto estas la ununura metodo por trakti ĉiujn imperiistojn, novajn kaj malnovajn koloniistojn, estratajn de Usono.

Kvankam la usona imperiismo estas en sia mortlita barakto en suda Vjetnamio, tamen ĝi penas ankoraŭ per ĉiuj rimedoj por aliro sin al suda Vjetnamio ĝis la lasta momento. Antaŭ tute nelonge, Johnson-registaro komencis retiri pli multe da trupoj el Okcidenta Eŭropo por fortigi sian armeon konsiston kaj plivastigi sian agresan militon en suda Vjetnamio. Tiu ĉi eliro de usonaj imperiismaj trupoj el Okcidenta Eŭropo por transsendi ilin en sudan Vjetnamion havas, kiel ni scias, la silentan konsenton kaj kunlaboron de granda tiel nomata socialisma potenco en Eŭropo por permesi al la usona imperiismo libere daŭrigi siajn agresajn agadojn. Kaj tio ankaŭ logike pruvas, ke la usona imperiismo nun spertas absolutan nesufiĉon de homforto por sia agreso en Vjetnamio. Tio estas okulfrapa pruvo de la fakto ke la rapideco de la ekstermiĝo de la usonaj agresaj trupoj sub la manoj de la patriotaj armitaj fortoj, gvidataj de la Nacilibera Fronto de Suda Vjetnamio, ĉiam pli altiĝas kaj la usona imperiismo estas ĉe la limo de sia kapablo en suda Vjetnamio.

Malespere baraktante por eliri la senelirejan strateton en kiun ili ellasis sin en suda Vjetnamio, la usonaj imperiistoj eskaladis en sia milito de agreso ĝis la Demokratia Respubliko de Vjetnamio, Kamboĝo kaj Laoso kaj eĉ minacas Ĉinion. Ili freneze bombas la Demokratian Respublikon de Vjetnamio, senskrupule trudas sin en ĝian teritorion kaj krude provokas ĝin. Per sia malnobla kaj barbara agreso kontraŭ la popolo de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio, la usona imperiismo esperas timigi kaj devigi tiun al submetiĝo. Ĝi esperas malfortigi la batal-kapablon de la heroo popolo de norda Vjetnamio. Sed la kuraĝa popolo de norda Vjetnamio, kiu estas hardita en batalo, donis al la agresantoj pezajn batojn, instruante ilin pri la universa vero ke revolucia popolo ne povas esti timigita aŭ subigita de ili aŭ imperiistoj de iu ajn marko, tute egale kiajn armilojn ili aŭ tiuj uzas. Ni plene

subtenas ĉiujn rimedojn, kiujn alprenas la popolo de norda Vjetnamio por defendi siajn suverenecon kaj sendependecon. La antaŭnelonga entrudiĝo en la teritorion de la Ĉina Popola Respubliko fare de la aviadiloj de usonaj agresantoj kaj faligo de unu ĉina aeroplano kiu estis en trejna flugado, estas klara pruvo de la ekspansio de la usona agresita milito en Vjetnamio al aliaj teritorioj. Ni severe kondamnas ĉi tiun senbridan provokan agon de la usona imperiismo kontraŭ la Ĉina Popola Respubliko. Kaj ni tute aprobas la firman pozicion tenatan de la heroo ĉina popolo por defendi sian teritorion integrecon kaj sian grandan socialisman ŝtaton.

PSEŬDOREVOLUCIULOJ KOLPORTAS TROMPON DE "PACA INTER- TRAKTADO" DE USONA IMPERIISMO, PERFIDAS LA VJETNAMAN POPOLON KAJ VANE PROVAS REALIGI LA INTRIGON SUPERREGI LA MONDON PER DU POTENCOJ

Vane intencante sin savi el la neforskuebla embaraso en suda Vjetnamio, el la marĉo en kiu ĝi dronas pli kaj pli profunden, Johnson-registaro provis ĉiuspecajn intrigojn kaj artifikojn por trompi la vjetnaman popolon. Dum pliigo de sia milita forto en suda Vjetnamio, dum sia freneza bombado al la Demokratia Respubliko de Vjetnamio kaj dum ekspansiigo de sia agreso en aliajn teritoriojn, Johnson laŭte babilas pri "paca intertraktado", "senkondiĉa diskuto" kaj "sociaj reformoj" por kovri siajn militajn movojn en provado kvietigi la indignon de la popolo de suda Vjetnamio kaj igi ĝin formeti siajn armilojn. Sed la popolo de suda Vjetnamio scias kaj la mondo scias, ke malantaŭ tiu ĉi maldika vualo de ruza artifaĵo sin kaŝas la agresiva vizaĝo de la usona imperiismo kaj ĝia insida motivo atingi trans la tablo kion ĝi ne povas gajni en la batalo. La vjetnama popolo scias kaj la mondo scias, ke "paca intertraktado" kun la agresantoj ne alportos la veran pacon kiun ĝi deziras. La vjetnama popolo scias kaj la mondo scias, ke "senkondiĉa diskuto" nur igos ĝin senkondiĉe kapitulaci

al la agresantoj. Kiel oni povas paroli pri “diskuto” kaj “intertraktado” kun la murdistoj? Kiel oni povas paroli pri “diskuto” kaj “intertraktado” kun la piratoj, kiuj pri-rabis ilian landon?

Historio estas plena je okulfrapaj ekzemploj pruvantaj la nerefuteblan veron ke libero kaj paco povas esti gajnitaj nur per revolucia batalo kaj nur per venko super kaj detruo de la agresantoj. La vjetnama popolo devas ankaŭ trairi por sia libereco tiun saman vojon, kiun ĉiuj subpremataj nacioj kaj popoloj trairis por sia libereco en la pasinteco. Tiuj evidentaj trompoj de Johnson estos ĵetitaj en rubujon de historio, kun meritata malestimo. Ni aziaj kaj afrikaj verkistoj firme subtenas la kvar-punktan pozicion de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio kaj la kvinpunktan deklaron de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio. La usona imperiismo devas ĉesigi tuj sian agreson kontraŭ la tuta Vjetnamio, retiri ĉiujn agresajn trupojn el suda Vjetnamio kaj rekoni la Naciliberigan Fronton de Suda Vjetnamio kiel la solan reprezentanton de la popolo de suda Vjetnamio. La problemo de Vjetnamio devas esti solvata de la vjetnama popolo mem.

Karaj kolegoj,

Kiam la usona imperiismo vekis la malamon kaj indignon ne nur de la vjetnama popolo, sed ankaŭ de ĉiuj pacamaj kaj liberamaj popoloj de la mondo, kaj kiam ĝi estas ĉe la rando de sia tombo, estas kelkaj homoj kiuj memvole elpaŝas por savi ĝin. Tiuj tiel nomataj revoluciuloj hodiaŭ fariĝis unu el la plej grandaj defendantoj de la usona imperiismo. Ili hodiaŭ fariĝis la ĉefa kunligano de la usona imperiismo. Ili kunordigis siajn intrigon kaj agojn kun tiuj de la usona imperiismo por superregi la mondon. Ili jam tute kapitulacis al la usona imperiismo kaj tiel perfidis la naciliberigajn batalojn en Azio, Afriko kaj Latinameriko. Ili estas pli danĝeraj ol la usonaj imperiistoj mem, ĉar ili estas lupoj en feloj de ŝafoj. Ŝajnigante subteni la vjetnaman popolon, ili intrigas kaj planas en komploto kun la usonaj imperiistoj por malhelpi la batalon de vjetnama popolo. Laŭte deklarante ke ili subtenas la vjetnaman popolon liberigi sudan Vjetnamion kaj defendi la Demokratian Respublikon de Vjetnamio, ili kolportas ĉirkaŭ

la mondo la eluzitan trompon de “paca intertraktado” de la usonaj imperiistoj por igi la vjetnaman popolon kapitulaci al la agresantoj. Sed, dum sia kolportado tra la mondo, tiuj hipokritaj revoluciuloj pruviĝis same malkompetentaj kiel triaklasa, ne, kvaraklasa vendisto. Forpelitaj de la popolo, ili reiris hejmen kun siaj varoj. Tiuj politikaj vendistoj, kiuj negocas pri la sorto de la aziaj kaj afrikaj popoloj, ne volas rekoni sian fiaskon kaj daŭre kolportas siajn malpurajn varojn. Antaŭ nelonge, ili elmetis ĉirkaŭparole la tiel nomatajn kvin “antaŭkondiĉojn” de “paca intertraktado” por la solvo de la vjetnama problemo. Ili parolas pri la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio, la sola legitima reprezentanto de la popolo de suda Vjetnamio, kiel “kompaniulo en la traktado”. Ili uzas tiajn frazojn kiaj usonaj trupoj “komencas sin retiri” kaj “ĉesas plimultiĝi” responde al la kriado de Johnson pri “laŭperioda” retiro de trupoj. Ili fakte nur parolas sed ne retiriĝas. Krome, sub tiaj kovriloj kiaj “internaj aferoj” de kaj “mem-decido” por suda Vjetnamio, ili provas teni Vjetnamion por ĉiam dividita kaj tiel malhelpi la vjetnaman popolon realigi la reunuiĝon de sia patrolando. La sinteno de tiuj senhontaj renegatoj al la justa kaj heroa batalo de la vjetnama popolo plene malkaŝis sian degenerintan, malhonoran kaj malestimindan naturon kaj la kapitulacisman linion kiun ili sekvas. Provante vendi la trompon de “paca intertraktado” de la usona imperiismo, tiuj falsaj revoluciuloj fakte provas vendi la popolon de suda Vjetnamio en vana klopodo por realigi la intrigon de superrego de la mondo per du grandaj potencoj. Ĉiuj iliaj memnomataj sinceraj proponoj por solvi la vjetnaman problemon montras, ke ili plene kunlaboras kun la usona imperiismo por daŭrigi ĝian subpremon al la popolo de suda Vjetnamio. Ne grave, kian kapitulacisman propagandon ili faras, kaj kiajn metodojn ili uzas por blankigi la usonan imperiismon, la popolo de Vjetnamio kaj ĉiuj popoloj tra la mondo, kiuj jam elektis la linion de revolucio, ne estos trompitaj de tiuj renegatoj. La vjetnama popolo kredas, ĉiuj revoluciaj kaj progresemaj popoloj tra la mondo kredas ke venko certe apartenos al la popolo de Vjetnamio. Ni, aziaj kaj afrikaj verkistoj, severe kondamnas

la krimajn intrigojn de tiuj renegatoj kaj alvokas la verkistojn kaj popolojn de Azio kaj Afriko sin levi kiel unu homo por kune denunci kaj eljeti ilin.

EN LA NUNA INTERNACIA SITUACIO LA ORIENTA VENTO SUPERAS LA OKCIDENTAN. LA REVOLUCIA BATALO DE LA AZIAJ, AFRIKAJ KAJ LATINAMERIKAJ POPOLOJ CERTE FRAKASOS LA USONAN IMPERIISMON

Karaj kolegoj,

Ni kunvenas ĉi tie, hodiaŭ, fronte al granda ŝanĝo, pli granda ol iam ajn, en la nuntempa internacia situacio. Kaj en la procezo de tiu ĉi ŝanĝo ni vidas ŝvelantan tendencon kiu rapide disvolviĝas, pli rapide ol iam ajn, tra la mondo, precipe en Azio kaj Afriko. Ĝi estas tendenco kiu karakteriziĝas per ŝvelanta furioza batalo, pli furioza ol iam ajn, kontraŭ ĉiuj fortoj de imperiismo, estrata de Usono, kaj ĉiuj iliaj lakeoj. Ĝi estas batalo inter du malsamaj fortoj, la forto de revolucio kaj forto de kontraŭ-revolucio. Ĝi estas batalo en kiu milionoj kaj milionoj da popolo, kiu batalas por sia liberiĝo, direktiĝas al sia venko, dum la imperiistoj, estrataj de Usono, kaj iliaj lakeoj direktiĝas al sia pereco. Neniam en la historio de la mondo la usona imperiismo estas tiel izolita kiel hodiaŭ. Neniam en la historio de la mondo la usona imperiismo suferis tiajn katastrofajn malsukcesojn kiel hodiaŭ. Neniam en la historio de la mondo la usona imperiismo estas pruvita tiel malforta kaj vundebla kiel hodiaŭ. La politika konscio kaj la revolucia spirito de la popolo, precipe tiuj en Azio kaj Afriko, sin levis ĝis tia alteco ke, hodiaŭ, ili ekprenis armilojn kaj faras firman batalon kontraŭ la imperiistoj estrataj de Usono kaj iliaj lakeoj, kiuj de jardekoj ilin subpremas. Jes, la orienta vento nun superas la okcidentan. Nenia forto de la usona imperiismo, nenia forto de ĝiaj lakeoj, povas iam estingi la furiozantan fajron de revolucio kiu disvastiĝas en la mondo, speciale en Azio kaj Afriko. Ĝi ne povas eviti esti jetita kaj frakasita kontraŭ rokojn de la potenca ŝtormo de la popola batalo, kiu transbalaas la kontinentojn de

Azio, Afriko kaj Latinameriko. La usona imperiismo, per ĉiuj krimaj agresoj, kiujn ĝi faris kontraŭ popolo laŭ sia politiko de kontraŭrevolucia tergloba strategio, preparis la vojon por sia propra finiĝo.

Tiel, ni vidas ke la situacio por la revoluciaj kaj progresemaĵoj movadoj en la internacia kampo eniras en novan stadion. En multaj landoj de la mondo la popolo leviĝis kaj faras decidan batalon kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kaj pupoj. Ili kondukas firman batalon por gajni sian nacian sendependecon kaj pacon aŭ gardi la sendependecon kiun ili jam gajnis.

La popolo de Kamboĝo starigis ekzemplon de firma batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj ties manovroj celantaj subfosigi ĝian suverenecon kaj neŭtralecon kun helpo de siaj lakeoj en Bangkoko kaj Sajgono. Ne estas sekreto ke la usonaj imperiistoj, en komploto kun iliaj lakeoj, preskaŭ ĉiutage faras agreson sur la landlimoj de ĉi tiu paca lando. Ili senskrupule agresas ĝian aerspacon kaj minacas la sekurecon de la vivo de ĝia popolo.

Antaŭ nelonge, la usonaj imperiistoj, en serĉado de preteksto por pravigi siajn provokajn paŝojn por ataki Kamboĝon, kalumnie akuzis ĝin pri kaŝo de fremdaj trupoj. La popolo de Kamboĝo ne nur refutis tiujn malverajn akuzojn, sed ankaŭ postulis la usonajn imperiistojn prui siajn akuzojn. Ni plene subtenas la patriotan popolon de Kamboĝo en ĝia firma batalo kontraŭ la malicaj atakoj fare de la usonaj agresantoj kaj ĝiaj naciperfiduloj por defendi la nacian sendependecon, teritorian integrecon, neŭtralecon kaj pacon.

En Laoso, la laosaj patriotaj fortoj kaj popolo kondukas heroan batalon kontraŭ provoj de la usonaj imperiistoj penetri en ĝian teritorion por subfosigi ĝian naciliberigan movadon. La usonaj imperiistoj utiligas siajn lakeojn, la tajlandajn trupojn, por trudiĝi en la teritorion de Laoso kaj ataki kune kun la laosaj dekstraj trupoj la patriotajn armitajn fortojn kaj popolon de tiu ĉi lando.

Dum la pasintaj du jaroj, diversaj tipoj de usonaj aviadiloj freneze bombadis la liberigitajn regionojn de Laoso. Malsukcesis la vanaj provoj de la usonaj imperiistoj kaj iliaj lakeoj, dum la pasintaj du jaroj, por devigi la laosan popolon rezigni sian nesengeblan rajton vivi

kiel libera nacio. Iliaj estontaj provoj por subigi la laosan popolon suferos ankaŭ la samon.

La usonaj imperiistoj alfrontas pli grandajn malfacilojn en Tajlando mem, kies trupojn ili utiligas por fari agreson kontraŭ suda Vjetnamio, Kamboĝo kaj Laoso. Kolektiĝante ĉirkaŭ la Tajlanda Partiota Fronto, la popolo de Tajlando kondukas unuigite batalon kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝia loka pupa reĝimo por gajni verajn liberon, pacon kaj progreson.

En suda Koreio, la faŝisma milita reĝimo starigita de la usonaj imperiistoj kun la helpo de iliaj lakeoj ekŝanceliĝis sub la fortaj batoj de la patriota popolo de suda Koreio. La usona imperiismo malhelpas senĉese, dum la pasintaj 20 jaroj, la reunuiĝon de Koreio kaj kruele subpremis ĝian popolon. Per la krima "Traktato inter Japanio kaj Suda Koreio" farita en komploto kun Pak Ĝeng Hi kliko, la usona imperiismo ne nur provas konservi sian kruelan regadon en suda Koreio, sed ankaŭ daŭrigi sian politikon de agresio. Ĝi provas nun per ĉiuj fortoj efektiviĝi la tiel nomatan "Nordorient-Azian Militan Aliancon" kaj utiligi ĝin por eviti sian kolapson en suda Koreio kaj ankaŭ en aliaj partoj de Azio, kie ĝi faras agreson.

Kiajn ajn manovrojn ĝi faras, la usona imperiismo ne povas plue daŭrigi sian subpremon al la korea popolo. Ĝi ne povas plue malhelpadi la korean popolon reunuiĝi sian landon. La tagoj de ĝia nedezirata, kontraŭleĝa restado en suda Koreio estas certe malmultaj.

En Japanio, ĉiam pli potence progresas la firma batalo de la popolo kontraŭ la usona imperiismo kaj kontraŭ la reakcia Sato-registaro, kiu ludas la rolon de fidela lakeo de la usona imperiismo. Ĉiu scias ke usonaj militaj bazoj en Japanio, kiuj proksimume nombriĝas du cent, estas ĉefaj instrumentoj de la agresiva strategio de la usona imperiismo kontraŭ Azio. Plej grave, la insuloj de Okinava, kvankam ili estas teritorio de Japanio kaj enloĝataj de la japana popolo, estas transformitaj en gigantan nuklean bazon de la usona imperiismo kaj estas plene utiligataj por la agresiva milito de la lasta kontraŭ la popolo de Vjetnamio. Tial, la batalo de la japana popolo, inkluzive la loĝantojn de Okinava, por la redono de tiu teritorio al Japanio celas ne nur al la restatigo de administraj rutinoj de la Japana Registaro, sed ankaŭ al la elpelo el ili de la usona armeo kaj la elradiko

de ĉiuj militaj bazoj. Ni opinias ke la japana popolo devas reakiri la kompletan suverenecon de la insuloj de Okinava, ĝia legitima teritorio.

Unu el la plej gravaj celoj de la batalo de la japana popolo estas aboli la "Uson-Japanan Sekurecan Traktaton", kiu estas ne nur la kerno de la usona superregado de Japanio en milita, politika, ekonomia kaj kultura kampoj, sed ankaŭ tiu de la agresiva alianco inter la usonaj imperiistoj kaj la japanaj reakciuloj. Tial, estas tute nature, ke la japana popolo, kiu aspiras al veraj sendependeco kaj paco, devas konduki senkompatan batalon kontraŭ la "Uson-Japana Sekureca Traktato" kaj la "Traktato inter Japanio kaj Suda Koreio", kiu estas la pivoto de "NEATO" (Nordorient-Azia Traktato-Organizo) kaj kontraŭ la intrigoj por revivigi japanajn militarismojn kaj ekonomian ekspansion.

La heroo popolo de Japanio, sub forta premo de la usona imperiismo kaj la reakcia japana reganta grupo surirantaj la danĝeran vojon de milito, volas nepre atingi, je ajna kosto, pacon, sendependecon kaj progreson por esti veraj amikoj de la popoloj de Azio kaj Afriko.

La lukto de la popolo de Pakistano por defendi sian nacian sendependecon kaj gardi sian landon kontraŭ la ekspansiismaj aventuroj de iuj aliaj estas lukto justa kaj sankta. La patriota popolo de Pakistano, kiu havas riĉan tradicion de batalo kontraŭ imperiismo kaj koloniismo, ne permesos la usonan imperiismon aŭ ĝiajn lakeojn detrui iliajn sendependecon kaj suverenecon. La patriota popolo de Pakistano scias, kiuj estas ĝiaj amikoj kaj kiuj ĝiaj malamikoj, kaj tial, ĝi ne povas esti timigita aŭ devigita de la usona imperiismo aŭ iu ajn el ĝiaj lakeoj kaj apologiistoj oferi sian malfacile akiritan liberecon.

La popolo de Kaŝmiro nun alproksimiĝas al sia celo de memdecido per alpreno de firma starpunkto kontraŭ ĉiuj insidaj agoj, kiuj estas aktive subtenataj de la usonaj imperiistoj kaj falsaj revoluciuloj, por uzurpi ĝian landon fare de tiuj kiuj havas neniun rajton. Senhonte malobservante la komunajn interkonsentojn, tiuj reakciaj najbaroj de Kaŝmiro faras senĉese agresadon kontraŭ la pacama popolo de Kaŝmiro kaj senigas ĝin je rajto elekti sian propran sorton. Tiuj agresaj agoj ricevis plenajn benojn kaj senrezervan subtenon de la usonaj imperiistoj

kaj iliaj kunlaborantoj. Tiuj ĉi kunlaborantoj malkaŝe helpas la reakciajn ekspansiistojn subpremi la liberigan movadon de la kaŝmira popolo. Sed la tago ne estas fora kiam la popolo de Kaŝmiro uzos sian neneigeblan rajton decidi sian propran estontecon.

La hinda popolo estas nun en abismo de sufero. Spite la brutalan subpremado de la hindaj aŭtoritatoj, la popolo de Hindio kondukas grandskalan kontraŭmalsatan kaj kontraŭsubpreman batalon, kiu gajnis la simpatian kaj subtenon de la progresemaj popoloj en Azio kaj Afriko.

La kontraŭusona movado en Filipinoj, lastatempe, ankaŭ intensiĝis, kaj progresema, nacikonscia popolo de Filipinoj forte oponas la usonan influon en sia lando.

En Malajo, dank' al la nefleksebla batalo de la Malaja Nacia Liberiga Armeo, ĝia popolo, dum la lastaj 18 jaroj, kuraĝe rebatis plurajn koncentritajn atakojn de la britaj trupoj subtenataj de Usono multoble pli grandaj ol ĝi kaj ekipitaj per jetoj, bombaviadiloj, tankoj kaj aliaj modernaj mortigaj armiloj. Tial, la britaj imperiistoj estas devigitaj, foje kaj refoje, konfesi la malsukceson de sia armita subpremo. Por savi sian ŝanceliĝantan kolonian regadon, ili uzis novajn politikajn manovrojn aldone al siaj militaj operacioj. Tiamaniere, la pupaj grupoj de Abdul Rahman kaj de Lee Kuan Yew estas surscenigitaj, kaj en la pasintaj naŭ jaroj, novkoloniismaj intrigoj estis elkovitaj unu post alia — la tiel nomata sendependiĝo de la Federacio de Malajo, la tiel nomata memregata stato de Singaporo, la tiel nomata "Malajzio" kreita helpe de la usona imperiismo, la de Usono kontrolata UNO kaj ĝiaj apologiistoj, la apartiĝo de Singaporo disde tiu ĉi novkoloniisma projekto "Malajzio" kaj, fine, la "dono" de tiel nomata sendependeco al sia obeema agento, Lee Kuan Yew grupo.

Tiuj ĉi britaj majstre elkovitaj "konstituciaj" artifikoj, kiel ajn ruze alivestitaj, estas iliaj malesperaj provoj por konservi sian kolonian regadon kaj servi al sia politiko de "Oriento de Suez" en kunordiĝo kun la usona tuttergloba strategio.

La progresema publika opinio de la mondo severe riproĉas la perfidajn agojn de tiuj falsaj revoluciuloj, kiuj senprokraste elpaŝis por helpi

la britajn imperiistojn en subtenado al la Lee Kuan Yew-a pupa registaro de Singaporo, kiu estas izolita internacie. Same kiel la milita ŝtatorenverso fare de la indoneziaj reakciuloj, la rekono de singapora pseŭda sendependeco fare de la Djakarta faŝisma reĝimo kaj la Bankokaj interparoloj inter Malik kaj Razak estis, ambaŭ, instigitaj de la usonaj kaj britaj imperiistoj kaj estas grava parto de ilia konspiro por subpremi la naciliberigajn movadojn de Malajo, de kiu Singaporo estas konsistiga parto, de norda Kalimantano, Indonezio kaj aliaj sudorientaj aziaj landoj.

La malaja popolo tute travidis tiujn intrigojn de la imperiistoj kaj falsaj revoluciuloj kaj intensigas sian lukton en ĉiu kampo por ekstermi imperiismon, estratan de Usono, kaj ĝiajn komplikojn. La kampanjo de malaja popolo por frakasi "Malajzion", renversi la pupajn reĝimojn de Kuala Lumpur kaj Singaporo kaj realigi la veran sendependecon de reunuiĝinta Malajo, kiu inkluzivas Singaporon, leviĝas al nova alteco kaj sendube estos kronita per sukceso.

Spite la brutan kaj daŭran subpremado de la britaj imperiistoj kaj iliaj lakeoj, Abdul Rahman kaj Lee Kuan Yew, la armita batalo de la popolo de norda Kalimantano por kompleta nacia sendependeco kaj kontraŭ la novkoloniisma projekto de "Malajzio" kontinuas plenforte kaj decideme. Malgraŭ la perfida ago de la milita diktaturo de Nasution-Suharto la popolo de norda Kalimantano donas baton post bato al la britaj imperiistoj kaj iliaj "malajziaj" lakeoj. La aziaj kaj afrikaj verkistoj subtenos ĉiam la popolon de norda Kalimantano en ĝia batalo por vera nacia sendependeco.

En landoj de la Meza Oriento la popoloj lanĉis batalon kontraŭ imperiismo por gardi sian nacian sendependecon. Ili estas unuigintaj por liberigi la okupitan Palestinon, la tiel nomatan Izraelon, obeeman ilon de la usona imperiismo kaj cionismo. Izraelo, kiel ni scias, estas kreita de la usona imperiismo kiel bazo por agresi la sendependajn arabajn regnojn kaj ankaŭ por enfiltriĝi en afrikajn landojn. Gvidate de la Palestina Liberiga Organizaĵo, la palestinaj araboj decidis nepre malsukcesigi la intrigon de la usona imperiismo kaj cionismo kaj regajni sian deuzurpitan landon. En sia lukto por reveni al sia patrolando, la palestina

popolo havas senrezervan subtenon kaj solidarecon de ĉiuj aziaj kaj afrikaj popoloj.

Kvankam la usonaj imperiistoj intencas turni sian lakeon, Izraelon, en bazon kun nukleaj kaj alitipaj armiloj, por agresi la arabajn landojn, tamen ni estas certaj, ke ilia insida ambicio ne estos realigita. La araba popolo, kiu estas hardita en kontraŭimperiisma lukto, ne permesos al la imperiistoj detrui aŭ renversi ĝian sendependecon. Neniu forto de la usona imperiismo povas malhelpi la lukton de la araba popolo por defendi sian nacian sendependecon. Neniu forto de la usona imperiismo povas malhelpi la palestinajn arabojn regajni sian patrolandon.

La rifuzo de la "Islama Pakto" fare de la popoloj de Azio kaj Afriko estas plia pruvo de la fakto, ke la popolo neniel povas esti trompita de la usonaj imperiistoj. La popoloj de la du kontinentoj jam vidis klare la danĝeran naturon de ĉi tiu agresa pakto kreita de la usonaj imperiistoj kaj iliaj lakeoj. Ĝi estas pakto ne por unuigi sed malunuigi la popolon. Ĝi estas pakto, per kiu la usonaj imperiistoj kaj iliaj lakeoj celas misuzi religion por krei dividiĝon inter tiuj, kiuj havas religian kredon; krei malakordon inter ili kaj subfosi ilian progreson. Ĝi estas pakto planita por la usona imperiismo por ebligi ĝian revenon en la landojn el kiuj ĝi estas jam elpelita. Ĉiuj provoj de la usona imperiismo celantaj misuzi religion por efektiviĝi sian propran ambicion kaj subpremi la popolon estas destinitaj al malsukceso.

En suda Jemeno, Adeno kaj Omano, la vivmorta batalo farata de iliaj popoloj por sendependececo metis la imperiismajn kaj koloniismajn fortojn, estratajn de Usono, en tre malfacilan pozicion.

LA USONA IMPERIISMO NENIAM POVOS IZOLI ĈINION, KIES AMIKOJ TROVIĜAS EN LA TUTA MONDO. ESTAS GRANDA KURAĜIGO POR LA SUBPREMATAJ POPOLOJ EN AZIO, AFRIKO KAJ LATINAMERIKO KE ĈINIO HAVAS NUKLEAJN ARMILOJN

Antaŭ ŝvelanta, kolera tajdo kiu balaas tra Azio kontraŭ ĝi, la usona imperiismo sin turnas

al alia artifiko por savi sin de pereco. Ĝi komencis movi sian tut-tergloban strategion orienten kun la vana espero fari grandskalan agreson en Azio. La ĉefa celo de tiu ĉi malica movo de la usona imperiismo estas, certe, efektiviĝi sian politikon de "reteno de Ĉinio". Johnson-registaro mem jam malkaŝis ke la nova programo de milita helpo de Usono inkluzivos plimultan militan helpon al suda Vjetnamio, Tajlando, Pak Ĝeng Hi kliko, Ĉiang Kajŝek bando kaj ĝiaj aliaj pupoj. Tio ĉefe celas izoli Ĉinion per plifortigo de la kordono de militaj bazoj jam formita ĉirkaŭ ĝi. Oni devas montri ke por tiu ĉi kordono destinita al malsukceso, la gvidanta grupo de iu socialisma lando, tute degenerinta en komplikon de la usona imperiismo, okupas sin pri stakado de malfirmaj pecoj kun intenco plifortikigi ĝin kaj izoli Ĉinion. La 700-miliona ĉina popolo jam ĵuris kaj plene prepariĝis por trakti la usonan imperiismon, ĝiajn lakeojn kaj komplicojn en ajna loko kaj ajna tempo. La usona imperiismo neniam povos izoli Ĉinion. Ĉinio estas lando ĉiam pli potenciĝanta; ĝi estas lando, ĉirkaŭ kiu kolektiĝas pli kaj pli multe da revoluciaj kaj progresmaj popoloj. Ĉinio havas amikojn tra la tuta mondo. La tiel nomata kordono por izoli Ĉinion, fakte, estas maŝo ĉirkaŭ la kolo de la usona imperiismo, ĝiaj lakeoj kaj komplicoj, kiu strangolos ilin ĝis morto.

La tria nuklea bombo de Ĉinio antaŭnelonge eksplodigita frakasis la arogantan ambicion de la usona imperiismo kaj la falsaj revoluciuloj por teni nuklean monopolon kaj ĉantaĝi ĉiujn revoluciajn popolojn. Nukleaj armiloj en la manoj de Ĉinio estas armiloj en la manoj de ĉiuj revoluciaj popoloj, kiuj batalas por liberigi siajn landojn. Ni kredas, kaj ĉiuj pacamaj popoloj en la mondo kredas, ke nukleaj armiloj en la posedo de Ĉinio estas intencitaj sole por defendi sin kaj la mondan pacon. La posedo de nukleaj armiloj en la manoj de Ĉinio estas granda kuraĝigo al la subpremataj popoloj en Azio, Afriko kaj Latinameriko, kiuj sin levis kontraŭ la usona imperiismo. La posedo de nukleaj armiloj en la manoj de Ĉinio ankaŭ kreas por la popolo de la mondo favorajn kondiĉojn por komplete malpermesi kaj ĝisfunde detrui ĉiujn nukleajn armilojn.

Ni firme kredas ke la ĉina teritorio Tajvan maljuste okupata de Usono, estos fine regajnta de sia legitima posedanto.

AFRIKA POPOLO JAM HEROE LEVIĜIS, IMPERIISMO KAJ KOLONIISMO DEVAS NEPRE FORLASI AFRIKON

En la kontinento de Afriko, la afrikaj liberigaj movadoj fariĝas pli akraj, pli fortaj kaj pli potencaj ol iam ajn. La imperiistoj kaj koloniistoj, estrataj de Usono, alfrontas, hodiaŭ, al pli pezaj malvenkoj kaj pli grandaj repuŝoj, ol iam ajn, ĉie kie ili subpremas la popolon de Afriko. La rezisto de la afrika popolo kontraŭ la de koloniistoj elkovita unuflanka deklaro de sendependeco fare de Ian Smith en Zimbabve montras, ke nek la imperiistoj nek la koloniistoj povas trompi la afrikan popolon. La blanka malplimulta rasisma reĝimo de Smith en tiu ĉi lando spertas la ekstremajn malamonojn kaj indignon de la popolo kiu estas senigita je la libereco vivi laŭ sia propra maniero en sia propra lando. Ili jam decidis ke armita batalo estas la sola rimedo per kiu ili povas atingi sian veran sendependecon, kaj en tiu ĉi batalo ili havas la plenfortan subtenon de ĉiuj popoloj en Azio, Afriko kaj la mondo.

Sub la ĝusta gvidado de la Pan-Afrikanista Kongreso de Azanio, la revolucia movado en Azanio (Suda Afriko) kontraŭ la barbara kaj faŝisma politiko de la Verwoerd-a reĝimo estas pli kaj pli fortiĝanta. Verwoerd, la agento n-ro 1 de imperiismo, la plej malica subpremanto de la rajtoj de la sudafrika popolo, renkontas firman rebaton de la popolo en ĝia batalo por establi demokratian kaj sendependan Azanion.

La armita batalo de la popolo de Kongolando (Leo.) estas profundiganta kaj disvolviganta. Alte tenante la revolucion standardon de Patrice Lumumba, ili faras heroan kaj sentiman lukton por frakasi la perfidajn intrigojn de la usona imperiismo kaj ĝia komplico.

La armitaj bataloj kontraŭ la imperiistoj kaj koloniistoj, estrataj de Usono, nun kondukataj de la popolo de "Portugala" Gvineo, Mozambiko kaj Angolo ricevas la subtenon kaj simpatian de ĉiuj progresemaj popoloj tra la

mondo. Iliaj bataloj donis plian pezan baton al ilia komuna malamiko.

La popolo de Gvineo, Malio, Tanzanio kaj Kongolando (Bra.), dum ripetada repuŝado al la renversaj intrigoj de la imperiistoj, defendas nun siajn sendependecon kaj malfacile gajnitajn fruktojn de sia revolucio.

En Basutolando, Beĉuanalando, Svazilando, Sudokcidenta Afriko, "Franca" Somalio, Ekvatora Gvineo kaj Kanariaj Insuloj, la popolo fariĝas pli vigle atenta kontraŭ la artifikoj ludataj de la koloniistoj, subtenataj de la usonaj imperiistoj, celantaj devigi ilin forlasi siajn luktojn por liberiĝo kaj paco. La popolo en tiuj landoj, kiu estas konvinkita ke kiuj subpremas kaj surtretas ilin, ne memvole cedos al ili veran sendependecon, firme kondukas la revolucionan batalon ĝis la liberiĝo de siaj landoj.

La imperiistoj kaj koloniistoj preskaŭ venis al la fino de sia vojo en subpremado al la afrikaj popoloj kaj ekspluatado de la riĉaĵoj de iliaj landoj. La popoloj en tiu ĉi vasta kontinento, kiuj estas sklavigitaj dum dekoj da jaroj, leviĝis kuraĝe por forskui la imperiisman kaj koloniisman regadon kaj batali por libereco kaj paco. Ĉu tio ne estas pruvita de la okulfrapa fakto ke ekde 1955, la nombro de la sendependaj landoj en Afriko plimultiĝis de 4 al 36? Ĉu tio ne pruvas ke Afriko vekigis kaj marŝas al sia celo? Jes, Afriko devas, kaj tio estas necesa, aparteni al la afrikanoj. La imperiistoj kaj koloniistoj devas, kaj tio estas necesa, forlasi Afrikon. Se ili tion ne faras, ili estos piedbatitaj for de Afriko. Kaj tio estas la afero kion la revoluciaj kaj liberemaj afrikanoj faras hodiaŭ.

ĈIAM PLIFORTIĜAS LA REZISTO DE LATINAMERIKAJ POPOLOJ KONTRAŬ LA USONA IMPERIISMO KAJ LA TAGOJ NE RESTOS MULTAJ POR ĜI KAJ ĜIAJ LAKEOJ

En Latinameriko la usona imperiismo intensigas, per siaj krimaj agresaj agadoj, la reziston de la latinamerikaj popoloj. La publika, senhonta subpremado kontraŭ la volo de la dominika popolo pri libereco kaj sendependeco fare de la usona imperiismo malkaŝis ĝian veran

AZIAJ KAJ AFRIKAJ VERKISTOJ FORTE KONDAMNAS LA BARBARAJN KRIMOJN DE LA INDONEZIA FAŜISMA MILITA REĜIMO KAJ FIRME SUBTENAS INDONEZIAJN REVOLUCIAJN FORTOJN

naturon. Por distrumi kaj trompi la popolon kaj daŭrigi sian militan okupadon en la Dominika Respubliko, la usona imperiismo aranĝis antaŭ nelonge falsan elektadon de prezidanto kaj metis unu el siaj fidelaj lakeoj en regpotencon. Sed la tuja kaj fortega protesto de la dominika popolo kontraŭ la elektado aranĝita de Usono montras, ke la patriota dominika popolo ne pretas nek volas submeti sin al la usona imperiismo. La falo de la kontraŭnacia milita reĝimo en Ekvadoro sendube pravas, ke la usona imperiismo aŭ ĝiaj lakeoj ne povos daŭre subpremi la popolon longe. Hodiaŭ ni vidas kreskantan malamon inter la latinamerikaj popoloj kontraŭ la usona imperiismo kaj ilian kreskantan revolucion spiriton por rebati kaj fariĝi la mastro de sia propra sorto. Ili faras armitan batalon kaj skuas la radikojn de la usona imperiismo en sia lando. La usona imperiismo fariĝis tiel senespera en la provado por savi sin en la kontinento de Latinameriko, ke ĝi freneze rondkuras ĉien por formi agresan interamerikan armeon por interveni en la internajn aferojn de la latinamerikaj landoj kaj subfosi iliajn naciajn aspirojn. Sed la latinamerikaj popoloj ne permesos la usonajn imperiistojn daŭrigi sian ekspluatadon al la popolo kaj la riĉfontoj de tiu kontinento.

Kiel ajn la usonaj imperiistoj provas subfosi la liberigan movadon en Latinameriko, ĉu per organizo de armitaj fortoj por agresaj celoj, aŭ per ekonomia ĉantaĝo, ili estas destinitaj al malsukceso. La popoloj de multaj latinamerikaj landoj jam ekprenis siajn armilojn kaj demetos ilin nur kiam ili estos liberigintaj siajn landojn el sub la usona agreso.

Tio estas vera, ke la usona imperiismo iras malsupren sur glitiga vojo kaj proksimiĝas al sia fino. Sed estas vero ankaŭ, ke la usona imperiismo, kiu posedas la naturon de ĉiuj imperiismaj landoj, same ne ekstermos sin mem. Ĝi ne submetiĝos volonte al sia fatalo, la fatalo kiun alfrontis ĉiuj imperiistoj en la pasinteco, antaŭ ol ĝi faros sian lastan lukton por sia vivo. Tial, ni vidas, ke la usona imperiismo luktas freneze en sia agonio por teni sian malkreskantan povon en multaj partoj de la mondo. Ĝi plenforte ellaboras aŭ provas ellabori unu ŝtat-renverson post alia kaj starigas iujn pupojn por servi al ĝiaj celoj.

En Indonezio, la usona imperiismo kaj ĝia agenteo, la Centra Informa Agentejo, post longa periodo de renversaj agadoj kaj penado pri ŝtat-renverso, finfine elfaris faŝisman militan reĝimon estratan de la dekstraj generaloj Nasution kaj Suharto. Tiu ĉi faŝisma milita reĝimo agas freneze kaj senbride, teroras, subpremas kaj persekutas la indonezian popolon, kaj detruas la fruktojn kaj atingojn de ĝia revolucio.

Timigite kaj kolerigite de la leviĝanta revolucia situacio en Indonezio, la kliko de reakciaj, dekstraj generaloj, estrataj de Nasution kaj Suharto, prenis al si la ŝtatan povon en komploto kun la usona imperiismo kaj ĝia agenteo, la Centra Informa Agentejo. Utiligante kiel pretekston la "aferon de 30 septembro", en kiu la patriotaj oficiroj de la armeo korekte agis por malhelpi la krimajn provojn de la reakciaj generaloj, la dekstraj fortoj de la armeo elverŝis sian furiozan malamon al la popolo, ĝiaj revolucio kaj atingoj, per estigo de rabia kampanjo de amasekstermo, amasmurdo, amasaresto, amastorturo kaj amaspersekuto kontraŭ la indoneziaj progresemluloj kaj demokratoj, precipe la komunistoj, progresemluloj kaj patriotaj religiuloj. Tio ne estas hazardo, ke tiu ĉi teroro okazis samtempe kun la malvirta kaj sanga kontraŭ-ĉinia kaj kontraŭ-ĉina rasisma kampanjo, kiu servas al la usona tuttergloba strategio kontraŭ Ĉinio, la tiel nomata politiko de "reteno de Ĉinio".

Ĝis hodiaŭ pli ol 300,000 indoneziaj patriotoj estis kruele murditaj, dume ankoraŭ pli multaj estas torturataj en malliberejoj kaj koncentrejoj, nur pro tio ke ili amas sian patrimon kaj defendas ĝian revolucion. Ĉiuj progresemluloj organizoj en Indonezio estas malpermesitaj. Multaj el la verkistoj kaj artistoj, kies asocioj estas inter tiuj malpermesitaj, estas enkarcerigitaj kaj persekutataj. La sorto de multaj indoneziaj verkistoj, kiuj starigis nian organizon kune kun ni, estas ankoraŭ ne konata.

Kiel ni scias, Indonezio iam staris sur la plej antaŭa fronto de la kontraŭimperiisma batalo kaj firme subtenis la liberigajn movadojn en Azio, Afriko kaj Latinameriko. Ni ĉiuj vidis la grandegan revolucian leviĝon en arto, literaturo kaj kulturo en Indonezio antaŭ la afero de oktobro, 1965. Tiutempe, la indoneziaj progresemaĵoj verkistoj kaj artistoj faris revolucian ofensivon kontraŭ la kultura enfiltriĝo kaj subfosado fare de la usona imperiismo kaj kontraŭ la falsa revolucia kulturo pledata de la apologiistoj de "universala humanismo" por starigi popolan kulturon kun sia propra nacia identeco.

Sed hodiaŭ ni vidas, ke la faŝisma milita reĝimo de Nasution-Suharto estas alliganta tiun ĉi landon al la frako de la usona imperiismo kaj estas provanta retroigi la revolucion de tiu ĉi lando. Tiu ĉi insida intenco elmontriĝas en la ĉesigo de la kontraŭstaro de Indonezio kontraŭ "Malajzio", novkoloniisma projektaĵo starigita de la britaj koloniistoj kun la aktiva subteno de la usona imperiismo por subpremi la naciliberigan batalon de la popoloj de Malajo (inkluzive de Singaporo) kaj norda Kalimantano kaj detruiri la sendependecon kaj suverenecon de Indonezio kaj aliaj landoj de Sudorienta Azio. "Helpe" tiel volonte proponata al Indonezio en la lastaj tagoj de Usono, Sato-registaro de Japanio kaj aliaj landoj kiuj kunlaboras kun la imperiistoj, klare montras, sur kiun vojon la faŝisma milita diktaturo de Nasution-Suharto kondukas tiun ĉi landon.

Ni, aziaj kaj afrikaj verkistoj, forte kondamnas la barbarajn krimojn faritajn de la faŝisma milita reĝimo de Nasution-Suharto kontraŭ la indonezia popolo kaj esprimas nian firman subtenon al la indoneziaj revoluciaj fortoj. Tiuj faŝismaj krimoj ne montras, ke la lakeoj de la usonaj imperiistoj en Indonezio estas fortaj. Kontraŭe, tiuj krimoj pruvas nur ilian absolutan malfortecon kaj la rapidecon kun kiu ili proksimiĝas al sia fino.

La nigraj nuboj nun pendantaj super Indonezio estas nur provizora fenomeno. Hodiaŭ la indonezia popolo, kiu estas fidela al sia revolucia kaj batala tradicio, estas reorganizanta sin kaj leviĝanta kontraŭ la faŝisma reĝimo de Nasution-Suharto. Kaj, kune kun la popolo, ankaŭ la indoneziaj verkistoj estas leviĝantaj.

Ni firme kredas, ke armita per la sperto de sia revolucia pasinteco kaj hardita en la nuna ŝtormo de severaj provoj, la rezista movado de la indonezia patriota popolo definitive plifortiĝos, kaj ke la nigra punkto baldaŭ transformiĝos en helan tagon de triumfo.

La ŝtat-renverso fare de la dekstra alo en Ganao plene malkovris la perfidan intrigon de la imperiistoj kaj koloniistoj, estrataj de Usono, por provi ankoraŭfoje koloniigi la junajn sendependajn afrikajn landojn. Tiu ĉi intrigo, kune farita de Usono kaj Britio, malkaŝis la novajn senhontajn konspirojn de la imperiistoj kontraŭ sendependaj afrikaj landoj kaj dissplitigi la unuiĝon de Afriko. Tio estas unu el la provoj de imperiismo por malhelpi la leviĝantan kontraŭimperiisman kaj kontraŭkoloniisman movadon en la afrika kontinento.

De kiam Ganao akiris sendependecon, ĝi fariĝis dorno en la karno de la imperiistoj, koloniistoj kaj iliaj lakeoj pro sia kontraŭimperiisma starpunkto. Tiu ĉi renversa ago kontraŭ Ganao estas senhonta konspiro de la imperiistoj kaj koloniistoj, estrataj de Usono, por faligi, kun la helpo de siaj lokaj lakeoj, tiujn afrikajn registarojn kiuj defendas siajn suverenecon kaj sendependecon.

De la lastaj jaroj la liberiga movado de Afriko leviĝas tagon post tago, kaj la afrikaj popoloj tenas sin sur firma kontraŭimperiisma starpunkto kaj praktikas sendependan politikon. Tio tiel multe timigis la imperiistojn, ke ili provas malhelpi per ĉia rimedo tiun tajdon kaj publike aŭ kaŝe subfosi la aspirojn de la popoloj de Afriko. Tiu ĉi malestiminda agado, kune planita kaj plenumita de la usonaj imperiistoj, la britaj koloniistoj kaj iliaj lakeoj, estas publika provoko al ĉiuj afrikaj popoloj kaj progresemaĵoj tra la tuta mondo. Ĉiuj landoj aŭ nacioj en Afriko, Azio aŭ la aliaj partoj de la mondo, kiuj amas liberecon kaj pacon, ne povas ne kondamni tiun ĉi provokan atakon kune faritan de la imperiistoj kaj iliaj lakeoj. Ni scias, ke la ganaa popolo estas trapasanta provon, kaj ni ankaŭ scias, ke la ganaa popolo fine akiros venkon.

La intervenaj kaj subfosaj agadoj de la usonaj imperiistoj klare montras ilian insidan ambicion, ke ili ankoraŭ volas subpremi la popolon kaj teni ĝin sub siaj kalkanumoj. Tiuj agadoj montras, ke la imperiistoj kaj koloniistoj,

antaŭ sia fina kolapso, uzos sian lastan iometon da forto por levi provizoran kontraŭfluan, en vana provo por eviti sian morton. Sed la frenezaj kontraŭatakoj fare de la imperiistoj en iuj landoj, kontraŭe al ilia espero, instigas la popolon al pli vigla singardemo kaj rezisto. Tio nur akcelas la rapidecon de la fortega kontraŭimperiisma ŝtormo, kiu disvastiĝas tra Azio, Afriko kaj Latinameriko. Tio estas historia fakto kaj historia leĝo, kiujn la imperiistoj ne povas eviti. Historio jam montris, ke ĉiuj revoluciaj movadoj spertis siajn leviĝojn kaj malleviĝojn, sukcesojn kaj malsukcesojn. Historio jam pruvis, ke post ĉiu malsukceso la revoluciaj movadoj faras grandajn paŝojn antaŭen.

SOVETUNIA REVIZIISMA GVIDANTA KLIKO ESTAS LAKEO DE LA USONA IMPERIISMO KAJ PERFIDULO DE LA INTERESAJ DE AZIAJ KAJ AFRIKAJ POPOLOJ, LUDANTA ROLON, KIUN ĈIUJ IMPERIISTOJ KAJ DIVERSLANDAJ REAKCIULOJ NE POVAS LUDI

Kiam la usona imperiismo renkontas la kontraŭstaron de la popoloj tra la tuta mondo, inkluzive de la usona popolo, kiu donas al ĝi pezajn batojn de ĝia koro, kaj kiam la grandega ŝtormo de popolaj fortoj frakasas ĝin en pecetojn, ni vidas hodiaŭ, ke la sovetunia reviziisma gvidanta kliko estas efektiviganta alian malpuran politikan artifikon. Kiam la kaduka, ŝanceliĝanta domo de la usona imperiismo estas falonta al la tero, tiuj hipokritaj revoluciuloj agas kiel subteniloj por savi ĝin. Ili jam fariĝis granda defendanto de la usona imperiismo. Ili kunlaboras kaj komplotas kun la usonaj imperiistoj por malhelpi la naciliberigajn batalojn en multaj landoj de la mondo. Ili jam perfidis la revoluciajn konceptojn kaj principojn, kiuj estas sanktaj kaj karaj por ĉiuj, kiuj batalas por sia liberiĝo, paco kaj demokratio.

Tiuj tiel nomataj revoluciuloj rigardas kiel "koloson" nur la jam malfortigitan usonan imperiismon, ili timas ĝin kaj, sekve, kompromisas kaj kunlaboras kun ĝi. Kiam interne de la usona imperiismo ŝtormo estas formiĝanta kontraŭ ĝi mem, kaj kiam incidentoj kiel la leviĝo en Los-

Anĝelo klare manifestas sin kiel revolucia leviĝo de la ekspluatata amaso, tiuj tiel nomataj revoluciuloj helpas kaj subtenas la usonan imperiismon en ĝia barbara subpremo al la batalo por sendependeco de la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj popoloj. Kiam ili plenvoĉe proklamas, ke ili subtenas la revoluciajn movadojn de la mondo, ili serĉas senkulpigojn kaj ekskuzojn, tage kaj nokte, por la usona imperiismo. Ili diras, ke ili estas amikoj de revoluciaj movadoj kaj subpremataj popoloj. Sed, fakte, ili estas nenio alia ol lakeoj de la usona imperiismo, subfosantoj de naciliberigaj movadoj kaj renegatoj, forvendantaj la interesojn de la aziaj kaj afrikaj popoloj. Kaj, fakte, ili agas kiel socia subtenilo de la internacia imperiismo, ludantaj negloran rolon de speciala taĉmento de imperiismo en subfosado de la revolucia batalo de diverslandaj popoloj kaj en ludado de rolo, kiun neniu imperiistoj aŭ reakciuloj de iu ajn lando povas ludi. Por realigi sian sonĝon superregi la mondon kune kun Usono, ili fojon post fojo laŭdas la imperiistojn kiel "klerajn grupojn" kaj "moderulojn", kaj diras, ke "Johnson havas la absolutan mandaton de la popolo". Ili ripetade fanfaronas pri sia kunlaboro kun la usonaj imperiistoj kaj propagandas, ke inter la du landoj estas "sufiĉe vastaj areoj por kunlaboro". Ili faris grandan nombron da malpuraj politikaj negocoj kun la usonaj imperiistoj en kaj ekster la Unuiĝintaj Nacioj. Ili senĉese deklaras ke estas eble elimini koloniismon pere de la Unuiĝintaj Nacioj kaj "donaci" sendependecon al la subpremataj popoloj. Fakte, ili kunlaboras kun la usona imperiismo en la Unuiĝintaj Nacioj por subpremi la naciliberigajn movadojn de la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj popoloj. Ili kunlaboras kun la usonaj imperiistoj por estingi la furiozantan revolucian flamon de la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj popoloj. Ĉu ili ne kune komplotis por sendi la de Usono direktatajn trupojn de Unuiĝintaj Nacioj al Kongo-lando kaj murdi la grandan afrikan heroon Patrice Lumumba? Ĉu ili ne voĉdonis kune kun Usono en la Sekureca Konsilantaro por subteni la intervenon de Unuiĝintaj Nacioj en Dominiko? Ĉu ili ne ignoris la kontraŭstaron de la popoloj de afrikaj landoj kaj kune voĉdonis en la Sekureca Konsilantaro por ke Britio, la estro de Ian Smith, "pacigu" Sudan Rodezion kaj subpremu la liberigan batalon

de la Zimbabve-a popolo? Ĉu ili ne avidas starigi konstantan trupon de la Unuiĝintaj Nacioj kaj kunligiĝas kun Usono por subpremi la naciliberigajn batalojn per armita forto? Ekzistas pli multaj faktoj ol la suprecititaj. Ili ripetade kunsidis ĉe konferencaj tabloj kun la usonaj imperiistoj kaj iliaj lakeoj, la sud-vjetnamaj pupoj, la sud-korea kliko, Izraelo, "Malajzio" kaj la Ĉiang Kajŝek-a bandita bando, por konspiri pri efektivigo de la intrigo de la usona imperiismo por superregi la popolojn de Azio. Ili estas konspirantaj kun la usonaj imperiistoj kaj iliaj lakeoj por efektivigi agreson kontraŭ la pacama popolo de Kaŝmiro. Ili laboras en koluzio kun la usonaj imperiistoj kaj iliaj lakeoj por malhelpi la palestinan popolon reakiri sian hejmlandon. Precipe abomeninda kaj koleriga estas ilia senskrupula kunlaboro kun la usonaj imperiistoj kaj iliaj lakeoj por perfidi la heroan batalon de la vjetnama popolo. Iliaj paroladoj kaj agoj de kapitulaco al la usona imperiismo kaj ilia traktado al la malamiko kiel al amiko prezentas monton da atestoj kontraŭ ili mem. Kelkfoje ili ŝajnigas, ke ili subtenas la batalon de aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj popoloj, kaj de tempo al tempo ili eldiras iujn vortojn kontraŭ la usona imperiismo, sed tio montras nenian ŝanĝon en ili. Tio nur montras pli klare, kiel hipokritaj, ruzaj, perfidemaj kaj ferocaj ili estas, kaj kiel ili trompas la popolojn de la mondo por efektivigi sian intrigon de kunlaboro kun la usona imperiismo por superregi la mondon. La agoj de tiuj renegatoj povas nur plene malkovri, ke ili estas falsaj kontraŭimperiismaj batalantoj kaj veraj kapitulacantoj, falsaj revoluciuloj kaj veraj perfiduloj, falsaj amikoj kaj veraj skismistoj.

Ni ne estas surprizitaj, ke tiuj homoj sin trenis en la tendaron de imperiismo, ĉar ni scias, ke sin arigas ĉiam la samspecaj objektoj. Ĉi tie mi ŝatus citi frazon de revolucia ĵurnalisto: La usonaj imperiistoj kaj tiuj homoj manpremis antaŭe en mallumo, hodiaŭ jam publike interkisas kaj tion faras kun nenia honto.

Hodiaŭ la revoluciaj popoloj de la mondo pli kaj pli interproksimiĝas kaj ili firme unuiĝas sub la standardo de kontraŭimperiismo, kontraŭkoloniismo kaj kontraŭnovkoloniismo. Kontraŭe al tiuj kiuj ŝajnigas sin amikoj de la batalanta popolo, ni klopodas por unuiĝo sur la bazo de firma kaj korekta kontraŭimperiisma

linio. Ni volas unuiĝon kun ĉiuj kontraŭimperiismaj revoluciaj fortoj, sed ne unuiĝon kun tiuj homoj, kiuj kunlaboras kun la usonaj imperiistoj kaj helpas ilin subigi kaj subpremi la popolon. Ni volas unuiĝon, sed veran unuiĝon kaj ne falsan unuiĝon. Ni diru al tiuj falsaj revoluciuloj, ke en reala, vasta, unuiĝita internacia unuecfroto kontraŭ la usona imperiismo ili havos neniun lokon, ĉar ili jam perfidis la popolon kaj ĝian aferon. Se tiu ĉi unuecfroto povus inkluzivi eĉ tiujn komplikojn de la usona imperiismo, ĉu tio ne signifus, ke ankaŭ la usona imperiismo mem povus esti inkluzivita en ĝi? Ĉu la unuecfroto kontraŭ la usona imperiismo ne fariĝus tiam unuecfroto kun la usona imperiismo? Tio estas absolute neebla. Ni povas fari nur unu aferon, t. e., streki kompletan kaj klaran limlinion inter ili kaj ni en ĉiuj rilatoj, malkaŝi iliajn krimajn intrigojn kaj batali kontraŭ ili.

Lasu tiujn renegatojn pace kunezisti kaj kompromisi kun la usonaj imperiistoj. Sed, ni ne! Ni ne povas pace kunezisti nek kompromisi kun ili, ĉar ni bone scias, ke la usona imperiismo estas la komuna morta malamiko de la popoloj de Azio, Afriko kaj la tuta mondo.

La nuna estas la jarcento de la popolo. Kiel ajn fortaj ili aspektas, kaj kiajn ajn rimedojn ili utiligas, la imperiistoj, estrataj de Usono, ne povos venki la popolojn, kiuj batalas por sia liberiĝo. La popoloj kaj iliaj revoluciaj movadoj estas vekitaj de la usona imperiismo por sieĝi ĝin. La usona imperiismo ne povas eviti la neeviteblan fatalon, kiu atendas ĝin. Kiam la usona imperiismo pereos, ankaŭ pereos ĝiaj lakeoj kaj pupoj. Kaj kune kun la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kaj pupoj, pereos ankaŭ tiuj, kiuj kapitulacas al ili kaj konspiras kaj planas kun ili por perfidi la popolon.

**LA BATALANTAJ, REVOLUCIAJ
VERKISTOJ DE AZIO KAJ AFRIKO
DEVAS SIN ĴETI EN LA ARDAN
BATALON DE LA POPOLO KAJ
AKTIVE PARTOPRENI LA NUNAN
BATALON KONTRAŬ LA USONA
IMPERIISMO KAJ ĜIAJ LAKEOJ
KAJ APOLOGIISTOJ**

Karaj kolegoj,

Hodiaŭ ni, progresemaĵ verkistoj de Azio kaj Afriko, kunvenas ĉi tie ĉefe por doni subtenon al kaj esprimi nian solidarecon kun la heroa batalo de la vjetnama popolo por liberigi sian landon, kaj samtempe por doni subtenon al la batalo de la aziaj kaj afrikaj popoloj por akiri kaj defendi sian nacian sendependecon.

Kiel verkistoj kiuj sin dediĉas al la revolucia afero de la popoloj de la du kontinentoj, nia devo kaj tasko estas transformi nian plumon en fortan batalilon. Ĉiuj nigraj fortoj endanĝerigantaj la revolucionan aferon de la aziaj kaj afrikaj popoloj devas esti malkaŝitaj, kaj ĉiuj revoluciaj bataloj, kiuj puŝas la aziajn kaj afrikajn popolojn antaŭen, devas esti laŭdataj. Tio estas sankta tasko, kiu falas sur nin, progresemaĵn aziajn kaj afrikajn verkistojn. Pro la komuna justa afero de la aziaj kaj afrikaj popoloj ni devas uzi nian plumon por forte bati kaj malkaŝi la komunajn malamikojn de la aziaj kaj afrikaj popoloj — la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn kaj la renegatajn trajtojn de la ruzaj falsaj revoluciuloj, por ke la popolamasoj en Azio kaj Afriko klare vidu, kiuj estas iliaj malamikoj kaj kiuj estas iliaj amikoj. Samtempe, ni havas la devon konigi al la tuta mondo la veran situacion de la batalo de la aziaj kaj afrikaj popoloj kaj la devon uzi nian plumon por laŭdi ilian bravan kaj grandiozan spiriton kaj kuraĝigi ilian batalvolon kontraŭ imperiismo.

Progresemaĵ kaj revoluciaj verkistoj ĉiam kunfandas sian vivon kun tiu de la popolo kaj dividas kun ili la ĝojon kaj malĝojon, kaj batalas kun ili ŝultro ĉe ŝultro. Tio estas nerefutebla vero, ke la fonto de ĉiu kreiva laboro estas la popolo, iliaj vivo kaj batalo. Batalantaj kaj revoluciaj verkistoj devas ĵeti sin en la bolantan batalon de la popolo. Nur tiel farante, ni povas vere kompreni la pensojn, sentojn, aspirojn kaj batalon de la popolo, produkti verkojn kiuj vere spegulas iliajn vivon kaj batalon kaj kontribui nian parton al la revolucia afero de la popolo. Literaturo kaj arto ne devas, nek povas disigi sin de politiko. Nia kriterio devas esti, ke ĉiuj verkoj, kiuj utilas al la solidareco de la aziaj kaj afrikaj popoloj kontraŭ imperiismo kaj por nacia liberigo, kaj kiuj instigas la antaŭeniron de la historio, estas bonaj verkoj, dum ĉiuj verkoj, kiuj malutilas al la solidareco

de la aziaj kaj afrikaj popoloj kontraŭ imperiismo kaj por nacia liberigo, kaj kiuj provas puŝi la historion malantaŭen, estas malbonaj verkoj. En la leviĝanta kontraŭimperiisma batalo de la aziaj kaj afrikaj popoloj, pli kaj pli granda nombro da aziaj kaj afrikaj verkistoj eniras la batalvicojn de sia popolo por lerni de la popolo kaj verki por la popolo, kaj multaj verkoj forte pentris la komunajn batalon kaj aspirojn de la aziaj kaj afrikaj popoloj. Ĉi-rilate ni ĝoje konstatas, ke la batalantaj vjetnamaj verkistoj starigas por ni elstaran ekzemplon. Dum la tempo de la popola milito kaj meze de la kanonfajroj de la malamikoj ili skribis multajn verkojn, kiuj inspiras milionojn da popolanoj en iliaj heroaj bataloj. La verkoj *Tiel Li Vivis* kaj *La Vilaĝo Kiu Ne Mortos* eldonitaj de la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj, estas brilaj ekzemploj. Tiuj verkoj ne nur donas grandegan influon al la vjetnama popolo, sed ankaŭ nutras kaj plialtigas la revolucionan spiriton de aliaj popoloj en Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj kuraĝigas la naciliberigan movadon en tiuj kontinentoj. Ĉi tie kuŝas la fundamenta diferenco inter la progresemaĵ kaj revoluciaj literaturo kaj arto de la aziaj kaj afrikaj popoloj kaj la dekadencaj kaj reaciaj literaturo kaj arto de imperiismo kaj moderna reviziismo.

Historio pruvis, ke literaturo kaj arto en la manoj de progresemaĵ kaj revoluciaj verkistoj povas servi al la popola revolucio kaj la popola milito, dum literaturo kaj arto en la manoj de imperiistoj kaj iliaj lakeoj kaj komplicoj povas nur servi al kontraŭevolucio. Ni, aziaj kaj afrikaj popoloj, kun brilantaj kaj longdaŭraj kulturaj tradicioj, kreis abundan kulturalan riĉaĵon por la homaro. Sed, dum la pasintaj jarcentoj, sub la tretado de imperiismo kaj koloniismo, la nacia kulturo de la aziaj kaj afrikaj popoloj multe suferis. Kiel ni scias, imperiismo kaj koloniismo ofte komencas sian agreson per kultura enfiltriĝo. Literaturo kaj arto ĉiam estas unu el la ĉefaj bataliloj, kiujn ili utiligas por fari agreson kaj enfiltriĝi en aliajn landojn. Per tia enfiltriĝo la usona imperiismo intencas pretigi la kondiĉojn por renversi, ataki kaj agresi aliajn landojn. La usona imperiismo eksportas, en grandaj kvantoj, al la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj siajn dekadencajn literaturon, muzikon, filmojn ktp., publike rekla-

mante erotikon kaj murdon, rekomdante hipokritan humanismon, propagandante la tiel nomatan usonan vivmanieron, kaj devastigante la terurojn de milito por pliintensigi siajn nuklean ĉantaĝon kaj nuklean minacon. Ili tiel nomataj verkoj intence malbeligas la figuron de la popolamasoj kaj kalumnias la popolan revolucion kaj la naciliberigan movadon. Ĉiuj tiuj dekadencaj literaturaj verkoj, same kiel "opio", venenas kaj paralizas la mensojn de la aziaj kaj afrikaj popoloj, subfosas ilian batalon kaj strangolas la aziajn kaj afrikajn naciajn kulturojn kaj tradiciojn. Ni ne devas forgesi, ke por ataki kaj subpremi aliajn naciojn la usona imperiismo utiligas ne nur siajn militajn bazojn, sed ankaŭ siajn kulturajn bazojn. Tial, por akiri sendependecon aŭ por gardi la sendependecon kiun ni jam akiris, ni devas detrui ne nur ĝiajn militajn bazojn, sed ankaŭ ĝiajn kulturajn bazojn. La fakto, ke multaj landoj en Azio kaj Afriko malpermesis usonajn literaturajn verkojn, muzikon kaj filmojn, fermigis la oficejojn de la Usona Informa Servo kaj elpelis la tiel nomatajn Usonajn Pacajn Korpusojn, plene pravas, ke la vekigintaj aziaj kaj afrikaj popoloj jam komprenas la danĝeran influon, kiun la usona kultura agreso donas al la mensoj de la popolo, kaj ĝis kia grado ĝi povas detrui la nacian kulturon.

Krom kontraŭstari la kulturan agreson de imperiismo, ni ankaŭ devas malkaŝi la "trojan ĉevalon" de la usona imperiismo, tio estas, la literaturon de la sovetunia moderna reviziismo. Sub la ŝildo de "revolucio" la moderna reviziisma literaturo vendas, en efektivo, kontrabandaĵon predikantan "usonan vivmanieron", kies enhavo estas ekstreme malpura kaj malnobla. En romano titolita *Zosia*, la "heroo" estas bildigita tiel deklaranta: "Vi bezonas kuraĝon por kapti urbon; kaj senhontecon por konkeri virinon". En ilia rakontado pri justa revolucia milito, perfidulo, kiu transiris al la malamiko, estas laŭdata kiel heroo, "ĉar li estas homo". En siaj verkoj pri la heroo popola kontraŭfaŝisma milito, ili penas plenforte priskribi la terurojn de milito, bildigante kun troigo la detruon de urboj kaj donante sangan priskribon pri kadavroj sur la batalejoj. Iliaj verkoj povas nur korupti la mensojn kaj subfosi la revolucion batalvolon de la aziaj kaj afrikaj popoloj. Ili predikas kapitulacismon kaj la filozofion de

vivkonservo je ĉiuj kostoj. Ili diras al homoj ke, kiam la imperiistoj entreprenas agresan militon, oni devas surgenuiĝi kaj kapitulaci kaj ne fari rezistan militon kontraŭ agreso, por postvivi kaj konservi urbojn. Ili oponas kontraŭ ĉiuj militoj, ne distingante, ĉu la milito estas agresa aŭ kontraŭagresa, kaj ĉu ĝi estas justa aŭ maljusta. Ili publike pledas por "kunlaboro inter la Oriento kaj Okcidento" en literaturo, deklarante: "Mi estas por paco — mi estas por paco ne nur kun la Usono de Julius Rosenberg kaj Howard Fast, sed ankaŭ por paco kun la Usono de s-ro Truman kaj s-ro Acheson." Tiaj hipokritaj verkistoj kun revoluciaj manteloj estas perfiduloj de la kapo ĝis la piedo.

Karaj kolegoj,

Hodiaŭ la mondo estas trapasanta procezon de granda skuiĝo, granda dividiĝo kaj granda reorganiziĝo. Kiel batalantaj kaj progresemaj verkistoj de Azio kaj Afriko, ni devas esti pli singardemaj kaj pli konsciaj pri niaj netuŝeblaj principoj kaj sanktaj devoj. Estas nia devo aktive partopreni la batalon nun kondukatan kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kaj apologiistoj. Ni devas batali kontraŭ iliaj agresoj kaj malkovri iliajn malnoblajn krimojn kaj ankaŭ ilian malican propagandon, kiun ili dissemas per siaj literaturo kaj arto. Ni devas montri kaj konigi al la mondo la kapitulacisman naturon de la falsaj revoluciuloj kaj plivigliĝi la singardemon de la popolo kontraŭ la danĝero de tiuj perfiduloj. Ĝuste same kiel ni devas kontraŭstari la enfiltriĝon de literaturo kaj arto de imperiismo en niajn landojn, ni ankaŭ devas kontraŭi la devastigon de kontraŭrevoluciaj ideoj kaj kapitulacisman propagandon de tiuj, kiuj ŝajnigas sin revoluciuloj. La literaturo de falsaj revoluciuloj povas doni pli venenan efikon ol la reakcia literaturo de imperiismo. La revoluciaj literaturo kaj arto estas produkto de revoluciaj verkistoj. Se tiel estas, per kia etendiĝo de fantazio tiuj hipokritaj revoluciuloj nomas siajn literaturon kaj arton revoluciaj? Iliaj literaturo kaj arto estas literaturo kaj arto de kapitulacismo. Ili estas speciala literatura taĉmento de imperiismo, kiu penetras en la literaturon de Azio kaj Afriko por fari subfosadon interne de la aziaj kaj afrikaj verkistaj rondoj. Kiel batalantaj kaj progresemaj verkistoj, ni devas fari distingon inter niaj ideoj kaj tiuj de la imperiistoj kaj iliaj kunlaborantoj. Ni

ne povas, nek devas toleri ian pacan kunekziston kun ili.

LA GRANDIOZA TRIUMFO DE LA GRANDA KULTURA REVOLUCIO DE ĈINIO NEPRE DONOS PROFUNDAN INFLUON AL LA REVOLUCIA AFERO DE LA AZIAJ KAJ AFRIKAJ POPOLOJ

Karaj kolegoj,

Ĉi tie mi volas mencii, kun fiereco en mia koro, ke nia kunveno estas okazanta dum la leviĝo de ŝtorma, granda kultura revolucio entreprenata de nia gastiganto, la ĉina popolo. Estas nature, ke ni aziaj kaj afrikaj verkistoj multe interesiĝas pri tiu ĉi revolucio de la ĉina popolo. La grandioza venko de la nuna granda kultura revolucio de Ĉinio donas ne nur grandan antaŭenpuŝon al la socialisma afero de Ĉinio, sed ankaŭ profundan influon al la revolucia afero de la aziaj kaj afrikaj popoloj.

Ni ĝoje rimarkas, ke nova situacio jam aperas en la granda kultura revolucio de Ĉinio. La vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj revoluciaj intelektuloj estas ne nur mastroj de sia lando sed ankaŭ veraj mastroj en la tereno de kulturo kaj ideologio. Ili liberigis sin el la malnovaj ideologio kaj kulturo, malnovaj moroj kaj kutimoj. Ili jam produktis multajn literaturajn, dramajn, muzikajn kaj artajn verkojn, kiuj prezentas novajn personojn, novajn pensojn, novajn morojn kaj novajn kutimojn, kaj plene montras la heroismon kaj batalspiriton de la ĉina popolo en la kreado de historio. Ni firme kredas, ke la novaj literaturaj kaj artaj verkoj de la ĉina popolo ludos pozitivan rolon en antaŭenpuŝo de la literatura movado en Azio kaj Afriko.

Karaj kolegoj,

Depost sia fondiĝo la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj jam faris multajn konkretajn kaj pozitivajn laborojn kaj atingis certajn rezultojn. Mi donos al vi nur mallongan raporton pri la laboroj, kiujn ni faris. La Konstanta Buroo publikigis multajn deklarojn kaj dokumentojn, firme subtenante la

kontraŭimperiismajn kaj kontraŭkoloniismajn batalojn de la aziaj kaj afrikaj popoloj por nacia liberiĝo. Ĝi subtenis kaj partoprenis en la agadojn de progresema internaciaj organizoj. Post la Bali-sesio de la Plenuma Komitato, la Konstanta Buroo sendis du amikecajn delegaciojn por viziti 17 aziajn kaj afrikajn landojn, kie ili estis varme akceptitaj de siaj kolegoj kaj la popoloj de tiuj landoj. Tiuj vizitoj plifortigis la revolucian solidarecon de la aziaj kaj afrikaj popoloj kontraŭ imperiismo, kreskigis la batalamikecon de la aziaj kaj afrikaj verkistoj kaj akcelis la kulturen interfluon en Azio kaj Afriko. En la fino de 1964, Forumo pri Azia kaj Afrika Literaturo estis kune kunvokita en Pekino de la Konstanta Buroo kaj la Ĉina Interliga Komitato de Aziaj kaj Afrikaj Verkistoj. Verkistoj el Kamboĝo, Kameruno, Cejlono, Ĉinio, Indonezio, Japanio, Sudano, Tajlando kaj Zimbabve partoprenis ĝin kaj entuziasme diskutis pri la komunaj bataltaskoj de la popoloj kaj verkistoj de Azio kaj Afriko. Ili ankaŭ vaste interŝanĝis spertojn pri la bataloj de la aziaj kaj afrikaj popoloj kaj pri siaj literaturaj laboroj. Estis unuanime konsentite, ke la aziaj kaj afrikaj verkistoj devas alte teni la standardon de opono kontraŭ imperiismo, estrata de Usono, kaj nova kaj malnova koloniismo, kaj ke la literatura movado devas esti kunigita kun la taskoj de tiu batalo, por ke la plumo de la verkistoj fariĝu akra batalilo en tiu batalo. Por plie fortigi la kulturen interfluon inter la aziaj kaj afrikaj landoj, reciproke kuraĝigi, lerni unu de alia kaj akceli vastan dissemadon de azia kaj afrika revolucia literaturo, la Buroo estas redaktanta kaj eldonanta Azian kaj Afrikan Literaturan Serion en angla kaj franca lingvoj. Ses volumoj de tiu ĉi serio estas nun en presado, kaj ili inkluzivas *Tiel Li Vivis* (de Phan Thi Quyen) kaj *La Vilaĝo Kiu Ne Mortos* (de Nguyen Ngoc), du librojn de vjetnamaj verkistoj, kiujn mi jam menciis pli frue, *La Silento de Cindroj* de la alĝeria verkisto Kaddour M'Hamsaji, *La Uragano de Afriko* de la malia poeto Mamadou Gologo, *Poemoj de Nepalo* kaj *Rakontoj pri Vjetnamio* el la plumo de kelkaj ĉinaj verkistoj. La komuna trajto de tiuj verkoj estas la kombino de viva revolucia enhavo kaj elstara artformo. Ni kredas, ke tiuj verkoj estos varme akceptataj

de la aziaj kaj afrikaj legantoj. Ni estas konvinkitaj, ke la aliaj verkoj, kiuj estos aldonitaj al tiu ĉi serio, kontribuos novan riĉaĵon al la trezorejo de azi-afrika literaturo. Krome, la Konstanta Buroo ankaŭ eldonis *Kia Devas esti Homo al Homo* de la cejlona verkisto, T. G. W. De Silva, kiu registris, en versoj, la Bali-sesion de la Plenuma Komitato kaj esprimis la noblajn celojn de la movado de aziaj kaj afrikaj verkistoj.

Samtempe, parto II de volumo I de la *Antologio de Aziaj kaj Afrikaj Poemoj* estas eldonita, kaj la *Elektitaj Aziaj kaj Afrikaj Rakontoj* estas nun en preparo. Por akumuli materialojn kaj antaŭenigi la studon kaj interŝanĝon de azia kaj afrika literaturo, post taŭga preparo kaj kun la subteno de multaj aziaj kaj afrikaj landoj, la Konstanta Buroo starigis "Azi-Afrikan Bibliotekon" en septembro, 1964. Tiu ĉi biblioteko sin trovas en Kolombo kaj havas konsiderinde grandan nombron da libroj, ĵurnaloj kaj periodaĵoj en angla, franca, ĉina, rusa, vjetnama, mongola, sinhala kaj aliaj lingvoj. La Konstanta Buroo estas nun plananta, laŭ propono de la ĉinaj amikoj, starigi "Azi-Afrikan Sanatorion" uzeblan de la verkistoj de la du kontinentoj. Rilate al la aliaj laboroj faritaj de la Konstanta Buroo mi ne mencias ilin ĉi tie unu post la alia.

Ni jam faris konvenan kontribuon al la disvolvo kaj protekto de la nacia kulturo de niaj landoj. Ni firme kredas, ke la disvolvo kaj protekto de la nacia kulturo de iu lando estas nedisigebla de la batalo kontraŭ imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj, estrataj de Usono, kaj ĝiaj komplicoj. Sen unue forigi la imperiistojn aŭ ilian influon, neniu lando povas pensi pri protekto de la digno de sia nacia kulturo. Ĝuste pro tiu ĉi kaŭzo ni, aziaj kaj afrikaj verkistoj, senhezite ĵetas nin en la kontraŭimperiisman batalon de la popolo.

La ĉiam leviĝantaj revoluciaj bataloj tra la mondo, precipe en Azio kaj Afriko, kaj la venkoj, kiujn ili akiris, kuraĝigas kaj inspiras nin produkti verkojn kun kreivo, dum la verkoj, kiujn ni produktis, en returno kuraĝigas kaj inspiras la popolon pli energie batali kontraŭ la malamiko.

Fidelaj al la popolo kaj ĝia batalo ni malkovris la imperiistojn kaj ilian insidan naturon,

la kapitulaculojn kaj iliajn malpurajn artifikojn, kaj malsukcesigis iliajn kune faritajn intrigojn celantajn subfosi la revoluciajn batalojn en multaj partoj de la mondo, precipe en Azio kaj Afriko. Niaj verkistoj en multaj landoj sukcese entreprenis kampanjojn por kontraŭi la enfiltriĝon de la imperiisma kulturo en iliajn landojn. Ili sukcese kontraŭbatalis la tiel nomatajn revoluciajn literaturon kaj arton de la tiel nomataj revoluciuloj. Ili kreis naciajn kulturojn kun siaj distingaj trajtoj. Ĉiaj ajn atingoj, kiujn ni akiris, certe elvokas la malamon de la malamiko kaj ĉiuj subfosantoj. Simile, pro la disvolviĝo de la movado de aziaj kaj afrikaj verkistoj kaj pro la sukceso, kiun la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj atingis en sia laboro, la speciala taĉmento de la usona imperiismo faras, per ĉiuj rimedoj, vanajn provojn por subfosi la movadon de aziaj kaj afrikaj verkistoj kaj la Konstantan Buroon de Azi-Afrikaj Verkistoj. Ili atakas la konferencon de aziaj kaj afrikaj verkistoj, asertante ke la konferenco "diskutas nur politikon, sed ne literaturon". Tio estas senhonta provo apartigi literaturon disde politiko, revizii la korektan revolucion, kontraŭimperiisman linion de unuiĝo de la aziaj kaj afrikaj verkistoj, kaj transformi la konferencon de aziaj kaj afrikaj verkistoj en organizon de "paco, literaturo kaj bonstato". Ili bojkotas kaj atakas la laboron de la Konstanta Buroo, klopodante, per ĉiuj rimedoj, detruigi la Konstantan Buroon, aŭ transpreni la movadon de aziaj kaj afrikaj verkistoj en siajn manojn por efektiviigi sian linion de kapitulaco kaj splitigo de la revoluciaj movadoj.

LA SUKCESA OKAZIGO DE LA URĜA KUNVENO DE AZI-AFRIKAJ VERKISTOJ PLENE MONTRAS, KE LA SOVETUNIAJ MODERNAJ REVIZIISTOJ ESTAS DESTINITAJ AL MALSUKCESO

Karaj kolegoj,

Kiam ni, revoluciaj aziaj kaj afrikaj verkistoj, kunvenas tie ĉi hodiaŭ por esprimi nian nekonfuzeblan subtenon al la nacisava batalo de la heroa vjetnama popolo kaj la bataloj de ĉiuj aliaj popoloj por akiri, defendi kaj

solidigi sian nacian sendependecon, ni vidas iujn malicajn kaj mallumajn fortojn farantaj plej senhontajn intrigojn por saboti tiun ĉi nian historian kunvenon, splitigi la unuiĝon de la aziaj kaj afrikaj verkistoj kaj subfosi la solidarecon de ĉiuj aziaj kaj afrikaj popoloj. Sed, la fakto, ke tiel multaj aziaj kaj afrikaj verkistoj ĉeestas tiun ĉi memorindan kunvenon, plene montras, ke tiuj skismistoj, la sovetuniaj modernaj reviziistoj, estas destinitaj al malsukceso.

Kiel lakeoj de la usonaj imperiistoj kaj reakciuloj de ĉiuj landoj, la sovetuniaj skismistoj, celante realigi siajn malicajn intrigojn, precize elektis tiun ĉi momenton, kiam la aziaj kaj afrikaj verkistoj estas plifortigantaj sian solidarecon por subteni Vjetnamion kaj naciliberigajn batalojn de aliaj popoloj en Azio kaj Afriko.

Sub la instigo kaj direktado de la sovetuniaj skismistoj, falsa kunveno sub la mantelo de "Urĝa Kunveno de la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj" estis okazigita en Kajro de la 19-a ĝis la 20-a de junio 1966. Tio estas grava krimo, kiun la sovetuniaj skismistoj faris por publike splitigi la movadon de la aziaj kaj afrikaj popoloj, kies sekvojn devas tute respondi tiuj skismistoj. Ili prenis kontraŭleĝan kaj malestimindan paŝon por krei falsan konstantan buroon de azi-afrikaj verkistoj kaj fari kion ili nomas deoficigo de nia estimata Ĝenerala Sekretario.

Estas vere bedaŭrinde, ke Kajro estas uzita kiel okazejo de tiu skisma kunveno, kie la sovetuniaj skismistoj disrompis kaj sabotis la movadon de aziaj kaj afrikaj verkistoj kaj la batalojn de la aziaj kaj afrikaj popoloj.

La sovetuniaj skismistoj komplete senmasigis sin, kiam ili, en la kontraŭleĝa Kajro-kunveno, proponis kaj decidis okazigi en Baku, Soveta Azerbajĝanio, tiel nomatan kunvenon de aziaj kaj afrikaj verkistoj. Tiel, post la starigo de falsa buroo, absurda enoficigo de tiel nomata Ĝenerala Sekretario, ktp., ili iras plue por organizi falsan kunvenon de aziaj kaj afrikaj verkistoj en Sovetunio. Mi pensas, ke nun estas klare por ĉiu el ni, ke la sovetuniaj skismistoj estas la vera kulpulo, la ĉefa kulpulo de ĉiuj splitigaj agadoj, kiuj iris kontraŭ nia movado jam dum kelka tempo

kaj atingis sian kulminon en la skisma Kajro-kunveno.

Post ripetada avertado al ili la kunveno de la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj okazigita je la 23-a de junio 1966, en Pekino, unuanime anoncis, ke "per pripensita kaj intencita sabotado kontraŭ la movado de aziaj kaj afrikaj verkistoj la skismismaj sovetuniaj verkistoj tute deapartigis sin de la vicoj de la aziaj kaj afrikaj verkistoj kaj ĉiam seniĝis je ĉiuj siaj rajtoj kaj pozicio en la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj."

La starpunkto de la Konstanta Buroo, ĉi-rilate, estas tute konforma al la deziroj kaj postuloj de la aziaj kaj afrikaj verkistoj, kiuj ege indignas pro la sabotaj agadoj de la sovetuniaj skismistoj.

Karaj kolegoj,

Mi tuj venos al la fino de mia raporto. Ni ĉiam staras en la plej antaŭa fronto de la revoluciaj movadoj kaj bataloj de la aziaj kaj afrikaj popoloj kontraŭ la imperiistoj, estrataj de Usono, kaj iliaj lakeoj. Ni faris konvenan kontribuon al la unuiĝo de la revoluciaj verkistoj de niaj du kontinentoj kaj kune kun ili al la formado de unuecfronto kontraŭ nia komuna malamiko, usona imperiismo. Tiu ĉi unuecfronto kontraŭ usona imperiismo neniel povas inkluzivi la lakeojn kaj komplikojn de usona imperiismo. La revoluciaj verkistoj de Azio kaj Afriko batalas ĝis nun ne nur sur la batalo sed ankaŭ sur la kampo de kulturo, literaturo kaj arto. Pere de niaj verkoj ni plifortigas la solidarecon kaj la batalspiriton de la aziaj kaj afrikaj popoloj, kiuj decideme batalas por liberigi siajn landojn kaj akiri sian sendependecon kaj pacon.

La progresemaĵoj aziaj kaj afrikaj verkistoj sin dediĉas al nobla komuna tasko de la aziaj kaj afrikaj popoloj. Ni plenumos tion. Ni daŭre iros antaŭen. Neniu forto de la imperiistoj, estrataj de Usono, povas haltigi nin; neniu forto de iliaj lakeoj povas haltigi nin; neniu forto de iliaj kunlaborantoj povas haltigi nin; neniu forto sur la tero povas haltigi nin. Ni batalos kaj daŭre batalos; ni antaŭeniros kaj daŭre antaŭeniros, ĝis kiam ni komplete triumfos.

Dankon.

Unuiĝo kontraŭ Imperiismo

— Historia Misio de

Aziaj kaj Afrikaj Verkistoj

— Parolado de Guo Moĵuo, Ĉefo de la Ĉina Delegacio,
en la Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj

(I)

S-ro prezidanto,
Karaj geamikoj:

La Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj estas kunvokita en Pekino, kiun partoprenas pli ol 160 delegitoj el 53 landoj kaj regionoj kaj 12 observantoj de 5 internaciaj organizoj. Ĝi estas senprecedence granda kunveno de aziaj kaj afrikaj verkistoj. Kiel la gastiganta lando, ni sentas nin tre multe honorataj kaj kuraĝigataj. Ni esprimas niajn koran bonvenigon kaj batalajn salutojn al la batalamikoj, kiuj firme luktas kontraŭ la usona imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj.

La ĉefa temo de la tagordo de nia kunveno estas firmigi la unuiĝon de la aziaj kaj afrikaj popoloj kaj verkistoj por plue subteni kaj helpi la vjetnaman popolon en ĝia justa naci-sava batalo kontraŭ la usona imperiismo. Tiu ĉi temo, oni povas diri, jam estis plene eksplikita en la kunveno dum la lastaj kelkaj tagoj en la ĝenerala raporto de la Ĝenerala Sekretario de la Konstanta Buroo, en la diversaj specialaj raportoj kaj en la paroladoj de delegitoj kaj gastoj. Multajn bonajn opiniojn ni, la Ĉina Delegacio, kore subtenas. Ni kredas, ke ili estos enkorpigataj kiel eble plej multe en la diversaj dokumentoj de la kunveno baldaŭ ellaborotaj. Tial, nia kunveno estas ne nur kunveno granda sed ankaŭ kunveno sukcesa; pro tio ni esprimas niajn korajn gratulojn.


La naci-sava batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo devas ricevi

varman subtenon de la tutmonda popolo. Disvolvante la potencon forton de popola milito, la heroa vjetnama popolo ekstermis malamikojn unu grupon post alia, tiel metante la agresan armeon de la usona imperiismo el preskaŭ 300,000 personoj en senhelpan kaj senelirejan staton. En sia antaŭmorta barakto la usona imperiismo vane provas uzi la trompon de “paca intertraktado” por savi sin el la malvenko sur la batalokampo kaj vane provas venigi la “pacan intertraktadon” per intensigo de sia krima bombado kontraŭ la Demokratia Respubliko de Vjetnamio. Ĝuste dum la irado de nia kunveno, la usona imperiismo senskrupule bombadas de la 29-a de junio Hanojon, la ĉefurbon de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio, kaj Hajfongon, ĝian duan grandan urbon. Per tiu freneza aventurisma agado, la usona imperiismo levis sian agresan militon kontraŭ Vjetnamio al nova, pli serioza etapo.

La usona imperiismo jam ricevis punon pro siaj ferocaj krimagoj. La brava popolo de Vjetnamio faligis sep el la rabistaj aviadiloj kiuj bombadis Hanojon kaj Hajfongon en la 29-a, du en la 30-a kaj ree du en la 3-a de julio. La Stabejo de la Vjetnama Popola Armeo jam publikigis komunikon forte kondamnanta tiujn krimagojn kaj alvokanta la vjetnamajn armeon kaj popolon ĉiam pliigi sian penon por gajni pli multajn kaj pli grandajn venkojn.

Ni deziras esprimi al la heroa vjetnama popolo niajn altajn salutojn kaj gratulojn!

En sia agresiva milito kontraŭ Vjetnamio, la usona imperiismo jam troviĝas en senelireja



K-do Guo Mojuo, Ĉefo de la Ĉina Delegacio, faras paroladon titolitan "Unuiĝo kontraŭ Imperiismo — Historia Misio de Aziaj kaj Afrikaj Verkistoj".

stato. Ĝia bombado de Hanojo kaj Hajfongo montras nur ĝian malfortecon kaj malpaciencegon kaj malkaŝas ke ĝia intrigo de "paca intertraktado" estas finfine nur trompo. Doni ordonon por bombadi Hanojon montras ke la usona imperiismo troviĝas en embaraso kaŭzita de internaj kaj eksteraj malfaciloj, kaj estas esprimo de la provo de persekutata hundo kiu klopodas transsalti muron. Nia kunveno, en la 30-a de junio, unuanime adoptis sen prokrasto "Urĝan Apelon por Firma Subteno al la Batalo de Vjetnama Popolo", alvokantan la popolojn de Azio kaj Afriko kaj de la tuta mondo firme subteni kaj helpi la vjetnamajn fratojn por forpeli la usonan imperiismon el la tuta Vjetnamio kaj la tuta Hindu-ĉinio! Tio estas la voĉo de la tuta popolo de Azio kaj Afriko, kaj ankaŭ la voĉo de la popoloj de la tuta mondo.

En la 3-a de julio, nia registaro publikigis solenan deklaron, plej forte kondamnantan la barbaran krimagon de bombado al Hanojo kaj Hajfongo fare de la usona imperiismo. Ĝi esprimis la volon de la tuta ĉina popolo.

La deklaro emfazas: "La usona imperiismo jam delonge disŝiris komplete la Ĝenevajn Interkonsentojn, jam delonge rompjis la limon inter la suda parto kaj la norda parto de Vjetnamio. Nun, ĝi pluapaŝe rompjis tiun limon per bombado al la ĉefurbo de la heroa vjetnama popolo. Usono devas preni sur sin la respondecon pri ĉiuj seriozaj sekvoj rezultantaj el tio.

"Ĉar la limo estis jam rompita de Usono, do la vjetnama popolo estas submetita al

nenia limigo, kaj ankaŭ ĉiuj landoj kaj popoloj, kiuj vere subtenas la vjetnaman popolon en ĝia rezista milito kontraŭ la usona agreso, estas submetitaj al nenia limigo. Kiel fari poste la militon, jam decidus ne Usono. Se la usona imperiismo povas alveni de aero kaj maro, kial aliaj ne povas aliri surtere?"

La deklaro solene proklamas ĉe la fino: "Ĉinio kaj Vjetnamio estas najbaroj rilatantaj inter si kiel lipoj kaj dentoj kaj estas la plej intimaj frataj socialismaj landoj. Ĉinio de ĉiam konstante, senrezerve kaj laŭ ĉiuj ebloj donas subtenon kaj helpon al Vjetnamio politike, morale, materie kaj en aliaj flankoj. Nun, ĉar la agresa milito farata de la usona imperiismo jam disvolviĝis al nova, pli serioza etapo, tiaj subteno kaj helpo niaj estas des pli liberigitaj de ĉia ligiteco aŭ limigo. Laŭ la interesoj kaj postuloj de la vjetnama popolo, ni faros en ĉiu ajn tempo ĉiujn paŝojn kiujn ni opinios necesaj. Tio estas nia neforpuŝebla proleta internaciisma devo.

"La Ĉina Registaro kaj Ĉefministro Ĝou Enlaj plurfoje deklaris serioze ke, kion la ĉinoj diras, ili plenumos, ke Ĉinio estas sin-preparinta, kaj ke kiam eksplodos la milito, ĝi ne havos limojn. Ni devas serioze averti la usonajn imperiistojn: Tute egale, kien ajn vi disvastigos la militon, kaj kiom ajn grandan prezon ni devos pagi, ni firme subtenos senŝanceliĝe la fratan vjetnaman popolon batali ĝis la fino, ĝis ĝi plene kaj komplete forpelos la usonajn agresantojn el Vjetnamio kaj gajnos la finan venkon.

"Certe malvenkos la usona imperiismo, certe venkos la vjetnama popolo!"

Nia 700-miliona popolo, en unu animo tra la tuta lando, plene subtenas la deklaron de nia registaro kaj agos laŭ ĝi. Laŭ ĉiuj ebloj, liberaj de ĉia ligiteco kaj limigo, ni subtenos senŝanceliĝe la fratan vjetnaman popolon, ĝis la usonaj agresantoj estos decideme, ĝisfunde, komplete kaj plene ekstermitaj!

(II)

Karaj geamikoj, la aziaj kaj afrikaj popoloj nun pli intensigas per ĉiuj fortoj sian subtenon al la vjetnama popolo en ĝia nacistava batalo kontraŭ la usona imperiismo. Sed, kiam la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj, laŭ la postulo de la popolo kaj per laŭleĝaj rimedoj,

jam decidis kunvoki la Urĝan Kunvenon de Azi-Afrikaj Verkistoj en Pekino por subteni la vjetnaman popolon, la reviziisma gvidanta kliko de Sovetunio instigis siajn verkistojn kunvoki kelkajn sekvantojn kaj trompitajn personojn kaj okazigi en Kajro kontraŭleĝan skisman kunvenon, en kiu ili faris kontraŭleĝajn kaj absurdajn decidojn pri fondo de falsa "Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj" en Kajro, pri la t. n. eksigo de nia estimata ĝenerala sekretario de lia posteno kaj pri kunvoko de t. n. konferenco de azi-afrikaj verkistoj en Baku de Sovetunio. Tiuj arbitraj kontraŭleĝaj agadoj plene malkaŝas ke la gvidanta kliko de Sovetunio, kiu senskrupule faras splitigan agadon en internaciaj organizoj, estas la plej granda skismisto en la nuna tempo.

La gvidanta kliko de Sovetunio praktikas Ĥruŝčov-reviziismon sen Ĥruŝčov. Por efektiviĝi sian belan sonĝon de "kunlaboro inter Usono kaj Sovetunio por superregi la mondon", ĝi mem ne oponas kontraŭ imperiismo kaj eĉ malaprobas la unuiĝon kontraŭ imperiismo fare de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko; ĝi mem kapitulacas kaj flatas al Usono kaj eĉ volas logi kaj trompe devigi la popolojn de Azio. Afriko kaj Latinameriko kune kapitulaci kaj flati al Usono. Ni kredas, ke la popoloj kaj verkistoj de la tutaj Azio kaj Afriko absolute ne povas toleri tiajn fiajn agadojn de la renegatoj!

Ni ĉina delegacio firme subtenas la decidon adoptitan de la Konstanta Buroo en la 23-a de junio: "Pro sia intenca subfosado kontraŭ la movado de aziaj kaj afrikaj verkistoj, la verkistoj de Sovetunio, kiuj entreprenas splitigajn agadojn, jam deradike mem disigis sin de la vicoj de la aziaj kaj afrikaj verkistoj kaj por ĉiam perdis ĉiujn siajn rajtojn kaj lokon en la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj." Tio komplete konformas al la neŝanĝebla leĝo de la disvolviĝo de aferoj kaj estas justa kaj honesta konkludo.

Sovetunio estas la unua socialisma lando, kiu estis fondita de la granda Lenin kaj solidigita de Stalin post multa klopodado. Malfeliĉe, la proleta regpotenco de Sovetunio estis uzurpita de la reviziisma gvidanta kliko, kaj la sovetia politiko de unuiĝo kun la subpremataj nacioj de la mondo en komuna batalo kontraŭ imperiismo estis ŝanĝita per 180-grada

turniĝo en tiun de "kunlaboro inter Usono kaj Sovetunio por superregi la mondon". La gvidanta kliko de Sovetunio jam degeneris en la esenco. Tamen, svingante la standardon de Lenin kaj surportante la mantelon de socialismo, ĝi trompas la popolojn de Sovetunio kaj de la mondo. Tio estas komprenebla por ni ke amikoj el iuj landoj estas trompe blindigitaj de Sovetunio. Kaj ni kredas, ke iuj amikoj kiuj partoprenis la splitigan kunvenon en Kajro ĉifoje, estis ankaŭ trompe blindigitaj. Ni esperas, ke tiuj amikoj rigardos la problemon en ĝia esenco, liberigos sin de la tromplogo de la venena serpento, kaj revenos al la vicoj de la progresemaĵoj aziaj kaj afrikaj verkistoj por unuiĝo kontraŭ imperiismo!

Ni volas unuiĝon, sed ne skismon. Tamen, ni volas unuiĝi kun veraj amikoj por oponi kontraŭ nia komuna malamiko. Ni ne povas paroli pri unuiĝo kun la usonaj imperiistoj, nek kun la komplicoj de la usona imperiismo. La reviziisma gvidanta kliko de Sovetunio fervoregas en skismaj agadoj kaj fine rikoltos la amaraĵon, kiun ĝi mem preparas.

(III)

Geamikoj, la usona imperiismo estas la plej feroĉa komuna malamiko de ni popoloj de Azio, Afriko kaj la tuta mondo. Granda uragano kontraŭ la usona imperiismo skuas la mondan firmamenton en la rulado de tondroj. Kaj ĝi envolvas Azion, Afrikon, Latinamerikon kaj eĉ la tutan mondon. La subpremataj popoloj en nombro de centmilionoj kondukas heroan batalon kontraŭ imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj estrataj de Usono, kaj la impetega tajdo de naciliberiga movado fortege sturmas la reakcian regadon de imperiismo. En la mondo prezentiĝas grandioza bildo, kiel priskribas la sekvantaj versoj:

*Bolegas en tumulto la kvar maroj,
Koleras svarme l' akvoj kaj nubaroj.
Sub intensegaj fulmtondrad' kaj ventoj
Skuiĝas forte la kvin kontinentoj.*

La usona imperiismo mortriske antaŭen puŝas siajn politikojn de agreso kaj milito kaj sian tutgloban strategion por sklavigi la tutan homaron. Ĝia milita budĝeto jam atingis 66 miliardojn da dolaroj, t. e., kvinoblo de tiu de 1947, la dua jaro post la fino de la Dua Mondmilito. Ĝi starigis pli ol 2,200 militajn bazojn

tra la tuta mondo. Ĝi kondukas senĉese agresajn, intervenajn kaj renversajn agadojn en la tuta mondo. Ĝi estas la plej barbara agre-santo kaj la plej kruela vampiro en historio. La ĝisĉielaj krimagoj, kiujn ĝi faris, jam superis tiujn de Hitler, Musolini kaj Toĝo kune. Sed, ĉu estas vere potenca tiu ĉi plej feroĉa diablo? Ne, milfoje ne, dekmilfoje ne! Ĝia naturo kiel tiu de papertigro estas jam komplete malkovrita sur la batalkampo en Vjetnamio!

La usonaj imperiistoj, kiuj koncentris en si ĉiujn krimojn de Hitler, Musolini kaj Toĝo kune, tiuj ĉefkrimuloj — Johnson, Rusk, McNamara kaj similaj, certe havos la saman finon kiel Hitler, Musolini kaj Toĝo. La popoloj de la tuta mondo frue aŭ malfrue tiros ilin al tribunalo por militkrimuloj por la lasta juĝo kaj neniu el ili povos eskapi!

Ni ĉiuj scias, ke nun profunden disvolviĝas la movadoj por nacia liberigo de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kontraŭ imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj estrataj de Usono. La vekigintaj popoloj en multaj landoj kaj regionoj, kiaj Laoso, Tajlando, Malajo, Indonezio, Norda Kalimantano, Suda Jemeno, Kongolando (Leopoldvilo), Angolo, “Portugala” Gvineo, Mozambiko, Zimbabve, Dominiko, Ekvadoro, Venezuelo, Kolombio, Gvatemalo kaj Peruo, estas surirantaj aŭ jam surirantaj la vojjon de armita batalo. Ĉiu batalo kaj venko ilia estas forta subteno al la popoloj de Azio, Afriko kaj la mondo, kaj ankaŭ forta subteno al ni ĉina popolo. En la nomo de la ĉina popolo kaj ĉinaj verkistoj, mi esprimas altan estimon al la popoloj de diversaj landoj, kiuj kondukas heroan batalon kontraŭ imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj estrataj de Usono por gajni kaj defendi sian nacian sendependecon.

Geamikoj, ni estas verkistoj de Azio kaj Afriko. Ni estas batalantoj, kiuj uzas la plumon en sia mano por unuigo kontraŭ imperiismo. Ni rezistas tiel kontraŭ la kultura agreso de la malamiko, kiel kontraŭ ĝia armita agreso. Ni devas mobilizi kaj unuigi la popolon per nia plumo kaj plue bati kaj ekstermi la malamikon. Niaj literaturo kaj arto devas esti literaturo kaj arto batalaj kaj kontraŭimperiismaj kaj por naciliberiga batalo de la popolamaso. Tial, estas nia antitezo ne nur la dekadencaj literaturo kaj arto de la usona imperiismo, sed ankaŭ

la reakciaj literaturo kaj arto de la sovetia reviziismo.

En la lastaj jaroj, la usona imperiismo ĉiam senbride kondukas kulturalan agresadon en Azio kaj Afriko. Iuj korifeoj de Usono malkaŝe deklaris, ke “kulturo estas en la sama nivelo kun ekonomio kaj militaj aferoj”, kaj ke “lingvo kaj penso estas tiel gravaj kiel pano kaj pafiloj”. Tio plene pruvas, ke kultura agreso servas por krei spiritajn kondiĉojn por la kolonia regado kaj armita renversado entreprenataj de la usona imperiismo.

Kiam la imperiistoj faras agresadon, superregadon, intervenadon kaj renversadon al la aziaj kaj afrikaj landoj, antaŭ ĉio ili ĝenerale sklavigas nin ideologie. Nun, la usona imperiismo duobligas sian penadon por fari la t.n. “ideologian ofensivon” kontraŭ la popoloj de Azio kaj Afriko, mobilizante en senprecedence granda skalo homajn kaj materiajn fortojn por disvastigi venenajn ideojn pere de filmoj, televido, radio, gazetaro, libroj kaj “Paca Korpuso” kun intenco ekspansiigi kaj savi sian mortantan novkoloniisman regadon. Pro tio ke la konscio de la aziaj kaj afrikaj popoloj ĉiam pli altiĝas tagon post tago, la diversspecaj propagandaj instrumentoj kaj artifiko de la usona imperiismo jam estas traktataj kiel rato kuranta trans strato, al kiu ĉiu krias: “Batu ĝin!”

Tamen, ĝuste en tiuj cirkonstancoj, la modernaj reviziistoj de Sovetunio faris reakcian aliancon kun la usona imperiismo en la kultura kampo por kontentigi ĝiajn bezonojn. La reviziismaj verkistoj kaj reviziismaj literaturo kaj arto de Sovetunio estas en servo al la ĝenerala reviziisma politiko de “kunlaboro inter Usono kaj Sovetunio por superregi la mondon”. Kvankam iliaj literaturo kaj arto portas ankoraŭ la etiketon de socialismo, tamen, kio vendiĝas sub ĝi, estas fakte venenaĵoj, kiuj korodas la kontraŭimperiisman revolucionan volon, kaj ludas rolon, kiun la dekadencaj kulturo de imperiismo ne povas ludi.

La reviziismaj literaturo kaj arto de Sovetunio speciale emfazas la reakcian “teorion de homeco”. Per tuta forto, ili beligas imperiismon. Ili senĉese babilaĉas pri tio, ke “homo al homo estas amikoj, kamaradoj kaj fratoj”, ke Johnson kaj similaj, la iniciatintoj de agresaj militoj, estas “prudentaj” kaj “pacamaj”, kaj

ke la ekzekutistoj, kies manoj estas plene makulitaj de sango, estas "bonvolaj" kaj "humanaj".

Kiel ni povas imagi, ke inter Johnson, kiu masakras en Vjetnamio per napalmaj bomboj kaj kemiaj toksaĵoj, kaj la vjetnama popolo, kiu heroe kondukas rezistan militon, ekzistas komuna homeco? Kiel ni povas imagi, ke la okcidentaj sklavposedantoj, kiuj siatempe svingis sangmakulitajn vipojn, havis ian komunan homecon kun la negraj fratoj, kiuj estis ligitaj kaj pelitaj sur piratajn ŝipojn? Ili estas absolute ne iaj "amikoj, kamaĉoj kaj fratoj" unuj al la aliaj, sed nepacigeblaj malamikoj en viv-morta batalo!

La reviziismaj literaturo kaj arto de Sovetunio plie malbeligas plenforte la figuron de la revolucia popolo, atakas la socialisman sistemon, misprezentas la Oktobran Revolucion, kalumnias la grandajn Lenin kaj Stalin kaj la grandan sovetian popolon kaj tiel fariĝis opio por narkoti la revolucion volon de la popoloj de Sovetunio kaj de la mondo. Tio estigis indignon kaj kondamnon de la popoloj de Azio kaj Afriko kaj de la mondo kaj renkontas profundan malkontenton kaj proteston de la sovetia popolo.

Ni devas solene deklari, ke ni estas neakordigeblaj kun la reakciaj literaturo kaj arto de imperiismo kaj reviziismo!

(IV)

Karaj geamikoj: Por krei kontraŭimperiismajn revoluciajn naciajn novajn kulturon, literaturo kaj arton de la popolamasoj, la progresintaj verkistoj de Azio kaj Afriko jam faris elstaran kontribuon kaj produktis multe da verkoj plenaj de batalspirito. Tio indas atentan lernadon de ni ĉinaj verkistoj. Ĉi-tie, en la nomo de la ĉina popolo kaj ĉinaj verkistoj, mi esprimas varmajn gratulojn al la progresintaj verkistoj de Azio kaj Afriko.

Por interŝanĝi spertojn, permesu al mi ĉi-tie malkaŝe ion diri pri niaj cirkonstancoj.

Amikoj, kiam vi surpaŝas nian teritorion, nia lando sin trovas en alta tajdo de bolanta kaj senprecedenca granda socialisma kultura revolucio.

Prezidanto Maŭ Zedong ĉiam instruas al ni: Ni devas firme kapti ideologion kaj superstrukturon, fortikigi nian ideologian pozicion kaj

nian regpotencon. Kaj en la pint-kontraŭ-pinta batalo kontraŭ reakciaj ideologio kaj kulturo, ni devas krei kaj formi socialismajn novan ideologion, novan kulturon kaj novajn literaturo kaj arton.

La renversitaj reakciaj regintaj klasoj ankaŭ volas kapti ideologion kaj superstrukturon. Kvankam ilia reakcia regado estas jam enmetita en ĉerkon, tamen ilia ideologio ankoraŭ eligas malbonodoron de putranta kadavro. Ili ĉiamaniere klopodas fari kontraŭpartian kaj kontraŭsocialisman propagandon pere de radio, libroj kaj gazetoj, filmoj, teatraĵoj, dancoj, muzikoj kaj tiel plu. Ili estas malamikoj sen pafilo, kaj la plumoj en iliaj manoj estas murdiloj, kiuj mortigas sen sangado. Ĉiuj iliaj reakciaj propagandoj celas purigi la vojon por restarigi kapitalismon. La uzurpado de la gvidanteco de la Partio kaj ŝtato de Sovetunio kaj efektivigado de restarigo de kapitalismo en Sovetunio fare de Ĥruŝĉov-reviziisma kliko estis komencitaj je ideologio kaj superstrukturo. En la kontraŭrevolucia perforta tumulto de 1956 en Hungario tiu estis ankaŭ aro da reviziismaj literaturistoj, kiu ludis rolon de fronta sturmanto.

Tial, la granda socialisma kultura revolucio en nia lando estas batalo inter la fortoj por kaj kontraŭ restarigo de kapitalismo, kaj estas granda revolucia movado por elradiki reviziismon, firmigi la proletan diktaturon kaj garantii, ke Ĉinio por ĉiam ne ŝanĝos sian koloron tra miloj kaj miloj da generacioj.

Depost la disvolviĝo de la movado, la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj en nombro de centmilionoj lanĉis tute nerezisteble intensajn ofensivojn kontraŭ ĉiuj fortikaĵoj de reakciaj ideologio kaj kulturo, detruante kaj forigante la dekadenciaĵojn kaj putraĵojn sur la vojo. Ili senkomplete kaj profunde kritikis ĉiujn malnovan ideologion, malnovan kulturon, malnovajn morojn kaj malnovajn kutimojn, kiuj venenas la popolon, kaj komplete frakasis la reakciajn fortikaĵojn en la ideologia kampo. Ili verkis multajn bonajn artikolojn, kiuj montras ilian kreivan studon kaj kreivan aplikon de la penso de Maŭ Zedong; jam komenciĝis nova erao, en kiu, senprecedence en historio, la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj rekte

posedas kaj aplikas marksism-leninismon kaj la penson de Maŭ Zedong.

Dum la batalo por frakasi la putrajn, dekadencajn ideologion kaj kulturon, la revoluciaj literaturo kaj arto de la proletaro disradias eksterordinaran brilon. La malnova pekina opero de Ĉinio, la plej obstina fortikaĵo, estas nun konkerita kaj aperis modernaj revoluciaj pekinaj operoj, kiaj *Ŝagiabang*, *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*, *Surprizatako kontraŭ la Blank-Tigra Regimento*, *Ruĝa Signal-lanterno* k. a. Ankaŭ eksterlandaj klasikaj artformoj kiel baleto, simfonio k. a. estas submetitaj al revolucia reformo, tial aperis la baletoj *Ruĝa Virina Taĉmento* kaj *Blankhara Knabino* kaj simfonio *Ŝagiabang*. La argilaj skulptaĵoj *Farmpaga Kolektejo* levis revolucian tajdon inter la skulptistaj rondoj. La grandtipa revolucia eposo de muziko kaj danco *Ruĝas la Oriento* spegulas la heroan batalon de la ĉina popolo por ŝanĝi la ĉielon kaj teron kaj pri-kantas en plena entuziasmo la grandan venkon de la penso de Maŭ Zedong. La romano *Kanto pri Oŭĵang Haj* estas verko kun epokfara signifo. Ĝi montras, ke la socialisma literaturo havas neimageblan vastan terenon. La dramoj *Gardistoj sub la Neonaj Lampoj*, *Batal-tamburado ĉe l'Ekvatoro* kaj la multego da poemoj verkitaj de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj publikigitaj sur murgazetoj kaj nigratabuloj ĉiuj prezentas la novon de socialismo kaj starigas la distingajon de proletaro kaj markas tute novan epokon, de la ideologia enhavo ĝis la arta formo.

Nia granda kultura revolucia movado estas nun ankoraŭ en la komenca periodo de disvolviĝado. Ni firme kredas, ke sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong ni nepre povos senĉese kreadi senprecedencajn brilajn socialismajn novajn literaturon kaj arton kaj novan kulturon.

Iuj fremdlandaj sinjoroj forte riproĉas, ke ni "detruas kulturon". Jes, ni detruas dekadencajn kaj putrajn kulturojn de imperiismo, moderna reviziismo kaj ĉiuj ekspluataj klasoj. Tiujn dekadencajn kaj putrajn kulturojn ni ne nur detruos, sed ankaŭ ĝisfunde eliminis. Nur se ni detruos kaj eliminis tiujn dekadencajn kaj putrajn aferojn, ni povos vere asimili elstarajn elementojn kreitajn en la historio de la homaro. Nia sinteno al la

longhistoria antikva kulturo de nia patrujo estas forĵeti ĝiajn feĉojn, asimili ĝiajn elitaĵojn kaj kritike ilin heredi laŭ la bezonoj de socialismo. Rilate al la fremdlanda progresinta kulturo, ni pledas por kritike asimili ĉion, kio estas uzebla por ni hodiaŭ, prenante ĝin kiel ekzemplon. Sed, transpreni heredaĵojn kaj lerni de ekzemploj absolute ne povas anstataŭi la kreadon. Tio estas trafa instruo donita al ni de Prezidanto Maŭ Zedong. Krei socialismajn novajn kulturon, literaturon kaj arton, jen estas la historia misio de ni ĉinaj verkistoj kaj ĉina popolo. La nuna granda kultura revolucio devas esti grandioza preludo de nia kreado de socialisma nova kulturo.

Iuj fremdlandaj sinjoroj diris ankaŭ, ke la lanĉpinto de nia batalo "direktiĝas al ĉiuj intelektuloj". Tio estas nuda sensecaĵo. Ĉiuj povas klare vidi, ke la lanĉpinto de la granda socialisma kultura revolucio en nia lando estas direktata nur al manpleno da kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj elementoj. Ili estas nur kelkaj muŝoj, en profunda aŭtuno, kiuj ĉie kolizias kontraŭ muro kaj zumas malgaje sian funebran kanton. Por la vasta intelektularo veninta de la malnova socio, nia partio ĉiam aplikas la politikon de unuiĝo, eduko kaj remuldo, kaj instigas ĉiujn intelektulojn. kiuj vere volas progresi, suriri la larĝan vojon de revoluciigo. Sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong, en la batalo por produkto, kiu ŝanĝas la ĉielon kaj teron, la vicoj de la novtipaj intelektuloj de la laboranta popolo senĉese kreskas, senĉese fortiĝas kaj senĉese antaŭenmarŝas kuraĝe.

(V)

Karaj geamikoj, ĉi tie permesu al mi ankoraŭ iom foruzi vian altvaloran tempon por akuzi antaŭ vi tiujn fremdlandajn sinjorojn, kiuj kalumnias kaj mensogas pri nia lando en koncerno kun mia persono.

Tiel estis la afero. Antaŭ du kaj duona monatoj, t. e. je la 14-a de aprilo, en kunsido de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Repezantantoj ni aŭskultis raporton pri la kultura laboro faritan de respondeculo de la Ministerio de Kulturo. En la raporto estis menciitaj la atingoj de la kultura revolucio de nia lando, la granda rolo ludata de la vastaj amasoj de laboristoj, kam-

paranoj kaj soldatoj kaj de revoluciaj kadroj en kulturaj laboroj, kaj tio, ke la vicoj de novtipaj intelektuloj jam kreskis kaj ni jam gajnis multajn fruktdonajn rezultojn. Tio profunde kortuŝis min, kaj mi improvizis paroladon, en kiu mi faris malkaŝan memkritikon por esprimi miajn elkorajn sentojn.

Mi diris: En la *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*, Prezidanto Maŭ Zedong alvokis nin, literaturistojn kaj artistojn, servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, tamen ĝis nun forpasis jam dudek kvar jaroj, ni ne nur ne bone servis al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, sed male estas la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kiuj faris plian paŝon servi al ni eĉ sur la literatura kaj arta fronto. Iliaj verkoj en literaturo kaj arto havas multe pli grandan vivforton kaj estas multe pli instruaj ol tiuj de ni profesiaj verkistoj. Kiam ili diskutas pri filozofio, ili tion faras multe pli bone kaj en maniero kiu multe pli konvenas al la efektiva situacio, ol iuj niaj filozofiaj profesoroj. La ĉefaj kaŭzoj kuŝas en tio, ke la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj scias pli bone kreive studi kaj kreive apliki la penson de Maŭ Zedong. Ili lernas el praktikado en vivo, el la batalo por produkto kaj el klasbatalo, sed ne sole el libroj. Kion ili lernas, tion ili tuj aplikas, kaj kiam ili ekposedas scion, ili tuj turnas ĝin en agadon, tial ili atingas rezultojn rapide kaj profunde. Intelektuloj opinias sin superaj kaj ĉiam pravaj kaj ne povas bone agi laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ, tial ili ne povas progresi kaj restas malproksime post la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Iuj eĉ degeneris kaj falis en la marĉon de opono kontraŭ la Partio, socialismo kaj la penso de Maŭ Zedong kaj fariĝis objektoj de la granda kultura revolucio.

Profunde impresita, mi unuflanke ĝojis pro la venkoj de la kultura revolucio kaj, aliflanke, ne povis ne senti en mi la devkonscion kiel intelektulo. Mi faris kritikan ekzamenon pri mi mem, dirante ke laŭ la hodiaŭaj normoj la verkaĵoj, kiujn mi skribis antaŭe, estas senvaloraj kaj, por diri rigore, devus esti bruligitaj. Tio estis la sublimato de mia devkonscio kaj la vortoj venis tute el la fundo de mia koro. Sed kiam tiuj vortoj disvastiĝis eksterlande, ili eksteratende surprizis la tutan mondon. Multaj sinceraj amikoj esprimis sian

profundan zorgon pri mi, pro tio mi dankas ilin. Sed en la gazetoj kaj ĵurnaloj de kapitalismaj landoj kaj landoj de moderna reviziismo leviĝis kontraŭĉina tajdo en konsiderinda skalo. Ili intence distordis mian paroladon por oponi la grandan kulturen revolucion en nia lando.

Estas interese, ke japana kritikisto diris ke mi estis devigita fari memkritikon kaj bruligi miajn proprajn verkojn, kaj ke tio estas pli kruela kaj pli aroganta ago ol la bruligo de libroj kaj enterigo de instruituloj vivaj fare de la Unua Imperiestro de Kin-dinastio antaŭ pli ol du mil jaroj. Li ankaŭ diris, ke mi estas "morale dekadenca" kaj ke li gratulas sin pro tio ke li vivas en Japanio, lando kun "centprocenta libereco de parolo kaj eldono". Mi rekonas, ke tiu sinjoro kun alta moralo havas "centprocentan liberecon", sed, bedaŭrinde, nur "centprocentan liberecon" de mensogo kaj kalumnio, de malkaŝo de sia senscio kaj de opono kontraŭ la popolo kaj socialismo.

Senĉese sin reformi kaj senĉese fari seriozan memkritikon estas normala afero en nia lando por revolucia verkisto respondeca al la popolo. Ne estas mirinde, se la ĵurnalistoj de kapitalismaj kaj reviziismaj landoj ne komprenas tion. Sed ili ridis tro frue. Ili asertis, ke mi homo "morale dekadenca" certe jam estas deoficigita kaj eĉ perdis liberecon. Imagu, ĉina verkisto, kiu perdis sian liberecon, nun estras la Delegacion de Ĉinaj Verkistoj kaj estas elektita de vi kiel la prezidanto de la nuna Urĝa Kunveno de Azi-Afrika Verkistoj, kaj libere parolas sur tiu majesta tribunalo al verkistoj el 53 landoj kaj regionoj de Azio kaj Afriko. Ĉu tio ne estas la plej interesa rakonto de la 1002-a nokto de la *Arabaj Noktoj*?

Tamen estas ankoraŭ pli interesaj kalumnio kaj distordo. En la supremenciita memkritiko mi diris en iu paragrafo, ke mi devas lerni de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, ke mi volas iri al la kamparo por esti tie makulita plenkorpe per koto, ke mi volas iri al fabriko por esti tie makultia per oleo, kaj ke se la usona imperiismo kuraĝus trudi militon al la ĉina popolo, mi volus ĵeti kelkajn mangrenadojn al la usonaj imperiistoj kaj makuliĝi per sango. Tiu deklaro prezentas la altajn aspirojn komune posedatajn hodiaŭ de la tuta ĉina popolo.

Tiuj vortoj estas distorditaj de la ĵurnalistoj en iuj landoj ĝis nerekonobleco. Ili diris, ke mi estas persekutata kaj reformata ideologie per punlaboro. Krome ili ankaŭ diris, ke mi petas la usonajn imperiistojn "pafi al mi unue!" Vere estas interesege, ke tiuj sinjoroj vive bildigis sian mizeran aspekton de adoro, timego kaj flatemo al Usono.

Aparte originala estas la agmaniero de la sovetunia *Literatura Ĵurnalo*. La 5-an de majo ĝi publikigis preskaŭ tutan tekston de mia parolado. De kiam la reviziistoj ekkaptis la regpotencon, la sovetuniaj ĵurnaloj kaj gazetoj neniam reprenis artikolojn de nia lando. Kial ĉifoje ili montris al mi specialan favoron? Tio havas kaŝitan celon. Ili opiniis, ke mi falis en malhonoron, kaj tial aperigis mian "malhonoron" antaŭ la publiko en la ĵurnalo. Ili rigardas malhonoro rigoran memkritikon de verkisto kun devkonscio, kaj senkompara "honoro" tion, ke Ŝoloĥov ricevis Nobel-premion odorantan je pulvo. El tio oni povas vidi la esencon de la moderna reviziismo. Ĉu ekzistas ia diferenco inter ili kaj la ĵurnalistoj de kapitalismaj landoj?

Tia estas la maniero de distordado kaj mensogado adoptita de iuj sinjoroj en kapitalismaj kaj reviziismaj landoj. Ili malamas Ĉinion kaj nian grandan kulturan revolucion. Ilia profesio estas fabriki publikan opinion kontraŭĉinan. Ili estas manpleno da veraj "morale dekadencaj" trompistoj kaj megafono de imperiismo kaj reviziismo.

La t. n. "publika opinio" de imperiismo devas esti komprenata en la mala senco. Tio, kion la imperiistoj nomas "paco", estas ĝuste "agreso", tio, kion ili nomas "libero", estas ĝuste "sklavigo", tio, kion ili nomas "helpo", estas ĝuste "elpremo". La vortoj de la reviziistoj devas ankaŭ esti tiel komprenataj, speciale tio, kion ili nomas "unuigita agado", fakte estas splitiga ago celanta unuiĝi kun la usona imperiismo.

Tamen tia kontraŭĉina bojado ankaŭ havas sian valoron en mala senco. Kiam la imperiistoj kaj reviziistoj oponas nin, tio atestas, ke ni senhalte marŝas antaŭen. Se iam la imperiistoj kaj reviziistoj laŭdus nin, tio atestus, ke ni degeneris. Se ni troviĝus en tia stato, ni petas, ke la progresintaj verkistoj de Azio kaj Afriko senkompate kaj rigore kondamnu nin.

(VI)

Karaj geamikoj,

Antaŭ tri tagoj la 1-an de julio, estis la 45-a datreveno de la fondiĝo de nia partio. Tiuj 45 jaroj estis la jaroj, dum kiuj la ĉina revolucio disvolviĝis en seninterrompa batalado, kaj ankaŭ estis la jaroj dum kiuj kamarado Maŭ Zedong kreive kombinis la veron de marksism-leninismo kun la konkreta praktiko de la ĉina revolucio konstante disvolvante marksism-leninismon. En la 45 jaroj, ni trapasis senlimajn malfacilojn kaj suferojn kaj ankaŭ spertis senkompare kruelajn repuŝojn. Ni neniam povas forgesi la grandan masakron faritan de Ĉiang Kajŝek en 1927, ni neniam povas forgesi la 25,000-lian Longan Marŝon kaj ni neniam povas forgesi la vivon en la kaverna loĝejo en Jan-an dum pli ol dek jaroj, kiujn ni finis antaŭ 17 jaroj. Tamen, nia partio kreskis kaj fortiĝis en la penega batalado. Sub la brilo de la konstante disvolviĝanta penso de Maŭ Zedong, la hodiaŭa Ĉina Popola Respubliko elkreskis el la kaverna loĝejo de Jan-an. Niaj ruĝaj daŭrigantoj senĉese aperas en la hodiaŭa Ĉina Popola Respubliko, kaj niaj amikoj troviĝas tra la tuta mondo. Ĉu ni ne povas konstrui grandan palacon de novaj kulturo kaj novaj literaturo kaj arto, kiuj superos tiujn de ĉiuj niaj antikvuloj kaj lumigos centon da generacioj venontaj?

Ni respondos jese: Certe ni povas! Sed ni devas ĉiam teni ĉe ni la spiriton de Jan-an kaj ĉiam kreive studi kaj kreive apliki la penson de Maŭ Zedong, sen momenta malstreĉiĝo.

Geamikoj, la penso de Maŭ Zedong estas sendube la kulmino de marksism-leninismo en la nuna epoko. La verkoj de Prezidanto Maŭ estas la plej altaj instrukcioj por ĉiuj niaj laboroj.

El la propra longdaŭra revolucia batalado, ni ĉina popolo mem profunde komprenas:

Ĉiam, kiam ni agas konforme al la penso de Maŭ Zedong, la revolucio iras ĉie ajn glate, ĉiam, kiam ni nur iomete deflankiĝas de la penso de Maŭ Zedong, la revolucio eksuferas repuŝojn kaj malsukceson.

Sur ĉiu ajn posteno, kie ni agas konforme al la penso de Maŭ Zedong, la laboro iras ĉiam sukcese; en ĉiu ajn posteno, kie ni nur iomete

deflankiĝas de la penso de Maŭ Zedong, la laboro eksuferas repuŝojn kaj malsukceson.

La penso de Maŭ Zedong estas aplikebla ne nur al la revoluciaj, politikaj kaj ideologiaj bataloj, sed ankaŭ al la bataloj por produkto, literatura kaj arta kreado kaj scienca esplorado.

En nia lando, la daĝaj-anoj, kiuj kreive studas kaj aplikas la penson de Maŭ Zedong, ŝanĝis la malriĉajn kaj sterilajn ravinojn, kie nestis vulpoj, en fekundajn kampojn. Kreive studante kaj aplikante la penson de Maŭ Zedong, la daking-anoj ebligis al Ĉinio kontentigi siajn bezonojn de oleo. Kreive studante kaj aplikante la penson de Maŭ Zedong, niaj sciencistoj produktis sintezan insulinon multe pli bonan ol la Okcidenta Germanio kaj Usono.

La Ĉina Popola Liberiga Armeo fondita persone de Prezidanto Maŭ estas des pli modelo en kreiva studado kaj aplikado de verkoj de Prezidanto Maŭ. Dank' al ĝi ni gajnis la venkon de la ĉina revolucio, pli sekure defendas la landlimojn de nia patrio kaj gardas la mondan pacon. Ĝi estas ne nur armeo por armita batalo, sed ankaŭ armeo de produkto kaj kulturo. Ni ĉinaj verkistoj nun lernas de ĝi kune kun la tutlanda popolo. Kune kun ĝi ni "studos la verkojn de Prezidanto Maŭ, sekvos la vortojn de Prezidanto Maŭ, agos konforme al la instrukcioj de Prezidanto Maŭ kaj estos bonaj soldatoj de Prezidanto Maŭ."

La praktiko de la ĉinaj verkistoj en batalado kaj kreado plene pruvas: Se ni povas fari ion utilan al la popolo, la kialo estas nenio alia ol tio ke ni havas nian grandan gvidanton — Prezidanton Maŭ kiu donas al ni instruojn.

Karaj geamikoj, ni kun ekstrema ĝojo vidas, ke ankaŭ la revoluciaj popoloj de la tuta mondo havas senliman amon al Prezidanto Maŭ. Kaj de tiu ĉi solena tribuno multaj amikoj kantis laŭdkantojn al Prezidanto Maŭ el sia koro. Ni rigardas ĉion ĉi kiel kuraĝigon kaj instigon al ni. Kaj en la nomo de la ĉinaj verkistoj kaj popolo mi ŝatus esprimi al vi koran dankon!

Karaj geamikoj:

En la kunveno, la indonezia delegito proponis kunvoki la Trian Konferencno de la Azi-Afrikaj Verkistoj en Pekino anstataŭ en Djakarta, kaj tion konsentis la delegitoj de multaj landoj. Ni estas profunde emociitaj pro tio ke vi tiel alte taksas kaj fidus Ĉinion.

Se tiu propono estos definitive akceptita de la kunveno post diskutado, ni prenos sur nin tiun gloran taskon kun plezuro. Ni faros klopodojn por bone plenumi la preparajn laborojn kaj certe faros la Trian Konferencno de Azi-Afrikaj Verkistoj ankaŭ kunveno granda kaj sukcesa.

Tiu Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj en Pekino fariĝos grava mejloŝtono en la plua disvolvado de la movado de aziaj kaj afrikaj verkistoj. Nia standardo fariĝis pli klara kaj nia vicaro pli vasta. La 2-miliarda popolo de Azio kaj Afriko kaj la progresintaj popoloj de la tuta mondo turnas sian rigardon al ni. Ili ĉiuj atendas de ni fari novan kontribuon al la afero de unuiĝo kontraŭ imperiismo. Ni ne devas montri nin ne indaj al la alta espero de la popolo. Ni kolektiĝu sub la standardon de la internacia unuecfrento kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, konstante interŝanĝu spertojn, konstante kuraĝigu unu la alian, por ke la amikeco inter ni plifortiĝu tagon post tago kaj niaj batalaj verkoj prospere floru sinsekve kiel la floroj en printempo.

Ek al la batalo! La popoloj kaj progresintaj verkistoj de Azio, Afriko kaj la tuta mondo unuiĝu plie, marŝu antaŭen samtakte, oponu splitismon kaj kapitulacismon kaj konduku la batalon kontraŭ imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj ĝis la fino!

Ek al la batalo! Forbalau ĉiujn obstaklojn — la imperiismajn kaj reviziismajn dekadencajn literaturon kaj arton de sur nia vojo kaj triumfe marŝu antaŭen al la releviĝo de literaturo kaj arto en la nova epoko!

Ek al la batalo! Certe naskiĝos nova mondo, mondo sen imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj. Levu niajn manojn kaj varme hurau al ĝi!

Certe venkos Vjetnamio, certe malvenkos la usona imperiismo!

Certe venkos la popoloj de Azio kaj Afriko, certe malvenkos imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj!

Vivu la kontraŭimperiisma unuiĝo de la aziaj kaj afrikaj verkistoj!

Vivu la granda unuiĝo de la aziaj kaj afrikaj popoloj!

Vivu la granda unuiĝo de la popoloj de la mondo!

Alte Flirtas la Standardo de Batalo kaj Unuiĝo de Azio kaj Afriko

Okaze de la Fermiĝo en Sukceso de la
Urga Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj

Ĉefartikolo de *Popola Ĵurnalo* (10-a de julio)

La monde atentata Urga Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj jam fermiĝis kun sukceso hieraŭ. En la pasintaj pli ol dek tagoj, pli ol 160 verkistaj delegitoj el 53 landoj kaj regionoj de Azio kaj Afriko diskutis en sufiĉa grado, varme, vaste kaj demokratie pri la komuna bataltasko plej urĝa en la nuna tempo por la aziaj kaj afrikaj popoloj, pasigis la komunikon de la kunveno kaj 37 rezoluciojn, kaj faris gravegan kontribuon al la afero de unuiĝo kontraŭ imperiismo de la aziaj kaj afrikaj popoloj. Ĝi estas epokomarka mejloŝtono en la historio de la movado de aziaj kaj afrikaj verkistoj. Ĝi estas granda kunveno de revolucio, unuiĝo kaj venko de la aziaj kaj afrikaj popoloj.

Tiu ĉi Urga Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj estas granda manifestacio de 2-miliarda popolo de Azio kaj Afriko kontraŭ imperiismo estrata de Usono. De la lasta tempo, imperiismo kaj ĝiaj komplikoj freneze bojadas kaj kriaĉas ke la unuiĝo de Azio kaj Afriko "sin trovas en krizo" kaj la spirito de Azio kaj Afriko "ne plu ekzistas". Sed imperiismo kaj ĝiaj komplikoj ĝojas tro frue. La brila sukceso kun historia signifo de tiu ĉi kunveno

en Pekino elokvente atestas, ke la spirito de kontraŭimperiisma unuiĝo de la aziaj kaj afrikaj popoloj havas senkompare fortegan kaj nevenkeblan vivforton. La popoloj de Azio kaj Afriko ankoraŭfoje akiris grandan venkon, sed imperiismo kaj ĝiaj komplikoj ankoraŭfoje suferis hontindan bankroton.

Kiom fiere flirtas en la ora sunbrilo la standardo de la kontraŭimperiisma unuiĝo de Azio kaj Afriko! La pekina kunveno enpuŝis la movadon de aziaj kaj afrikaj verkistoj en tute novan etapon. Alta kontraŭimperiisma kaj revolucia spirito plene regis la pekinan kunvenon. La komuniko kaj rezolucioj aprobitaj de la kunveno decideme oponas kontraŭ imperiismo kaj nova kaj malnova koloniismoj, precipe kontraŭ la agresa kaj milita politikoj de la usona imperiismo, la malamiko n-ro 1 de la aziaj kaj afrikaj popoloj, kaj firme subtenas la liberigan batalon de ĉiuj subpremataj popoloj kaj nacioj en Azio, Afriko kaj la tuta mondo. La komuniko de la kunveno rigore riproĉas ĉiujn malnoblajn intrigojn, kiuj subfosas la unuiĝon de aziaj kaj afrikaj verkistoj. En la kunveno

Delegitoj el Laoso kaj Sirio aĉetas verkojn de Prezidanto Maŭ. Ili diris: "Prezidanto Maŭ Zedong estas la plej granda espero por la subpremataj popoloj."



estis ankaŭ akceptita rezolucio por firme oponi la kulturan agreson fare de la okcidenta imperiismo kontraŭ la landoj de Azio kaj Afriko, kaj postuli disvolvon de nova kontraŭimperiisma revolucia nacia kulturo de popolamaso. Ĉio ĉi tio spegulas la komunan volon de la aziaj kaj afrikaj popoloj pri unuiĝo, sendependeco, libereco kaj konduko de la kontraŭimperiisma revolucio ĝis la fino.

Vjetnamio estas la plej intensa batalejo en nuntempa internacia lukto kaj la unua fronto de la kontraŭimperiisma batalo de la aziaj kaj afrikaj popoloj. La ĉefa temo de diskutado de la kunveno ĝuste estis la problemo pri opono kontraŭ la armita agreso de la usona imperiismo en Vjetnamio kaj subteno al la nacisava batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo. 2-miliarda popolo de Azio kaj Afriko staras ĉe la flanko de la heroo batalanta vjetnama popolo. Sub la subteno de la popoloj de Azio, Afriko kaj la tuta mondo, la vjetnama popolo persistas je la kontraŭusona rezistmilito, certe povos komplete forpeli la usonajn agresantojn el la teritorio de sia patrujo kaj akiros la finan venkon de la afero por rezisti Usonon kaj savi la nacion. Tiuj, kiuj kuras tien kaj reen por servi al la usona imperiismo kaj kaŝe aŭ malkaŝe kolportas la trompon de "paca intertraktado" de Johson-registaro, malnoble perfidas ne nur la revolucionan aferon de la vjetnama popolo, sed ankaŭ la revolucionan aferon de la popoloj de Azio kaj Afriko.

Ilia malpura agado nepre estos malkaŝita kaj frakasita en la kontraŭusona torentego de la vjetnama popolo kaj la popoloj de la tuta mondo.

Nuntempe, la revoluciaj popoloj de la tuta mondo, precipe la popoloj de Azio kaj Afriko, kondukas grandan senprecedence intensan batalon kontraŭ la kontraŭrevoluciaj fortoj de imperiismo estrata de Usono. Centmilionoj da popolanoj senĉese sin jetas en la revolucionan torentegon, sed manpleno da pseŭdrevoluciaj kaj kontraŭrevoluciaj ruboj kaj feĉoj estos neeviteble forlavitaj kaj forbalaitaj. La reviziisma gvidanta kliko de Sovetunio plenforte subfosas la unuiĝon de Azio kaj Afriko kaj revolucionan aferon de la aziaj kaj afrikaj popoloj, kaj jam degeneras kiel komplikoj de la usona imperiismo. Ĝi metas sin en pozicion malamikan kontraŭ la popoloj de Azio, Afriko kaj la mondo. La popoloj de Azio, Afriko kaj la tuta mondo pliapaŝe disvastigas kaj plifortigas la internacian unuecfronton kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Tiu estas vera sed ne falsa, vasta sed ne mallarĝa internacia unuecfronto. Ĝi devas inkluzivi ĉiujn landojn kaj popolojn, kiuj suferas la agresadon, intervenadon, superregadon kaj tiranadon de la usona imperiismo, sed absolute ne povas inkluzivi la reviziisman gvidantan klikon de Sovetunio, ĉar la lasta jam fariĝis komplico kaj kunkonspiranto de la usona imperiismo. En la paroladoj de

delegitoj diritaj en la kunveno, estis montrite, ke en la oponado kontraŭ imperiismo oni devas nepre oponi reviziismon, tio tute ne estas hazardo.

En tiu ĉi pekina kunveno delegitoj el multaj landoj laŭdis en sia parolado Prezidanton Maŭ kaj la grandan penson de Maŭ Zedong kun plej sincera sento kaj per plej belaj vortoj. Ili diris, ke Prezidanto Maŭ estas “granda instruisto kaj gvidanto de la tutmondaj popoloj”, “la granda direktlisto de Ĉinio kaj la tuta mondo” kaj “la plej granda espero de la subpremataj popoloj”. Ili diris, ke la granda penso de Maŭ Zedong estas “la kulmino de la nuntempa marksism-leninismo”, “la nees-tingebla torĉo kaj la ruĝa suno de la revoluciistoj de la tuta mondo” kaj “armilo pli potenca ol atombombo”.


La ĉina popolo elkore dankas pro la ĝusta internacia takso pri la granda penso de Maŭ Zedong kaj la laŭdoj al la spertoj de la revolucio kaj konstruado de Ĉinio, kiujn la Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj faris. La ĉina popolo tre alte taksas la spertojn de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko en ilia batalo kontraŭ imperiismo kaj la revoluciajn spertojn de la popoloj en Eŭropo kaj Ameriko, kaj opinias ĉiujn ĉi tiujn spertojn lernindaj por la ĉina popolo.

Tiu ĉi kunveno okazis ĝuste en la alta tajdo de la granda proleta kultura revolucio, kiu vigle disvolviĝas en nia lando. La kunveno montras, ke la revoluciaj popoloj kaj progresintaj verkistoj de diversaj landoj en Azio kaj Afriko el siaj propraj spertoj profunde sentas, ke por ĝisfunde sin liberigi la subpremataj

nacioj kaj popoloj devas ne nur batalakiri kompletan sendependiĝon en politiko kaj apogi sin sur la propraj fortoj en ekonomio, sed ankaŭ decideme faligi la malnovajn reakciajn putrajn kulturon kaj ideologion de imperiismo kaj koloniismo, kaj starigi kaj disvolvi siajn novajn kontraŭimperiismajn revoluciajn naciajn kulturon kaj ideologion de popolamaso. La kontribuo, kiun la kunveno faris ĉi-rilate, multe helpas al la disvolviĝo de la kontraŭimperiisma revolucia batalo de la popoloj de Azio kaj Afriko, kaj donos grandan kuraĝigon al la ĉina popolo.

La vasta popolo de nia lando esprimas sian elkoran bonvenigon al la verkistoj-amikoj el Azio kaj Afriko kaj varman subtenon al tiu ĉi kunveno. En tio vive enkorpiĝas la granda unuiĝo kaj batala amikeco inter la ĉina popolo kaj la popoloj de Azio kaj Afriko. Ni precipe ĝojas, ke la Tria Konferenco de Azi-Afrikaj Verkistoj okazos en Pekino. Ni entuziasme atendas, ke en la venonta jaro ni havos refoje batalan renkontiĝon kun verkistaj delegitoj el diversaj landoj de Azio kaj Afriko por interŝanĝi batalajn spertojn.

Prezidanto Maŭ montris, ke “Imperiismo plej timas la vekiĝon de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, kaj la vekiĝon de diverslandaj popoloj de la mondo. Ni devas nin unuiĝi por peli la usonan imperiismon el Azio, Afriko kaj Latinameriko ĝis ĝia hejmo.” Unuiĝu la verkistoj kaj popoloj de Azio kaj Afriko! Lasu nin teni pli alte la batalan standardon kontraŭ imperiismo kaj nova kaj malnova koloniismoj estrataj de Usono, kaj antaŭenmarŝu brave al la luma estonteco!



Delegitoj kaj observantoj vizitas la akvokonservujon konstruitan sur montdeklivo de Ŝaŝiju-brigado, Zunhua-gubernio, Hebej-provinco, kiu estas unu el la Daĝaj-tipaj progresintaj agrikulturaj organizaĵoj en la lando.

Rezolucio

pri la

Vjetnama Problemo

NI, reprezentantoj de verkistoj de aziaj kaj afrikaj landoj ĉeestantaj la Urĝan Kunvenon de Azi-Afrikaj Verkistoj okazintan en Pekino, la ĉefurbo de la Ĉina Popola Respubliko, de la 27-a de junio ĝis la 9-a de julio, 1966, por subteno al la vjetnama popolo kontraŭ agreso de la usona imperiismo, esploris la seriozan situacion kaŭzitan de la agresa milito kondukata de la usona imperiismo en Vjetnamio.

Aŭskultinte la raportojn pri la situacio en Vjetnamio faritajn de la reprezentanto de la Vjetnama Verkista Asocio kaj la reprezentanto de la Literatura kaj Arta Asocio por Liberigo de Suda Vjetnamio, ni en la nomo de la verkistoj kaj popoloj de aziaj kaj afrikaj landoj kondamnas kun senkompara indignego la kriman militon de agreso kontraŭ Vjetnamio faratan de la usona imperiismo, kaj esprimas nian varman subtenon al la heroa batalo de la popolo en norda kaj suda partoj de Vjetnamio kontraŭ la usonaj agresantoj por defendi siajn naciajn rajtojn.

De dek du jaroj la usona imperiismo kondukas seninterrompan agresadon kon-

traŭ Vjetnamio. Ĝi piedpremas la sanktajn naciajn rajtojn de la vjetnama popolo, t. e., sendependecon, suverenecon, unuecon kaj teritorian integrecon, kaj serioze rompis la Ĝenevajn Interkonsentojn de 1954, kiujn ĝi solene rekonis. Kune kun siaj pupoj, la perfiduloj, ĝi efektivas ekstreme kruelan politikon kun celo ŝanĝi sudan Vjetnamion en novtipan kolonion kaj militan bazon por agreso kontraŭ la Demokratia Respubliko de Vjetnamio kaj aliaj landoj en Hindoĉinio kaj sudorienta Azio. Ĝi vane esperas, ke la sudvjetnama popolo kapitulacos al ĝi. Tamen la heroa popolo de suda Vjetnamio ne submetiĝis, sed kuraĝe leviĝis por senlaca batalo kun armiloj en siaj manoj kontraŭ la usonaj agresantoj kaj iliaj lakeoj, marŝas antaŭen sentime kaj kun fortoplana impeto, kaj gajnis venkon post venko, kaj la "speciala milito" de la usona imperiismo renkontis fiaskon. Por savi sin el kompleta fiasko, la usona imperiismo unuflanke ĵetis centojn da miloj da armeanoj en sudan Vjetnamion, kaj, aliflanke, senskrupule lanĉis aerajn kaj marajn atakojn kontraŭ la Demokratia Respubliko de Vjetnamio, membro

de la socialisma tendaro kaj suverena kaj sendependa lando. Freneze intensigante sian agresan militon kontraŭ ambaŭ partoj de Vjetnamio, la usona imperiismo faris sennombrajn barbarajn krimojn kontraŭ la vjetnama popolo, kiujn forte kondamnis ĉiuj homoj kun konscienco tra la mondo.

En sudan Vjetnamion la usona imperiismo enĵetis ĝis nun usonajn trupojn kun 280,000 armeanoj kaj trupojn kun pli ol 30,000 armeanoj el usonaj satelitaj landoj, kaj uzis pupajn trupojn kun pli ol 500,000 armeanoj, por intensigi sian agresan militon kun intenco okupi sudan parton de Vjetnamio per forto. La usonaj trupoj grandskale uzas toksajn kemiaĵojn kaj venenajn gasojn en miloj da tunoj, blankfosforajn kaj napalmajn bombojn en centmilionoj da tunoj kaj ekspedis B-52 bombaviadilojn, ktp. por masakri la civilajn loĝantojn, maljunulojn, virinojn, infanojn, kaj detruigi grenplantojn kaj vilaĝojn. Ekde la komenco de 1965, ili senĉese lanĉis grandskalajn operaciojn kaj efektividigis, kien ajn ili iris, la politikon "ĉion bruligi, ĉion detruigi kaj ĉiun mortigi" kun intenco subigi la popolon de suda Vjetnamio.

En norda Vjetnamio, la usona imperiismo atencis senhonte kaj malnoble la suverenecon de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio, uzante aerajn kaj marajn trupojn por senbridaj atakoj kontraŭ vilaĝoj, urboj, lernejoj, malsanulejoj, infanvartejoj, preĝejoj, pagodoj, bazaroj, minejoj, fabrikoj, kamparoj, digoj, pontoj, vojoj, ktp. Je la 29-a kaj 30-a de junio, 1966, la usonaj imperiistoj bombis kaj mitralis Hanojon, la ĉefurbon de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio, kaj la havenon Hajfongo, la duan grandan urbon en norda Vjetnamio, tiel levis sian agresan militon al nova kaj ekstreme serioza ŝtupo.

Dum la intensigado de sia agresiva milito kontraŭ ambaŭ norda kaj suda partoj de Vjetnamio, la usona imperiismo plifortigis sian militon de agreso en Laoso, uzante B-52 strategiajn bombaviadilojn por bombi kaj mitrali multajn lokojn en la

liberigitaj regionoj de la laosa popolo, kaj neniam ĉesis atenci la suverenecon kaj teritorion de la paca kaj neŭtrala Reĝlando de Kamboĝo.

Por konduki agreson en ambaŭ partoj de Vjetnamio, la usona imperiismo uzas ne nur siajn fortojn en suda Vjetnamio kaj la fortojn de sia Sepa Floto apud la bordo de Vjetnamio, sed ankaŭ siajn fortojn, kiuj postenis en Tajlando, Guam, Okinava, la Filipinoj, ktp. La agresiva milito lanĉita de la usona imperiismo en Vjetnamio serioze detruas pacon en Hindoĉinio, tretas ĉiujn internaciajn interkonsentojn kaj internaciajn leĝojn, tretas fundamentajn naciajn rajtojn, malhelpas la nacian liberigan movadon kiu leviĝas tempeste en Azio, Afriko kaj Latinameriko, kaj minacas pacon en sudorienta Azio kaj la mondo.

La krimoj, kiujn la usona imperiismo faris kontraŭ la vjetnama popolo, pruvas ke ĝi estas la plej feroce milita krimulo de la nuna epoko. La faktoj en Vjetnamio pruvas, ke la usona imperiismo estas eĉ pli barbara, pli kruela kaj pli damninda ol la hitlera faŝismo antaŭe. La usona imperiismo estas malamiko n-ro unua de la vjetnama popolo, de la popoloj de Azio kaj Afriko, kaj de la tuta mondo. La krimoj, kiujn la usona imperiismo faris en Vjetnamio, provokis la senkomparan indignon de konscien-

Laboristoj en Hanojo, Vjetnamio, varme respondas al la granda alvoko de Prezidanto Ho Chi Minh kaj decidas nepre venki la usonajn agresantojn.



caj verkistoj en Azio kaj Afriko kaj de pac- kaj justec-amantaj verkistoj tra la mondo.

La batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la agreso de la usona imperiismo por defendi nacian sendependecon, suverenecon, unuecon kaj teritorian integrecon estas tute justa batalo. En tiu ĉi batalo, la heroa vjetnama popolo starigas brilan ekzemplon, kaj enkorpiĝas la heroan batal-spiriton kaj decidemon de la aziaj kaj afrikaj popoloj por firme gajni sendependecon kaj liberecon kontraŭ ĉiuj intrigoj kaj perfortoj de imperiismo estrata de la usona imperiismo kaj ĝiaj reakciaj lakeoj.

Jam dekdu jarojn la popolo de suda Vjetnamio persistis en heroa batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, kaj ripete malsukcesigis unu post alia iliajn intrigojn de agreso kaj sklavigo. Depost kiam la usona imperiismo aldone kaj grandamase alsendis siajn trupojn al suda Vjetnamio, la heroa sudvjetnama popolo daŭre kaj forte antaŭenpuŝis sian nacisavan rezist-militon kaj iniciate lanĉis unu atakon post alia kontraŭ la malamikoj, ĉu en la seka aŭ en la pluva sezono, donante pezajn batojn al ili en montregionoj, sur la ebenaĵoj kaj en la urboj, kaj gajnante grandajn politikajn kaj militajn venkojn. Dum la kvin monatoj de la seka sezono sola (de novembro 1965 ĝis marto 1966), kiam la usonaj agresantoj faris vanajn provojn rekapti la iniciaton, la heroaj armeo kaj popolo de suda Vjetnamio ekstermis 114,000 malamikojn, inkluzive pli ol 43,000 de la trupoj de Usono kaj ĝiaj satelitaj landoj, faligis kaj detruis surtere 1,440 aviadilojn, detruis kaj difektis 1,310 militajn veturilojn de diversaj tipoj, ktp. Suferinte pezajn malsukcesojn dum la ĵus pasinta seka sezono, la usonaj agresantoj suferas ankoraŭ pli pezajn malvenkojn en la nuna pluva sezono.

La heroa nordvjetnama popolo kun siaj nevenkeblaj popolaj armitaj fortoj luktis kun ekstrema braveco kaj donis merititan punon al la usonaj agresantoj. Ĝis nun, pli ol 1,100 usonaj aviadiloj estas faligitaj, kaj grandnombraj usonaj aeraj rabistoj estas mortigitaj aŭ militkaptitaj. Sub barbaraj bombadoj de la usonaj agresantoj, la nordvjetnama popolo kiel antaŭe antaŭenpuŝas produktan laboron kaj daŭrigas konstruadon de la materia kaj teknika bazo de socialismo en la Nordo, sub la sloganoj: "teni martelon en unu mano kaj pafilon en la

alia", "direkti la plugilon per unu mano kaj teni pafilon en la alia". Ju pli multe bombadas la usonaj aviadiloj, des pli bolas la konkursa alttajo por nacia savado kontraŭ usona agreso, kaj des pli forte disvolviĝas agrokultura kaj industria produktado. Kulturaj kaj artistaj aktivecoj pli kaj pli fariĝas efika armilo en la batalo kontraŭ agreso de la usona imperiismo.

Indignigite de la bomboj faljetitaj de Usono sur nordan Vjetnamion, la 19-miliona popolo de la Nordo leviĝis kaj unuiĝis solide sub la standardo de gvido de la Vjetnama Partio de Laboro kaj la Registaro de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio estrataj de Prezidanto Ho Chi Minh. decidis batali ĝisfine kune kun siaj 14 milionoj da samlandanoj en la Sudo kontraŭ la usonaj agresantoj por defendi la Nordon, liberigi la Sudon kaj efektiviĝi reunuigon de la tuta lando.

Ni sendas nian varman saluton de batalo kaj solidareco al la heroa vjetnama popolo nun staranta sur la unua frontlinio de batalo de la popoloj de la mondo kontraŭ usona imperiismo, al la patriotaj kaj progresemaĵoj verkistoj de suda Vjetnamio nun starantaj ŝultron ĉe ŝultro kun siaj samlandanoj en sia heroa batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj en ekstreme penigaj kaj malfacilaj kondiĉoj, al la verkistoj de la Demokratia Respubliko de

Sub pezaj rebatoj de la heroaj armeo kaj popolo de Vjetnamio, la usona "aera supereco" suferas mizeran malvenkon.





Gemilicanoj en la norda parto de Vjetnamio produktas kaj batalas samtempe por doni fortajn batojn al la usonaj agresaj rabistoj.

Vjetnamio kiuj brave laboras kaj verkas por servi siajn popolon kaj patrolandon kontraŭ la agreso de la usona imperiismo. Ni esprimas nian profundan admiron por la heroa popolo de la norda kaj suda partoj de Vjetnamio.

Fronte al la spirito de heroa batalo de la vjetnama popolo de ambaŭ partoj, la usona imperiismo suferis unu pezan malvenkon post alia. Tamen, pro sia reakcia, agresiva kaj obstina naturo, la usona imperiismo ankoraŭ ne forlasis siajn agresajn intrigojn kontraŭ Vjetnamio. Ju pli multe da malvenkoj la usona imperiismo suferas, des pli freneze ĝi intensigas sian agresan militon. Por surkovri siajn abomenajn krimojn, ĉiukaze kiam ĝi intensigas sian agresan militon kontraŭ Vjetnamio, la usona imperiismo laŭtigas siajn trompajn parolojn pri sia "sincera volo por paco" kaj pri "senkondiĉa intertraktado". Sed la mensogaj paroloj pri "paco" de la usona imperiismo povas trompi neniun. La popolo de Vjetnamio, la popoloj de aziaj kaj afrikaj landoj, kaj la popoloj de la tuta mondo klare vidas, ke la tiel nomata "paca intertraktado" proponata de usona prezidanto Johnson estas nur fumkurteno uzata por surkovri la intensigon kaj plivastigon de la agresiva milito de la usona imperiismo kontraŭ Vjetnamio.

La usona imperiismo kunmetis en suda Vjetnamio pupan reĝimon kiel ilon por subpremi la popolon en suda Vjetnamio. Sub la pre-

teksto "plenumi" siajn "promesojn" al la saĝona pupa reĝimo, ĝi lanĉis agresan militon kontraŭ Vjetnamio. Sed ĉiu scias klare, ke la saĝona pupa kliko estas nur aro da perfiduloj kontraŭ Vjetnamio kaj malnoblaj lakeoj de la usona imperiismo. Ili ne nur ne povas reprezentanti la popolon de suda Vjetnamio, sed estas ankaŭ malestimataj, surkraĉataj kaj malbenataj de la lasta. Fronte al la armita batalo kaj politika lukto de la sudvjetnama popolo, la pupa reĝimo starigita de Usono en Sajgono estas evidente en disfalo kaj ne eskapos kolapson. La situacio en la diversaj urboj de suda Vjetnamio dum la lastaj tagoj estas plia pruvo pri tio.

La Nacilibera Fronto de Suda Vjetnamio, la sola vera reprezentanto de la popolo de suda Vjetnamio, unuigis ĉiujn vastajn tavolojn de la sudvjetnama popolo en la granda batalo kontraŭ la usona imperiismo por sinliberigo. La programo de la Nacilibera Fronto de Suda Vjetnamio fidele spegulas la interesojn kaj aspirojn de la sudvjetnama popolo. Sub la klarvida gvidado de la Nacilibera Fronto de Suda Vjetnamio, la sudvjetnama popolo batalas heroe kaj liberigis kvar kvinonojn de la teritorio de suda Vjetnamio kun pli ol 10 milionoj da loĝantoj, kaj plivastigis la politikan kaj armitan luktojn al la regionoj provizore regataj de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Tagon post tago plialtiĝas la prestiĝo de la Nacilibera Fronto de Suda Vjetnamio en- kaj eksterlande.

La heroa batalo de la vjetnama popolo montras, ke kiom ajn da trupoj la usona imperiismo alsendas, kiom ajn da modernaj armiloj ĝi uzas, ĝi neeviteble suferos fiaskon antaŭ la spirito "decideme batali kaj venki" de nacio, kiu sin unuigis por lukti kontraŭ fremdlanda agreso por sia liberiĝo. La heroaj bataloj kaj brilaj venkoj de la vjetnama popolo pravas, ke la usona imperiismo, kvankam kruelega, ne estas timinda. Per siaj heroaj bataloj kaj sinsekvaj venkoj la vjetnama popolo montris al la popoloj de la tuta mondo, ke la usona imperiismo estas tute venkebla. Fakte, la usona imperiismo suferis kaj suferas ripetajn kaj pezajn malsukcesojn en ambaŭ partoj de Vjetnamio. Per sia heroa batalo, la vjetnama popolo donis brillan ekzemplon de firma lukto kontraŭ imperiisma agreso por sinliberigo. La nacisava

batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo estas la pinto de la lukto farata de la popoloj de la mondo kontraŭ la usona imperiismo, malamiko n-ro unua de la homaro. Tiu ĉi batalo estas ekstreme granda fonto de kuraĝigo por la popoloj de aziaj kaj afrikaj landoj kaj de aliaj landoj de la mondo nun luktantaj kontraŭ imperiismo kaj koloniismoj nova kaj malnova, estrataj de la usona imperiismo. Tiu ĉi batalo estas ekstreme valora kontribuo al la movado por subteno al la lukto de la popoloj de diversaj landoj por nacia sendependeco, demokratio, paco kaj socia progreso. La popoloj de ĉiuj landoj de la mondo havas la devon doni al tiu ĉi batalo varman simpatian kaj tutfortan subtenon.

Ni, reprezentantoj de aziaj kaj afrikaj verkistoj ĉeestantaj la Urĝan Kunvenon de Azi-Afrikaj Verkistoj por subteno al la vjetnama popolo kontraŭ agreso de la usona imperiismo, post plena esplorado de la situacio en Vjetnamio, unuanime decidis:

forte kondamni la usonan imperiismon pro ties barbara milito de agreso kontraŭ la vjetnama popolo kaj kruda atenco kontraŭ la nacia sendependeco, suvereneco, unueco kaj teritoria integreco de Vjetnamio;

varme akلامي al la heroa popolo en ambaŭ norda kaj suda partoj de Vjetnamio, kiu brave luktas kontraŭ agreso de la usona imperiismo, kaj kiu, fronte al la intensigo de la armita agreso de la usona imperiismo, donis kaj donas pezajn batojn al la usonaj agresantoj;

esprimi tutan simpatian kaj senrezervan subtenon al la kvarpunkta pozicio de la Registaro de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio kaj la kvinpunkta deklaro de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio, konsiderante ilin kiel la solan ĝustan pozicion por solvi la vjetnaman problemon;

rekoni la Naciliberigan Fronton de Suda Vjetnamio kiel la solan veran reprezen-

tanton de la 14-milionoj da sudvjetnamaj popoloj; la internaj aferoj de suda Vjetnamio devas esti solvitaj de la sudvjetnama popolo mem laŭ la programo de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio;

apeli al la aziaj kaj afrikaj verkistoj, membroj de la Azi-Afrika Verkista Organizaĵo, kaj ĉiuj aliaj progresemaj kaj demokratiaj verkistoj en la mondo doni fortegan subtenon al la vjetnama popolo en ĝia sankta lukto por nacia savado kontraŭ la agreso de la usona imperiismo.

Azi-afrikaj verkistoj!

Verkistoj en ĉiuj landoj!

Homoj kun konscienco tra la tuta mondo!

La usona imperiismo kondukas ekstreme kruelegan militon en Vjetnamio. Kvankam suferante pezajn malvenkojn kaj enirante en pli kaj pli danĝeran situacion, ĝi ankoraŭ obstine plivastigas sian agresan militon. Daŭrigante la "eskaladon" de la agresa milito en Vjetnamio, la usona imperiismo serioze minacas pacon en sudorienta Azio kaj la mondo. Haltigu la sango-makulitajn manojn de la usona imperiismo! La heroa vjetnama popolo verŝas sian sangon por haltigi la agreson de la usona imperiismo. Donu tutfortan, ĝustatempan kaj senrezervan subtenon al la rezistmilito de la vjetnama popolo kontraŭ la

Batalantoj de Sudvjetnama Liberiga Armeo kaŝe sin movas sur la akvo por surprizataki la usonajn agresantojn.



Komuniko de la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj

POST la fermiĝo de la sukcesa Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj, la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj okazigis kunvenon je la 12-a de julio 1966, en Pekino, kiun ĉeestis Kameruno, Cejlono, Ĉinio, Ganao, Hindio, Indonezio, Japanio kaj Sudano.

La kunveno opiniis, ke la granda sukceso de la Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj akcelas la disvolviĝon de la movado de aziaj kaj afrikaj verkistoj, kaj plie firmigas la unuiĝon de la verkistoj kaj popoloj de Azio kaj Afriko en la batalo kontraŭ imperiismo, nova kaj malnova koloniismoj, estrataj de Usono.

Por plenumi la taskon de plifortigo de la movado de aziaj kaj afrikaj verkistoj kaj plene konsiderinte la proponon de la Ĝenerala Sekretario sinjoro R. D. Senanayake pri tiu ĉi problemo, la Konstanta Buroo, kiu havas sian ĉefsidejon en Kolombo, decidis starigi en Pekino Plenuman Sekretariejon de la Konstanta Buroo de Azi-Afrikaj Verkistoj, por helpi en plenumado de la decidoj de la Konstanta Buroo kaj fari la preparajn laborojn por la Tria Konferenco de Azi-Afrikaj Verkistoj, okazonta en Ĉinio.

La 12-an de julio 1966, Pekino

usona imperiismo por nacia savado, per ĉiuj efikaj rimedoj!

Kondamnu severe, antaŭ la tuta homaro, la barbarajn krimojn faritajn de la usona imperiismo en Vjetnamio!

Malkaŝu la trompon de "paca intertraktado" de la usona imperiismo!

Postulu, ke la usona imperiismo ĉesigu sian agresan militon kontraŭ Vjetnamio, retiru ĉiujn siajn proprajn kaj satelitajn trupojn el suda Vjetnamio, forigu ĉiujn militajn bazojn starigitajn de Usono en suda Vjetnamio!

Postulu, ke la usona imperiismo ĉesigu senprokraste, definitive kaj senkondiĉe sian bombadon al la Demokratia Respubliko de Vjetnamio!

La sudvjetnama popolo devas esti lasita aranĝi siajn proprajn aferojn laŭ la programo de Nacilibera Fronto de Suda Vjetnamio sen ia ajn interveno de la usona imperiismo!

La popolo en ambaŭ suda kaj norda partoj de Vjetnamio devas esti lasita solvi mem sian problemon de reunuiĝo de Vjetnamio sen ia ajn interveno de la usona imperiismo!


La popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, la popoloj de la socialismaj landoj, kaj la popoloj de la tuta mondo, unuiĝu kaj batalu decideme, kaj certe ĝisfunde malsukcesigos la agresajn intrigojn de la usona imperiismo!

La usona popolo kaj usonaj progresemaj verkistoj, kiuj brave luktis kontraŭ la usona registaro pro ĝia agresiva milito kontraŭ Vjetnamio, devas lukti ankoraŭ pli forte kontraŭ la usona registaro, unuiĝu intime kun la popolo de Vjetnamio kaj popoloj de la tuta mondo kaj malsukcesigu la agresan militon de la usona imperiismo kontraŭ Vjetnamio!

Certe malvenkos la usona imperiismo!

Certe venkos la vjetnama popolo!

Kamaradoj Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ kaj Aliaj Heroe Protektis la Dignon de la Patrolando




Sentimaj antaŭ la atakantoj, laborantoj de nia ambasadorejo en Indonezio denove hisis la ruĝan flagon kun kvin steloj de la Ĉina Popola Respubliko antaŭ la Ĉina Ambasadorejo en Djakarta.

Je la 15-a de aprilo, la indoneziaj dekstraj reakciaj fortoj organizis pli ol 1000 perfortulojn kaj elsendis kunordige armitajn terarmeanojn kaj kirasaŭtojn, por fari frenezan atakon al la ĉina ambasadorejo en Indonezio. Ili vundis niajn diplomatojn kaj pafvundis laboranton de la ambasadorejo kamaradon Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ. La indoneziaj dekstraj reakciaj fortoj krimis rabiste per publika treto de la plej fundamenta principo de la internacia leĝo kaj la privilegio de netuŝebleco de diplomatoj, kaj tiel tutnude malkovris sian faŝistan vizaĝon antaŭ la tuta mondo.

Antaŭtagmeze je 50 minutoj post la deka en tiu tago, puŝmalferminte la pordegon de la ĉina ambasadorejo per kirasaŭto kaj kamiono kaj entrudiĝinte en la korton, la perfortuloj freneze kriaĉis kontraŭ-ĉinajn sloganojn kaj entrudiĝis en la salonon kaj aliajn lokojn de la ambasadorejo por fari senbride detruojn. Ili rompis pordojn kaj fenestrojn, difektis aŭtojn, bruligis instalaĵojn, meblojn kaj oficialajn dokumentojn de la ambasadorejo kaj forrabis tri aŭtojn kaj grandan kvanton da havaĵoj. La terarmeanoj faris detruojn kune kun la perfortuloj. Krom pafvundi nian laboranton Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ, ili ankaŭ batvundis kvin el niaj diplomatoj, inkluzive la unuaklasan sekretarion Lju Zibo kaj vicmilitataŝeo Ŝi Hinĵen.

De la komenco de oktobro de la pasinta jaro la indoneziaj dekstraj reakciaj fortoj senĉese sendis terarmeanojn kaj organizis perfortulojn por fari barbarajn atakojn kontraŭ nia ambasadorejo en Indonezio, la oficejo de la komerca ataŝeo de la ambasadorejo, ĝenerala konsulejo, konsulejoj kaj la filio de la Hinhua Novajagentejo en Djakarta, kaj samtempe masakris ĉinajn elmigrintojn kaj rabis iliajn posedaĵojn. Ĉiuj-specaj faŝistaj krimagoj aperadis senĉese. Ĉio ĉi tio plene malkaŝis la hontindan vizaĝon de la dekstra militista reĝimo de Indonezio, kiel komplico de la usona imperiismo en ĝia kontraŭĉina agado.

La Red.



Kamarado Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ

Posttagmeze, je la 23-a de aprilo, revenis al la patrolando kamarado Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ, kiu heroe defendis la nacian flagon kaj dignon de la patrolando per freŝa sango.

La printempa suno verŝis sian lumon sur la ĉefurban aerodromon. En varma aplaŭdado, kamarado Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ estis deportita de la aeroplano per brankardo. La bonvenigantoj varme premis lian manon kaj laŭdis lin kiel bonan batalanton de Prezidanto Maŭ kaj bonan filon de la ĉina popolo.

Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ, tiu neŝancebla malmolostulo antaŭ faŝista perfortaĵo de indoneziaj dekstruloj, nun ne povis regi sian emoci- on kaj varmaj larmoj ekfluis nereteneble.

Por informiĝi pri la heroe batalado de Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ kaj aliaj kamaradoj de la ambasadorejo, kun alta estimo al la kamaradoj kiuj persistis en batalo sur la diplomatia fronto, ni faris viziton al kelkaj laborantoj de la ĉina ambasadorejo en Indonezio, kiuj revenis al la patro-

lando kune kun kamarado Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ per la sama aeroplano.

En la dua tagdeko de aprilo, la nigraj nuboj levitaj de la indoneziaj dekstruloj super Indonezio fariĝis pli kaj pli densaj. Post la efektivigo de la plano de reakcia milita ŝtatrenverso, estis levita ankoraŭ pli freneza kontraŭkomunisma kaj kontraŭĉina kontraŭfluo.

Je 50 minutoj post la deka horo de la 15-a, pli ol 100 indoneziaj armitaj armeanoj kune kun pli ol 1000 dekstraj perfortuloj freneze atakis la ĉinan ambasadorejon en Indonezio. Iuj el ili transgrim- pis la muron de la ambasadorejo, aliaj puŝmalfer- mis la pordegon per kirasaŭto kaj kamiono. En- trudiĝinte en la korton de la ambasadorejo ili kriaĉis kontraŭĉinajn sloganojn kaj ĵetis sin al gazono de la korto, intencante deŝiri la kvinstelan ruĝan flagon tie flirtantan en la aero.

Atenco kontraŭ la digno de la patrolando kaj ofendo al la majesta kvinstela ruĝa flago estas neniam permeseblaj! La kamaradoj de la ambasadorejo kun senkompara indigno tuj ekagis por defendi la nacian flagon. Starante ĉirkaŭ la piedestalo de la flagstango kamarado Lju Zibo, la unuaklasa sekretario de la ambasadorejo, ka- marado Ŝi Hinĵen, la vicmilitataŝeo, k. a. severe riproĉis la perfortulojn kaj ordonis ilin foriri. Niaj kamaradoj laŭte kriis: "La digno de la Ĉina Popola Respubliko ne estas ofendebla!" "For la perfortuloj!" La justeca voĉo imponis montojn kaj riverojn kaj subigis la impertentecon de la perfortuloj.

Iom poste, pli da perfortuloj svingante bas- tonojn kaj ponardojn kaj ĵetante ŝtonojn, sin ĵetis

Por defendi la dignon de la patrolando, laborantoj de la Ĉina Ambasadorejo en Indonezio decideme gardas la nacian standardon, kuraĝe starante sub ĝi sinforgese, antaŭ la atako de la perfortuloj kaj dekstraj armeanoj de Indonezio.



Vicĉefministro Ĉen Ji konsolas k-don Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ per voĉlego de sia poemo "Konsolo al Kontraŭimperiisma Batalanto — K-do Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ".

antaŭen al la laborantoj de nia ambasadorejo, kiuj gardis la nacian flagon. Ĉe tio, la laborantoj de la ambasadorejo Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ, Hu Ĉaŭpin k. a. ne povis sin reteni kaj kuraĝe antaŭenkuris por partopreni la defendon de la flago. Kun malplenaj manoj kaj pugnoj ili neniom timis fronte al la alsturmantaj perfortuloj, kiuj prenis kun si armilojn. Ne zorgante pri si mem, ili elstarigis sian bruston kaj malhelpis la perfortulojn proksimiĝi al la nacia flago, indigne riproĉante: "For! Ne estas permesate al vi ofendi nian sanktan nacian flagon!"

Sub la kunagado de la armitaj armeanoj la senhontaj perfortuloj freneze kriaĉis kaj sin ĵetis al la kamaradoj, kiuj gardis la nacian flagon kaj staris senmove, ne cedante eĉ unu colon. La furiozaj perfortuloj ekatakis la laborantojn de nia ambasadorejo per bastonoj kaj ponardoj. Rimarkinte, ke iu perfortulo levis sian bastonon por bati kamaradon Hu Ĉaŭpin, Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ tuj antaŭensaltis por malhelpi la perfortulon. En tiu ĉi momento iu dekstra armeano sin kaŝinta malantaŭ la perfortulo ekpafis per mitraleto kamaradon Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ kaj trafis lian bruston. Kamarado Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ estis serioze vundita. Sango fluis nehaltigeble. Niaj kamaradoj de la ambasadorejo tuj antaŭenkuris por savi lin.

La perfortuloj dume hakrompis la ŝnuron de la flagstango, entrudiĝis en la domon de la ambasadorejo, senbride detruadis kaj bruligis. Kamarado Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ estis portita al la loĝejo. Kvankam freŝa sango fluis el lia brusto kaj doloro turmentis lin, li ankoraŭ zorgis pri la batalo. Aŭdante la frenezajn kriaĉojn de la perfortuloj kaj iliajn pafsonojn, li ne povis regi sian indignon kaj diris al kamaradoj kiuj venis al li: "Kamaradoj, ne zorgu min. Iru batali kontraŭ la dekstraj perfortuloj!"

La lukto daŭris 3 horojn. Antaŭ la perforto refleksioblaj laborantoj de nia ambasadorejo la perfortuloj, fortaj laŭ la aspekto sed malfortaj interne, forglitis unu post alia. Maliko, la ministro de eksterlandaj aferoj de Indonezio venis maldigne al la ĉina ambasadorejo. Jaŭ Dengŝan, la provizora aferŝarĝito tuj faris al li plej fortan proteston kaj malkaŝis la krimagadon, kiun rekte organizis kaj gvidis la indonezia registaro. Aliaj diplomatoj de nia ambasadorejo montris al li la veston kun sango de kamarado Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ kaj diris: "Ĉi tio estas atestaĵo de via faŝista krimago. Ni akuzos vin antaŭ la tuta mondo!" Dum la tempo



la indoneziaj armitaj armeanoj starantaj ĉirkaŭ Maliko tenas siajn maŝinpafilojn kontraŭ la laborantoj de nia ambasadorejo. Niaj kamaradoj de la ambasadorejo dignoplene diris al ili: "Se vi kuraĝas, do vi ekpafu! La diplomatoj de la granda Ĉina Popola Respubliko estas ne timigeblaj!" Havante nenion por respondi Maliko fortiriĝis embarasite.

La kamaradoj elprenis novan nacian flagon kaj hisis ĝin sur la flagstango. La nova ruĝa flago kun kvin steloj flirtis fiere en la vento super nia ambasadorejo kun pli pompa brilo.

Kvar horojn post sia serioza vundiĝo, kamarado Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ estis sendita al hospitalo por ricevi kuracon. En deliro li ankoraŭ kriis: "Tuj for, vi perfortuloj!" Post rekonsciiĝo li antaŭ ĉio demandis la lin akompanantajn kamaradojn de la ambasadorejo: "Kiel statas niaj kamaradoj nun? Vi ne maltrankviliĝu pro mi, persistu en la batalo!"

Je la 17-a antaŭtagmeze kamarado Jaŭ Dengŝan, la provizora aferŝarĝito, kaj aliaj venis al la hospitalo por rigardi Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ, kunportante freŝajn florojn kaj fruktojn. Tiu ĉi heroo batalanto kiu neniam ĝemis nek ploris pro doloro post vundiĝo, nun kortuŝiĝis ĝis larmo. Li diris tre emociigite: "Mi dankas la Partion kaj Prezidanton Maŭ." Jaŭ Dengŝan diris al li: "La Partio kaj la patrolando tre zorgas pri vi kaj decidis revenigi vin al la patrolando por ricevi kuracon." Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ respondis: "Mi ne bone plenumis la taskon, kiun asignis al mi nia popolo en la patrolando. Mi petas lasi min resti por daŭre partopreni la batalon." Kamarado Jaŭ Dengŝan

rediris: "Via tasko estas jam bonege plenumita. Vi heroe gardis la nacian flagon, kaj defendis la dignon de la patrolando. Vi estas bona filo de la ĉina popolo."

Nun kamaradoj kiuj restas en la ambasadorejo, ankoraŭ persistas en la batalo. Tiuj revenintaj kune kun kamarado Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ montris kun plena fido, ke la amikeco inter la ĉina kaj indonezia popoloj estas nerompebla de ĉiuj ajn reakciuloj, kaj vere kontraŭkomunisma kaj kontraŭĉina estas nur manpleno da lakeoj de la usona imperiismo. La kontraŭĉinaj arlekenoj ne havos bonan finon.

Kiaj fortoj havigis al Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ, filo de malriĉa kamparano kaj juna komunisto, tian malmolan oston de la proletaro? Kamaradoj kiuj revenis kun li, diris al ni, ke dum sia restado en nia ambasadorejo en Indonezio kamarado Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ ĉiam diligente studis verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultis la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj restis fidela al la afero de la Partio. La kvar volumoj de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, kiujn kunportis Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ el la patrolando jam eluziĝis pro foliumado. Li montris grandan zorgon al la klasbatalo en kaj ekster la patrolando kaj la socialisma konstruado en la hejmlando. Li aĉetis per ŝparita mono transistoran radiorecivilon por aŭskulti regule informojn el la patrolando. Precipe ekde oktobro de 1965 en la cirkonstancaro de streĉa batalado li pli diligente studis verkojn de Prezidanto Maŭ. Post legado de la paroloj de Prezidanto Maŭ pri tio ke imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj estas papertigroj kaj lia artikolo "Estas Bona sed Ne Malbona Afero Esti Oponata de Malamiko", li diris: "Kvankam la indoneziaj dekstruloj nun aspektas tre ferocaj, tamen, ankaŭ ili estas nur papertigroj. Tio ĝuste montras ilian malfortecon. Ju pli nin oponas la indoneziaj dekstruloj, des pli ni devas persisti en la batalo."

Kamarado Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ tre atente lernas de herooj sur ĉiuj frontoj en la patrolando. La herooj de Vang Gie, Ĝiaŭ Julu kaj Maj Hiande


donis al li grandan instruon kaj kuraĝigon. Post la atako farita de la indoneziaj dekstraj perfortuloj kontraŭ nia ĝenerala konsulejo en Djakarta kaj la oficejo de komerca ataŝeo, li diris en diskutkunveno: "Kamarado Vang Gie timis nek penegadon nek morton. Li estis modelo en kreiva studado de verkoj de Prezidanto Maŭ. Ni faru same kiel li: agi laŭ la vortoj de Prezidanto Maŭ. Ni devas ĉiam pensi en ni pri la popolo kaj la patrolando. Se la indoneziaj dekstruloj aŭdacos ataki nin, same kiel Vang Gie, mi nepre persiste restos ĉe la posteno kaj decideme batalos, ne timante vivoferon!"

Kamarado Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ per sia agado montras, ke li estas bona batalanto edukita de la penso de Maŭ Zedong kaj elstara filo de la ĉina popolo.

Kamarado Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ serioze vundita jam tre laciĝis pro longa vojaĝo, tamen lia spirito estis tre vigla. Tuj kiam li forlasis la aeroplanon, li trovis en la ĵurnalo, donita al li de la ambasadoro Jaŭ Ĝongming, la artikolon raportantan pri la heroa lukto de li kaj la laborantoj de la ambasadorejo en Indonezio. Li modeste diris: "Ĉio ĉi tio estas akirita dank' al la eduko de la Partio kaj Prezidanto Maŭ kaj al la popolo en la patrolando, kiu donas al ni fortojn. Mi mem faris tre nesufiĉe. Mi ne plenumis la taskon, asignitan de la Partio kaj la popolo de la patrolando." Plie li diris: "La krimagoj de la indoneziaj dekstruloj estos nepre finreguligitaj! Post kiam mi estis vundita, mi neniam ploris, por ke la indoneziaj dekstruloj vidu la neflekseblan spiriton de la ĉina popolo. Antaŭ la malamikoj ni devas nur batali, sed neniam montri nin molaj. La Partio kaj popolo de la patrolando tiel zorgas pri mi, tio estas por mi plej granda kuraĝigo kaj eduko. Mi pli bone studos la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj lernos de kamaradoj Vang Gie, Maj Hiande kaj Ĝiaŭ Julu, por ne vanigi la instruon de la Partio kaj Prezidanto Maŭ kaj per tio respondi al la zorgado de la kamaradoj kaj popolo de la patrolando."

Por esprimi fortan proteston, Jaŭ Dengŝan, provizora aferŝarĝito de la Ĉina Ambasadorejo (dua de maldekstre), kaj aliaj diplomatoj montras la sangomakulitan veston de k-do Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ grave pafvundita de la armitaj armeanoj kaj perfortuloj senditaj de Indonezia Registaro.

Jaŭ Dengŝan, provizora aferŝarĝito de nia ambasadorejo (dua de maldekstre), faras plej fortan buŝan proteston al Suwito, vicministro por eksteraj aferoj de Indonezio (vestita en nigro), pro la atako kontraŭ la Ĉina Ambasadorejo farita de armitaj armeanoj kaj perfortuloj sub la rekta organizo kaj direkto de Indonezia Registaro.



Memorigaj Poŝtmarkoj pri "Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj"

La Ministerio de Poŝto kaj Telekomunikoj de la Ĉina Popola Respubliko emisiis, la 27-an de junio 1966, serion da poŝtmarkoj okaze de la Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj.

- (1) Ŝtormo
- (2) Insigno de la Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj Verkistoj



nda Unuiĝo de la
aj Verkistoj!

nda Unuiĝo de la
olo!


rediris: "Via tasko estas jam bonege plenumita. Vi heroe gardis la nacian flagon, kaj defendis la dignon de la patrolando. Vi estas bona filo de la ĉina popolo."

Nun kamaradoj kiuj restas en la ambasadorejo, ankoraŭ persistas en la batalo. Tiuj revenintaj kune kun kamarado Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ montris kun plena fido, ke la amikeco inter la ĉina kaj indonezia popoloj estas nerompebla de ĉiuj ajn reakciuloj, kaj vere kontraŭkomunisma kaj kontraŭĉina estas nur manpleno da lakeoj de la usona imperiismo. La kontraŭĉinaj arlekenoj ne havos bonan finon.

Kiaj fortoj havigis al Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ, filo de malriĉa kamparano kaj juna komunisto, tian malmolan oston de la proletaro? Kamaradoj kiuj revenis kun li, diris al ni, ke dum sia restado en nia ambasadorejo en Indonezio kamarado Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ ĉiam diligente studis verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskultis la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj restis fidela al la afero de la Partio. La kvar volumoj de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, kiujn kunportis Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ el la patrolando jam eluziĝis pro foliumado. Li montris grandan zorgon al la klasbatalo en kaj ekster la patrolando kaj la socialisma konstruado en la hejmlando. Li aĉetis per ŝparita mono transistoran radioricevilon por aŭskulti regule informojn el la patrolando. Precipe ekde oktobro de 1965 en la cirkonstancaro de streĉa batalado li pli diligente studis verkojn de Prezidanto Maŭ. Post legado de la paroloj de Prezidanto Maŭ pri tio ke imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj estas papertigroj kaj lia artikolo "Estas Bona sed Ne Malbona Afero Esti Oponata de Malamiko", li diris: "Kvankam la indoneziaj dekstruloj nun aspektas tre ferocaj, tamen, ankaŭ ili estas nur papertigroj. Tio ĝuste montras ilian malfortecon. Ju pli nin oponas la indoneziaj dekstruloj, des pli ni devas persisti en la batalo."

Kamarado Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ tre atente lernas de herooj sur ĉiuj frontoj en la patrolando. La heroaĵoj de Vang Gie, Ĝiaŭ Julu kaj Maj Hiande

Por esprimi fortan proteston, Jaŭ Dengŝan, provizora aferŝarĝito de la Ĉina Ambasadorejo (dua de maldekstre), kaj aliaj diplomatoj montras la sangomakulitan veston de k-do Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ grave pafvundita de la armitaj armeanoj kaj perfortuloj senditaj de Indonezia Registaro.



EL Popola ĈINIO

人民中國報道

Dumonata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 5 (100) 1966

Ĉefa Enhavo

Cititaj Vortoj de Prezidanto Maŭ

Prezidanto Maŭ Sate Naĝis en Jangzi-rivero
Vivu la Granda Proleta Kultura Revolucio
Forbalai Ĉiuspecajn Demonojn kaj Diablojn
Kanto de Aziaj kaj Afrikaj Verkistoj pri la
Penso de Maŭ Zedong el Ŝaŭŝan

Vivu la Unuiĝo de Aziaj kaj Afrikaj Verkistoj
kontraŭ Imperiismo

Deklaro de la Kunveno de Konstanta Buroo
de Azi-Afrikaj Verkistoj

Komuniko de la Urĝa Kunveno de Azi-Afrikaj
Verkistoj

Ĉina Popolo por Ĉiam Fidelas al la Granda
Penso de Maŭ Zedong kaj Neniam Perfidos
la Esperon de la Monda Popolo

La Popoloj de Azio kaj Afriko Jam Eniris
en Grandan Epokon de Kultura Releviĝo
kaj la Granda Kultura Revolucio de Ĉinio
Estas Granda Praktiko de la Penso de Maŭ
Zedong

Plena Sukceso de Urĝa Kunveno de Azi-
Afrikaj Verkistoj (*bildpaĝoj*)

Forte Bati per Plumo la Usonan Imperiismon
kaj Sovietian Reviziistan Klikon, la Komun-
ajn Malamikojn de la Popoloj de Azio kaj
Afriko

Unuiĝo kontraŭ Imperiismo — Historia Misio
de Aziaj kaj Afrikaj Verkistoj

Alte Flirtas la Standardo de Batalo kaj Unuiĝo
de Azio kaj Afriko

Rezolucio pri la Vjetnama Problemo
Komuniko de la Konstanta Buroo de Azi-
Afrikaj Verkistoj

Kamaradoj Ĝaŭ Hiaŭŝoŭ kaj Aliaj Heroe
Protektis la Dignon de la Patrolando

Sur la kovrilo — "Ŝtormo" (*skulptaĵo*)

Sur la dorskovrilo — Parto de la delegitoj
vizitas la Dektri Maŭzoleojn de Ming-dinastio.



**Vivu la Granda Unuiĝo de la
Aziaj kaj Afrikaj Verkistoj!**

**Vivu la Granda Unuiĝo de la
Tutmonda Popolo!**

